

eLIBRO

Karel Čapek

Naŭ fabeloj

*kaj ankoraŭ unu
pezaldone de
Josef Čapek*

I N K O



Karel Čapek
NAŬ FABELOJ
kaj ankoraŭ unu pezaldone
de Josef Čapek
El la ĉeĥa tradukis
Josef Vondroušek

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-165-8

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JULIO 2002

La granda katfabelo

1

KIEL LA REĜO AĈETIS KATON

En Friponio regis reĝo, kaj oni povas diri, ke li regis feliĉe, ĉar kiam devis esti, ĉiuj regatoj obeis lin volonte kaj kun amo. Nur iam iu de temp' al tempo lin ne obeis, kaj tiu estis lia filineto, la malgranda principino.

Jes la reĝo ordonis al ŝi, ke ŝi ne ludu per pilko sur la kastela ŝtuparejo; sed vane! Foje apenaŭ ŝia vartistino momenton ekdormetis, jam la principino estis kun sia pilko sur la ŝtuparo, kaj jen, eble la disinjoro ŝin punis aŭ la diablo kontraŭmetis al ŝi la piedon, ŝi falis kaj lezis sian genuon. Ŝi sidis sur la ŝtuparo kaj ploris — se ŝi ne estus principino, ni dirus, ke ŝi plenbuŝe kriis. Memkomprene, tuj alkuris korteganinoj kun kristalaj lavuoj kaj silkaj bandaĝoj, dek reĝaj kuracistoj kaj tri kortegaj kapelanoj, sed la doloron de la principino povis depreni neniu el ili.

Tiam ŝoviĝis survoje maljunulino, kaj vidante la principinon ploranta sur la ŝtuparo, algenuis al ŝi kaj bele diris: "Pa, ne ploru, principino. Se mi alportus al vi beston, kiu havas smeraldajn okulojn, kaj tamen neniu ŝtel-

os ilin de ĝi, tiajn lipharojn, kaj tamen ĝi ne estas viro, fajrerantan tegumenton, kaj tamen ĝi ne forbrulos al ĝi, velurpiedetojn, kaj tamen neniam ĝi tratrauos ilin al si, kaj en poŝetoj dek ses tranĉilojn, kaj tamen ĝi ne tranĉas al si viandon, certe vi ne plu plorus.”

La principidino ekrigardis la avineton, el unu ŝia blua okulo ankoraŭ fluis larmoj, sed la dua jam ridis pro ĝojo. ”Avinjo, ja tia besto,” ŝi diris, ”tia besto ne ekzistas en la mondo.”

”Jes ja,” diris la avineto, ”se sinjoro reĝo donus al mi, kiom mi postulus, tuj mi alportus ĝin al vi.” Tion ŝi diris kaj lante lamis for.

La principidino restis sidanta sur la ŝtuparo, sed ne plu ploris; nur ŝi pripensis, kiu besto ĝi povas esti. Kaj tiam ŝi ekbedaŭris, ke ŝi ne havas ĝin, ke la avino nenion alportos al ŝi, kaj komencis denove mallaŭte plori. Okazis, ke sinjoro reĝo ĵus rigardis el fenestro, ĉar li volis scii, kial la principidino tiel kriis, kaj tial li ĉion vidis kaj aŭdis. Vidinte, ke la avino tiel bele trankviligis la principidino, denove li eksidis sur la trono meze de siaj ministroj kaj konsilistoj, sed la beston li ne povis forgesi. ”Smeraldajn okulojn ĝi havas,” li ripetis al si konstante, ”kaj tamen neniu ŝtelos ilin de ĝi, lipharojn ĝi havas tiaj, kaj tamen ĝi ne estas viro, la tegumenton ĝi havas fajrerantan, kaj tamen ĝi ne forbrulos al ĝi, la velurpiedeteojn, kaj tamen neniam ĝi tratrauos ilin al si, kaj en la poŝetoj ĝi havas

dek ses tranĉilojn, kaj tamen ĝi ne tranĉas al si viandon; kio ĝi estas?” Kiam la ministroj vidis, ke la sinjoro reĝo senĉese ion flustras al si, kapneas kaj montras al siaj longaj lipharoj sub la nazo, ili ne povis kompreni, kio okazas kun li, ĝis fine maljuna kanceliero rekte demandis la reĝon.

”Mi meditas,” diris la reĝo, ”kia besto ĝi estas: la okulojn ĝi havas smeraldajn, kaj tamen neniuj ŝteloj ili de ĝi; la lipharojn ĝi havas tiajn, kaj tamen ĝi ne estas viro; la tegumenton ĝi havas fajrerantan, kaj tamen ĝi ne forbrulos al ĝi; la velurpiedetojn ĝi havas, kaj tamen neniam ĝi tratrauos ilin, kaj en la poŝetoj ĝi havas dek ses tranĉilojn, kaj tamen ne tranĉas al si viandon; kio ĝi estas?”

Nun denove la ministroj kaj konsilistoj sidis, kapskuis kaj montris permane al siaj grandaj lipharoj sub la nazo, sed neniuj povis diveni, kiu besto ĝi estas. Fine la maljuna kanceliero en la nomo de ĉiuj diris, kiel tion diris la principino al la avino: ”Sinjoro reĝo, tia besto ja ne ekzistas en la mondo.”

Sed la reĝo ne lasis sin persvadi kaj sendis post la avinon la plej rapidan kurieron. La kuriero galopas sur ĉevalo, galopas, ĝis fajreroj ŝprucas el sub la hufoj, kaj jen, jen, la avino sidas antaŭ sia kabano. ”Avinjo,” ekkriis la kuriero de la ĉevalo, ”sinjoro reĝo devas havi tiun beston.”

”Li havos,” diras la avino, ”kion li volas, se li donos al mi tiom da taleroj, kiom da plej bona arĝento trovos lokon sub la kufo de la reĝa panjo.”

Retrogalopas la reĝa kuriero al la palaco, ĝis polvo leviĝas al la firmamento. ”Sinjoro reĝo,” li raportas, ”la avino alkondukos la beston, se vi donos al ŝi tiom da taleroj, kiom da plej bona arĝento trovos lokon sub la kufo de via panjo.”

”Tio ne estos multe,” pensis la reĝo, kaj ĵuris grandan ĵuron, ke li donos al la avino ĝuste tiom da taleroj; sed tuj li iris al sia panjo. ”Panjo,” li diris, ”ni ricevos viziton. Prenu la etan belan kufeton, tiun plej malgrandan el ĉiuj, kiu kovras nur vian harnodeton.” Kaj la maljuna panjo faris tion laŭ lia volo.

La avino alvenis en la palacon kaj portis sur la dorso per tuko bele ĉirkaŭligitan dorskorbon. En la granda halo atendis jam la reĝo, lia panjo kaj la malgranda principino; sed ankaŭ ĉiuj ministroj, sekretaj konsilistoj, armeestroj kaj prezidantoj atendis, eĉ ne spirante pro sciivolemo. La avino lante, lante estis disliganta la tukon; la reĝo mem descendis de la trono por vidi la beston de proksime. Fine la avino deprenis la tukon, kaj el la dorskorbo saltis nigra kato kaj per unu salto eksidis sur la trono.

”Ha, avinjo,” la reĝo ekkriis senrevigite, ”vi trompas nin; ĝi estas ja nur kato.”

La avino apogis la manojn je la koksoj: "Ke mi trompas vin? Nur rigardu," ŝi diris montrante la katon. Kiam la kato sidis sur la trono, ĝiaj okuloj brilis verde kiel la plej belaj smeraldoj. "Nur rigardu," diris la avino, "ke ĝi havas smeraldajn okulojn. Kaj ilin, sinjoro reĝo, neniu ŝtelos de ĝi. Kaj lipharojn ankaŭ ĝi havas, kaj ne estas viro."

"Sed," oponis la reĝo, "ĝi havas, avinjo, nigran pelton kaj ne fajrerantan."

"Atendu nur," defendis sin la avino kaj kuspe karesis la katon. Vere aŭdeblis krakado de etaj sparkoj. "Kaj la piedetojn," plue diris la avino, "ĝi havas velurajn. Eĉ ne la malgranda principino, se ŝi irus nudpiede kaj piedpinte, kurus pli silente."

"Bone," koncedis la reĝo, "sed ĝi havas eĉ ne unu poŝeton, nek dek ses tranĉilojn."

"La poŝetojn," diris la avino, "ĝi havas sur la piedetoj, kaj en ĉiu akran tranĉilon — ungeton. Nur kalkulu, ĉu ili estas dek ses."

La reĝo mansignis do al la maljuna kanceliero, ke li kalkulu la ungetojn de la kato. La kanceliero kliniĝis al la kato kaj kaptis ĝin je la piedo por kalkuli; sed la kato nur ekkraĉis kaj jam ungis lin tuj ĉe la okulo.

La kanceliero rektiĝis mankovrante la okulon kaj diris: "Sinjoro reĝo, mi havas jam malfortajn okulojn, sed

mi opinias, ke estas multe da ungetoj. Pri kvar mi scias tute certe.”

Tiam la reĝo mansignis al la unua ĉambelano, ke li kalkulu la ungetojn de la kato. La ĉambelano kaptis la katon por kalkuli, sed tuj li leviĝis tute punca ĉirkaŭpalpante sian nazon kaj diris: ”Ili estas, sinjoro reĝo, sume dek du. Mi kalkulis ok, po kvar sur ĉiu flanko.”

Tiam mansignis la reĝo al la plej supera prezidanto, ke li kalkulu la ungetojn de la kato; sed apenaŭ la respektinda sinjoro kliniĝis al la kato, tuj li rektiĝis pripalpante sian disungitan mentonon kaj diris: ”Vere, ĝuste ili estas dek ses, sinjoro reĝo. La lastajn kvar mi ĵus finkalkulis.”

”Nu, kion fari,” suspiris la reĝo, ”do la katon mi devas jam aĉeti. Sed vi, avinjo, mi diras, vi estas fripono.”

Al la reĝo restis do nenio alia ol kalkulelmeti sur la tablon arĝentajn talerojn; poste li deprenis de la kapo de sia panjo la malgrandan, el ĉiuj la plej malgrandan kufeton kaj metis ĝin sur la talerojn. La kufeto estis tiel malgranda, ke sub ĝi oni povis loki ĝuste nur kvin talerojn.

”Jen vi havas, avinjo, viajn kvin talerojn kaj iru adiaŭe,” diris la reĝo kaj ĝojis, ke li havigis tion tiel mal-kare.

Sed la avino kapneis kaj diris: ”Ne tion, sinjoro reĝo, ni interkonsentis. Vi estas dononta al mi tiom da taleroj,

kiom da plej bona arĝento lokiĝos sub la kufo de via panjo.”

”Vi vidas ja,” defendis sin la reĝo, ”ke sub la kufo lokiĝos ĝuste nur kvin taleroj el la plej bona arĝento.”

La avino metis la kufeton sur la manon, karesis ĝin, turnis sur la manplato kaj lante diris: ”Mi opinias, sinjoro reĝo, ke la plej bona arĝento en la mondo estas la arĝentaj haroj de via panjo.”

La reĝo ekrigardis la avinjon, ekrigardis la panjon kaj diris mallaŭte: ”Vi pravas, avinjo.”

Tiam la avinjo bele surmetis la kufeton sur la kapon de la reĝa panjo, karesis ŝian blankan hararon kaj diris: ”Kaj nun, sinjoro reĝo, vi estas dononta al mi tiom da taleroj, kiom da arĝentaj haretoj estas sub la kufo de via panjo.”

La reĝo ekmiris, la reĝo morniĝis, la reĝo fine ekridetis kaj diris: ”Vi ja estas, avinjo, ege granda friponino.”

Nu jes, infanoj, ĵuro estas ĵuro, kaj tial la reĝo devis pagi al la avinjo, kiom ŝi postulis. Li petis do sian panjon, ke ŝi sidiĝu, kaj ordonis al sia plej supera kontisto, ke li kalkulu ŝiajn arĝentajn harojn, kiuj havos lokon sub ŝia kufeto. La kontisto kalkulas, kalkulas, kaj la reĝa panjo bele sidas, eĉ ne moviĝas, kaj jen, vi scias, la maljunulo ŝatas dormon kaj facile ekdormetas — mallonge, la reĝa panjo ekdormis.

Dum ŝi dormis, la kontisto kalkulis po hareto; kaj ĝuste kiam li kalkul-atingis ĝis unu mil, eble pli forte li ektiris iun arĝentan haron, la reĝa panjo vekigis.

”Ve,” ŝi ekkriis, ”kial vi vekas min? Mi havis viglan songon; mi songis, ke ĵus la venonta reĝo transpaŝis la limon de nia lando.”

La avino skuiĝis. ”Kiel strange,” ŝi hastdiris, ”ĝuste hodiaŭ ĉe mi ekloĝos mia nepeto el la najbara regno.”

Sed la reĝo ne aŭskultis kaj ekkriis: ”De kie, panjo, de kie venos venonta reĝo de nia lando? El kiu reĝa kortego?”

”Tion mi ne scias,” diris la reĝa panjo, ”ĉar ĵus vi vekis min.”

Dume la plej supera kontisto plu kalkulis, kaj la reĝa panjo denove ekdormis. La kontisto kalkulas, kalkulas jam ĝis du mil, kaj tiam denove lia mano ekskuis kaj li ektiris forte arĝentan haron.

”Hej, junuloj,” ekkriis la reĝa panjo, ”kial vi vekis min? Ĵus mi songis, ke la venontan reĝon alkondukos ĉi tien neniu alia nur ĉi tiu nigra kato.”

”Pa, panjo,” miris la reĝo, ”kiu iam ajn aŭdis, ke kato alkondukis iun domen?”

”Iel ĝi okazos,” diris la reĝa panjo, ”sed nun lasu min dormi.”

Denove ekdormis la reĝa panjo, kaj denove kalkulis la

kontisto. Kiam li finkalkulis la trimilan kaj la lastan, ekskuis lia mano kaj li senvole denove forte ektiris.

”Ha, vi mavuloj,” ekkiris la reĝa panjo, ”vi ne lasas la maljunan ulinon tempeton dormi. Ĵus mi songis, ke la venonta reĝo alveturos ĉi tien kun sia tuta domo.”

”Nu, tion jam, panjo, pardonu al mi,” diris la reĝo poste, ”sed tio verŝajne ne estos vero. Kiu povus alveturigi kun si la tutan reĝan kastelon?”

”Ne parolu, knabo, senkerne,” mentoris lin la panjo. ”Neniam oni scias, kio povas okazi.”

”Jes, jes,” kapskuis la avinjo, ”bone diras la patrino, sinjoro reĝo. Al mia mortinta edzo, Dio donu al li eternan gloron, ciganino profetis: Foje koko forbekos vian tutan bienon. Kaj tiam la edzo, povrulo, ekridis kaj diris: Nu, ciganino, sciu, tio verŝajne ne estos vera. Ĝuste kiel vi, sinjoro reĝo.”

”Nu kio,” demandis la reĝo scivole, ”ĝi ne estis vero, ĉu?”

La avino komencis viŝi larmojn. ”Nu, foje alflugis ruĝa koko, nome incendio, kaj ĉion ĝi forbekis al ni. La edzo poste iradis kvazaŭ spiritmanke kaj senĉese diradis: La ciganino pravis! La ciganino pravis! Kaj nun, la povrulo, jam dudek jarojn estas morta.”

Tiam la avino ekploris; sed la reĝa panjo prenis ŝin ĉirkaŭ la kolo, karesis ŝian vangon kaj diris: ”Ne ploru,

avinjo, alie ankaŭ mi komencos.” Tion la reĝo ektimis, kaj tial rapide li komencis tintigi la monon. Li estis metanta taleron post talero, ĝis li kalkulmetis tri mil, ĝuste tiom, kiom da arĝentaj haroj ampleksas la kufo de la reĝa panjo. ”Nu, avinjo,” li diris, ”jen vi havas kaj Dio benu ĝin; sed de vi oni ne riĉiĝus.”

La avino ekridis, kaj ĉiuj ekridis kun ŝi — kaj ŝi komencis enbursigadi la talerojn. Sed kiel povus sufiĉi la burso! Ŝi devis ŝovamasigi la talerojn en la dorskorbon, kaj la dorskorbo tute plenis de ili, la avinjo ĝin eĉ ne levigis. Du armeestroj kaj la reĝo mem helpis al ŝi surdorsigi la korbon, kaj tiam la avinjo bele al ĉiuj riverencis, adiaŭis la reĝan panjon kaj nur ankoraŭ turniĝis por laste rigardi sian nigran katon Jurka. Sed Jurka estis nenie. La avino turniĝas, vokas ”ĉiĉi, ĉiĉi”, sed la kato nenie. Sed el post la trono videblas ies piedetoj; la avinjo iras tien piedpinte kaj vidas, — la principino ekdormis en angulo post la trono kaj sur ŝia sino dormas kaj ronronas la ege kosta Jurka. Kaj la avino elpoŝigis taleron kaj enmanigis ĝin al la principino; se ŝi volis doni ĝin memore, do ege ŝi eraris, ĉar kiam la principino vekigis kaj trovis sur sia sino la katon kaj enpolme la taleron, ŝi prenis la katon en la brakojn kaj iris kun ĝi tra la plej kurta vojo frandelspezi la taleron. Sed eble ankaŭ tion la avinjo sciis anticipe.

Dum la principidino ankoraŭ dormis, la avino estis jam longe hejme, ĝojante, ke ŝi alportis tiom da mono, ke ŝi lasis Jurkan en la plej bonaj manoj, sed pleje ŝi ĝojis, ĉar transportisto ĵus alveturigis el la najbara regno ŝian nepeton Vašek.

2

ĈIO, KION KATO KAPABLAS

Kiel do vi scias, la kato nomiĝis Jurka, sed la principino nomis ĝin ankoraŭ plurmaniere: katino kaj katineto, ĉiĉo, ĉiĉeto kaj ĉiĉinjo, lekulineto, kateto kaj katideto, kaj katinjo, kaj el tio jam vi vidas, ke ege ŝi ŝatis ĝin. Apenaŭ matene ŝi malfermis la okulojn, jam ŝi vidis la katinon sur kuseno: tie Jurka, pigrulino, ripozĝuis kaj ronronis por ŝajnigi, ke ion ĝi faras. Poste ambaŭ lavis sin samtempe, la katino ja multe pli funde, eĉ se nur per piedeto kaj lango; sed ĝi restis ankoraŭ longe pura, kiam la principino jam tiom kaj ĉiel malpuriĝis, kiel nur infanoj tion scias.

Kaj tamen Jurka estis katino kiel ĉiu alia: nur ŝate ĝi sidis kaj dormetis sur la reĝa trono, kio al aliaj katinoj ordinare ne okazas. Eble ĝi dume rememoris, ke ĝia malproksima oĉjo, leono, estas reĝo de ĉiuj bestoj. Aŭ eble nur tiel ĝi aspektis, kvazaŭ ĝi rememorus; sufiĉis, se iu muso elŝovis la kapon el truo — unusalte Jurka ĝin kaptis kaj fiere iris meti ĝin al la tronpiedoj, eĉ se tio estis dum la plej granda kaj solena kunveno.

Foje la reĝo estis juĝonta proceson de du grandsinjoroj. Ambaŭ staris antaŭ la ŝtupoj de la trono kaj ege kverelis, kiu pravas. Kiam la kverelo kulminis, venis Jurka, trenmetis la kaptitan muson kaj fiere atendis laŭdon. La unua sinjoro tute ne atentis ĝin, dume la alia rapide kliniĝis kaj Jurkan karesis. "Ha," tuj diris al si la reĝo, "tiu homo estas justa, ĉar li rekonas ĉies meriton." Kaj jen, poste montriĝis, ke li pravis.

Kaj la reĝo havis en la palaco du hundojn, unu nomiĝis Bafo kaj la alia Bafeno. Kiam unuafoje ili ekvidis Jurkan dormeti sur la sojlo, ili ekrigardis sin, kvazaŭ volante diri: "Aŭskultu, kolego, ĉi tiu ne estas niulo." Kaj kvazaŭ interkonsente ili kuregis kontraŭ la povran Jurka. La katino nur retiriĝis al muro kaj hirtigis la voston tiel, ke ĝi estis dika kiel balailego. Se Bafo kaj Bafeno estus pli saĝaj, ili sciis, kion la katino intencas, kiam ĝi tiel hirtigas la voston; sed ĉar ili estis malsaĝaj, ili volis ĝin unue flari. Unue Bafo, sed apenaŭ ĝi nur flaris, jam ĝi ricevis tian sur la nazon, ke ĝi ekkvivitis, mallevis la voston kaj fuĝis, ke ankoraŭ la tutan horon ĝi ne povis halti kaj poste ankoraŭ du tagojn tremis pro timo.

Kiam Bafeno tion vidis, iom ĝi embarasiĝis, sed opiniis, ke ĝi devas ŝajnigi heroon. "Atendu, bastardo," ĝi diris al Jurka, "kun mi nenion komencu, mi scias boji tiel, ke ankaŭ la luno sur la ĉielo min timas." Kaj por

pruvi tion, tiel forte ĝi ekbojis, ke mejlon ĉirkaŭe krevis vitroj en ĉiuj fenestroj.

Sed Jurka eĉ ne iom palpebrumis, kaj kiam Bafeno finbojis, ĝi diris: "Nu, iom krei ci scias, sed kiam mi eksiblas, eĉ en serpento frostiĝas la sango pro timo." Kaj ĝi eksiblis tiel terure, ke sur Bafeno hirtiĝis pro timo ĉiu haro.

Kiam ĝi iom rekonsciiĝis, ĝi komencis denove: "Nu jes, la siblado ankoraŭ ne estas heroaĵo; sed rigardu, kiel mi scias kuri!" Kaj antaŭ ol la katino ekatendis, ĝi ĉirkaŭkuris la tutan palacon tiel rapide, ke la kapo de la palaco mem vertiĝis.

Jurka ege miris pri tio, sed ŝajnis, kvazaŭ nenio okazus. "Nu," ĝi diris, "almenaŭ mi scias, kiel ci kuros antaŭ mi; sed se irus kontraŭ mi iu centmilo pli forta ol ci, mi eskapus antaŭ li tiel." Kaj per tri saltoj ĝi estis supre en arbosupro — tiel alte, ke Bafeno havis el tio egan kapturniĝon.

Kiam denove ĝi rekonsciiĝis, ĝi diris: "Sciu, serioza hundo ne grimpas sur arbojn; sed se ci volas scii, kion mi kapablas, atentu: mi flaras, flaras, ke reĝino en la najbara regno bakas por tagmanĝo kolombidojn, kaj ni havos morgaŭ tagmeze rostitan anseron."

La katino ankaŭ sekrete flaris, sed nenion sentis; tre ege ĝi ekmiris, kian egan flarsenton havas la hundo, sed nenion vidigis sur si. "Nu," ĝi diris, "nenio kompare al mia aŭdosento; ekzemple mi aŭdas, ke ĝuste nun teren

falis la kudrilo de nia reĝimo kaj ke en la najbara regno post kvaronhoro oni sonorigos tagmezon.”

Super tio denove miregis Bafeno, sed por ne subiĝi tiel facile, ĝi diris: ”Nu, sciu do: ni ne plu bojos kontraŭ vi. Ne timu min kaj descendu.”

”Mi,” diris Jurka post tio, ”memkomprene mi ne timas cin. Sed sciu! Ne timu min kaj grimpu al mi sur la arbon.”

”Mi,” diris Bafeno, ”tuj mi rampus supren; sed unue ci devas por pruvi amikecon, tiel vostumi, kiel ni hundoj tion faras.” Ĉe tio ĝi komencis vostumi tiel rapide, ke ĝi nur siblis.

Jurka tion provas, provas, sed ne sukcesas; nu memkomprene, tion ja la disinjoro instruis nur al la hundoj! Sed por ne kompromiti sin pro timemo, ĝi descendis de la arbo kaj iris al Bafeno. ”Ni katoj,” ĝi diras, ”kiam ni intencas nenion malbonan, tiel ni ronronas. Tion ci povus iom provi pro amikeco al mi.”

Bafeno do provis iomete ronroni, sed kiel nur! eliĝis tia grumblo, ke ĝi mem ekhontis. ”Venu,” ĝi rapidis diri, ”prefere ni iros antaŭ la pordegon boji je homoj; home-to, kia ega farso ĝi estas!”

”Mi opinias,” oponis Jurka modeste, ”ke tion mi ne kapablus bone; sed se ci havas nenion kontraŭ tio, ni iru sidiĝi sur la tegmento-randon kaj rigardi ĉion ege de supre.”

”Pardonu,” diris Bafeno embarasite, ”sed se mi estas alte, mi havas kapturon. Plej bone estus, se ni irus kune ĉasi leporojn.”

”Leporojn,” diris la katino, ”mi ne scius ĉasi; mi ne havas, knabo, tiajn krurojn. Sed se ci irus kun mi, mi montrus al ci arbon, kie ni povus kune kaptadi birdojn.”

Bafeno tristiĝis. ”Sciu, Jurka,” ĝi diris fine, ”tiel kune ĝi ne eblus. Sciu! mi restos hundo en arbaro kaj strato, kaj ci restos katino sur arboj kaj tegmento. Sed ĉi tie en la palaco kaj sur la korto kaj en la ĝardeno ni ne estos hundo kaj kato, sed du amikoj.”

Tiel ankaŭ okazis, kaj ambaŭ tiel kutimiĝis unu je la alia, ke ili alproprigis al si ankaŭ siajn manierojn. Tiel Jurka lernis postkuri la principidinon kiel hundo, kaj Bafeno vidinte, ke la katino portadas al la piedoj de la reĝo ĉasitajn musojn, triumfe portadis al li antaŭ la tronon ostojn, kiujn ĝi elastis el balaaĵejo aŭ surstrate. Por tio ĝi ne estis tiel laŭdata, kiel la katino por la musoj.

Foje estis profunda nokto kaj Bafeno dormis en sia budo; sciu, infanoj, ke la reĝa hundo havas budon el cedra ligno aŭ mahagono. Ĵus ĝi songis, ke ĝi vidas leporon kaj ĝi kuregis post ĝin tiel, ke ankaŭ dum la songo ĝiaj kruraĉoj skuiĝis, kiam ĝi eksentis sur la muzelo leĝeran frapeton. ”Ha,” ĝi abrupte vekigis, ”ha, kio okazas?”

”Ĉit,” flustris la konata voĉo, ”silentu iom.” Bafeno ekkonis Jurkan; ĝi estis pli nigra ol la nokto, nur ĝiaj ver-

daj okuloj saĝe kaj ekscite brilis. "Mi sidas sur tegmento," flustre rakontis Jurka, "kaj meditas pri io ajn, kiel jam estas mia kutimo; kaj jen, ja ci scias mian aŭdosen-ton, mi aŭdas ies paŝojn malproksime, malproksime de ĉi tie en la reĝa ĝardeno."

"Ha," ekkriis Bafeno.

"Silentu," eksiblis Jurka. "Vetu, Bafeno, ke li estas ŝtelisto. Ĉu vi scias? Ni iros lin kapti."

"Hu," ekbojis la hundo fervorege, "jam mi kuras." Ili leviĝis kaj kune iris en la ĝardenon.

Estis nigrenigra nokto. Bafeno volis kuri antaŭen, sed en la mallumo ĝi ege eraris kaj stumblis ĉiupaŝe. "Jurka," ĝi flustris angore. "Jurka, mi ne vidas eĉ je paŝdistanco!"

"Mi," diris Jurka, "mi vidas nokte same kiel tage. Mi iros antaŭe kaj ci sekvu min laŭ flaro." Tion ankaŭ ili faris.

"Ho," ekdiris Bafeno subite, "mi flaras ies spurojn." Kun la muzelo ĉe la tero ĝi kuregis laŭ la spuro, kvazaŭ ĝi vidus plej klare. Jurka post ĝin. "Ĉit," ĝi ekflustris post tempeto, "jam mi vidas lin. Li estas ĝuste antaŭ ci."

"Ha," ekkriis Bafeno fortvoĉe, "hrrrr, hrrrr, kontrrrraŭ lin! Ha, ha, ulo, ha frripo, ha fiulo, ha ci nenifarrrrulo! Strrrangolu lin, sufoku lin, bategu lin, frrrapegu lin, rrrfaldu manikojn je li kaj ŝirrru lin. Ha, ha, ha!"

Kiam la ŝtelisto tion aŭdis, li terure ektimis kaj fuĝis. Bafeno tuj post lin, mordis liajn surojn, disŝiris la kruru-

mojn, saltis sub liajn krurojn kaj faligis lin, kaj ankoraŭ ekmordis lian orelon. La ŝtelisto apenaŭ povis leviĝi kaj pro timo surrampis arbon. Sed nun estis la vico de Jurka: ĝi rampis post lin, saltis sur lian nukon kaj ungis, mordis, gratis, hakis kiel ĝi povis. "Pff," ĝi bavis dume kaj siblis, "mi sssapumos cin, sssenvivigos cin, bassstonos cin, dissskarnos cin je ssssplitoj."

"Ha," blekis malsupre Bafeno, "sufoku lin, bategu lin, murdu lin, faligu lin, ĵetu lin al mi, mortigu lin, frapegu lin, katenu lin, mordu lin, ne lasu lin!"

"Mi kapitulacas," ekkriis la ŝtelisto en mortangoro kaj falis de la arbo kiel sako, ekgenuis, levis la manojn al la ĉielo kaj petis: "Ne mortigu min, mi petas, ja mi kapitulacas. Konduku min, pro dio, kien vi volas!"

Do tiel ili ekiris revene: unue Jurka kun la vosto levita kiel sabro, poste la ŝtelisto kun la levitaj manoj, kaj fine Bafeno. Dumvoje renkontis ilin gardistoj kun lanternoj, ĉar la bruo vekis ilin, kaj aliĝis al la procesio. Tiel Jurka kaj Bafeno alkondukis kun granda pompo la ŝteliston en la kastelon. La reĝo kaj reĝino mem vekiĝis kaj rigardis tion tra fenestro, nur la principino dormis kaj preterdormis ĉion ĉi, kaj ŝi preterdormus eble ankaŭ la matenmanĝon, se Jurka, kiel ĉiumatene, ne estus veninta ĝuripozi en ŝiaj kusenoj kun mieno tiel rava, kvazaŭ nokte tute nenio okazus.

Ankoraŭ plurajn aferojn sciis Jurka, sed la fabelo ne

havas finon. Tial nur koncize mi diras, ke iam ĝi kaptadis per piedeto fiŝojn en rivereto, ŝate manĝis kukum-salaton, kaptadis birdojn, kvankam tio estis al ĝi malpermesita, kaj dume mienis senkulpe kiel anĝelo kaj sciis ludi tiel bele, ke tion oni rigardus la tutan tagon. Kiu volus scii pri Jurka ankoraŭ pli, tiu rigardu kun la amo kiun ajn katon; ĉiu havas en si parton de Jurka kaj ĉiu scias mil belajn kaj gajajn petolaĵojn kaj kaŝas ilin antaŭ neniuj, kiu ne turmentas ĝin.

3

KIEL DETEKTIVOJ ĈASIS MAGIISTON

Parolante jam pri tio, kion ĉion la kato scias, ni devas ankoraŭ ion rakonti. La principidino ie aŭdis, ke ĉiĉo falanta de alto, ĉiam falas sur piedojn kaj nenio okazas al ĝi. Do foje ŝi prenis Jurkan, rampis kun ĝi sur la tegmenton, kaj por provi tion, lasis fali la karan Jurkan tra fenestreto el ega alto. Tuj poste ŝi elrigardis, ĉu vere ŝia ĉiĉinjo falis sur la piedojn; sed Jurka ne falis sur la piedojn, ĉar ĝi falis sur la kapon de iu sinjoro, ĝuste iranta malsupre surstrate. Eble Jurka falante iel enigis la ungetojn en lian kapon, aŭ kiu scias, kio ne plaĉis al li ĉe tio — kurte, li ne lasis la katinon sidi sur la kapo, kiel eble la principidino opiniis, ke li devus fari, sed li deprenis ĝin, ŝovis sub la jakon kaj rapidpaŝe malaperis.

Plore morne la principidino kuris el la subtegmento kaj rekte al sinjoro reĝo. "Be, be," ŝi ploris, "iris malsupre sinjoro kaj ŝtelis de ni Juu-uurkan!"

La reĝo aŭdis tion kaj ektimis. "Kato tie, kato alie," li opiniis, "sed ĉi tiu katino estas alkondukonta al ni la

venontan reĝon. Ĝin,” li opiniis, ”tamen mi ne ŝatus perdi.”

Rapide li venigis la policprezidanton. ”Tiel kaj tiel,” li diris al li, ”iu ŝtelis de ni la nigran katon Jurka. Li portis ĝin sub la jako kaj iris onidire tra ie for.”

La policprezidanto sulkis la brovojn, meditis duonhoron kaj poste diris: ”Sinjoro reĝo, la katinon mi trovos helpe de disinjoro, de polico publika kaj sekreta, de la tuta armeo, artilerio, floto, estingistaro, ŝipoj submaraj kaj aerŝipoj, aŭguristoj, kartistinoj kaj de la tuta cetera loĝantaro.”

Tuj la prezidanto kunvenigis siajn plej bonajn detektivojn. Detektivo, infanoj, estas sinjoro, kiu estas en servoj de la sekreta polico kaj estas vestita kiel ĉiu alia homo, sed ĉiam li estas alivestita je iu, por ke neniu ekkonu lin. Kaj detektivo ĉion solvas, ĉion trovas, ĉiun kuratingas, ĉion scias kaj nenion timas. Kiel vi vidas, ne estas facile esti detektivo.

Do tuj kunvenigis la prezidanto siajn plej bonajn detektivojn. Ili estis tri fratoj, Sciemulo, Ĉieestinto kaj Ĉiosciulo; plue ruza italo Signor Sagazzi, gaja dika nederlandano Mynheer Ŝovsin, slava grandulo Leonov kaj morna, malparolema skoto Mister Morney. Kvin vortoj, kaj ili jam sciis, pri kio temas; kaj kiu la ŝteliston kaptos, ricevos grandan rekompencan.

”Si,” ekkriis Sagazzi.

”Jaa,” diris gaje Ŝovsin.

”Mm,” murmuris Leonov.

”Well,” aldiris Morney lakone.

Sciemulo, Ĉieestinto kaj Ĉiosciulo simple palpebrumis je si.

Post kvaronhoro Sciemulo sciigis, ke la sinjoro kun la nigra kato sub la jako iris tra strato Spálená.

Post duonhoro Ĉieestinto informis, ke la sinjoro kun la nigra kato sub la jako deflankiĝis supren al Vinohradý.

Post unu horo alkuris Ĉiosciulo, ke la sinjoro kun la nigra kato sub la jako sidas en gastejo en Strašnice ĉe glaso da biero.

Sagazzi, Ŝovsin, Leonov kaj Morney ensaltis en la preparitan aŭton kaj flugveturis al Strašnice.

”Knaboj,” diris Sagazzi, kiam ili alveturis tien, ”krimulon tiel ruzegan ni devas kapti per ruzo. Lasu min agi.” Dume, la sagaculo pensis nur pri tio, ke la promesitan rekompencan li ricevu sola.

Li alivestis sin rapide je ŝnurfaristo vendanta ŝnurojn, kaj ekiris en la gastejon. Tie li vidis sidi fremdulon en nigra vesto, nigraharan, nigrabarban, palvizaĝan kaj kun belegaj, eĉ se iom melankoliaj okuloj. ”Jen li,” tuj komprenis la detektivo.

”Sinjoro signor kavaliro,” li komencis hakparoli al li en misa ĉeĥa lingvo, ”mi vendas ŝnurojn, belajn, firmajn

ŝnurojn, ili estas nedisŝireblaj, ŝnuroj kvazaŭ ferajn.” Dum li estis montranta siajn ŝnurojn, ĉiel li ilin dismetadis, streĉadis, disetendadis, disvolvadis, transmetadis inter la manoj, sed dume liaj okuloj nurnur embuskis, kiel rapide nodligi kaj kateni.

”Mi ne bezonas,” diris la fremdulo kaj skribis ion fingre sur la tablo.

”Nur rigardu, sinjoro,” hastparolis Sagazzi ankoraŭ pli fervore kaj transĵetadis, streĉadis, disvolvadis la ŝnurojn ankoraŭ pli rapide, ”rigardu nur, kiel longaj ili estas, kiel firmaj ili estas, kiel maldikaj ili estas, kiel fortikaj ili estas, kiel blankaj ili estas, kiel bonaj ili estas, kiel ili estas — kiel ili estas — Diable,” li ekkriis subite angore, dismetadis kaj renversadis, komencis liaj manoj iel strange implikiĝi en ilin kaj la ŝnuroj de si mem nodiĝis, enmaŝiĝis, implikiĝis, nodligiĝis, kunligiĝis, kuntiriĝis, kaj subite (li rigardis kiel frenezulo) li mem havis per ili la manojn tute kaj firme katenitaj.

Sagazzi eĉ ŝvitis pro angoro, sed opiniis, ke ankoraŭ li elkateniĝos. Li komencis skuiĝi kaj tordiĝi, skuegi sin kaj barakti, li saltis, kliniĝis kaj turniĝis por iel elvolviĝi el la ŝnuroj, kaj dume ĉiam pli rapide babilis: ”Rigardu, rigardu, kia laboro, kia forto, kia firmeco, kia solideco, kia longeco, kia elasteco, kia beleco, kiaj, miadio, ŝnuroj!” Kaj dum li tordiĝis kaj saltis, ĉiam pli firme kaj rapide la ŝnuroj turniĝis kaj volviĝis ĉirkaŭ lin, nodiĝis kaj

kuntiriĝis, ĝis senspire, katenita je la manoj kaj kruroj, longlarĝe ĉirkaŭligita kaj laĉita, Signor Sagazzi falis teren.

La fremdulo sidis, eĉ ne brovon movis, ankaŭ ne levitis la tristajn okulojn, nur kvazaŭ li desegnus ion fingre sur la tablo.

Dume jam la detektivoj ekstere miris, ke Sagazzi ne revenas. "Mm," ekkriis Leonov decide kaj rapidis en la gastejon. Li rigardis — Sagazzi kuŝas katenita sur la tero kaj ĉe la tablo la fremdulo, kun la mallevita kapo ion fingre desegnanta sur la tablotuko.

"Mm," ekmurmuris la grandulo Leonov.

"Kion per tio," demandis la fremdulo, "vi volas diri?"

"Ke mi arestas vin," diris Leonov krude.

La fremdulo nur levitis siajn rave belajn okulojn.

Leonov jam etendis sian grandegan pugnon, sed antaŭ tiuj okuloj li eksentis sin nebone. Kaj li enpoŝigis ambaŭ manojn kaj diris: "Mi, nu, vi iru prefere memvole. Kiun mi kaptos, en ties korpo eĉ osteto ne restos tuta."

"Pa," diris la fremdulo.

"Jes, jes," daŭrigis la detektivo. "Kaj kies ŝultron mi frapetas, tiu estas por eterne lamigita. Min oni nomas Forta Leonov."

"Kara batuŝko," diris la fremdulo, "tio estas ja bela,

sed forto ne estas ĉio. Kaj parolante kun mi, vi povus afable elpoŝigi viajn naĝilojn.”

Leonov iom ekhontis kaj volis tuj elpoŝigi la manojn. Sed kio? Li ne povas kaj ne povas ilin eksterigi. Li provas tion per la dekstra — ĝi restas en la poŝo kvazaŭ al-kreskinta. Li provas tion per la maldekstra — kvazaŭ kvintaloj ĝin tenus en la poŝo. Sed eĉ se kvintaloj tio estus, li eltirus ilin, sed la manon elpoŝigi li ne povas kaj ne povas, eĉ se li tiras kaj tiregas kaj skuegas kiel eble plej forte.

”Kiaj malbonaj ŝercoj,” murmuris Leonov senpove.

”Eĉ ne tiel malbonaj, kiel vi opinias,” diris la fremdulo mallaŭte kaj plu fingre desegnis sur la tablo.

Dum Leonov klopodis kaj ŝvitis kaj tordiĝis por elpoŝigi la manojn, la detektivoj miris, ke li ne revenas. ”Mi iros tien,” diris Ŝovsin mallonge, kaj en sia tuta larĝo ŝovis sin en la gastejon. Li rigardis — Sagazzi kuŝas katenita sur la planko, Leonov kun la manoj enpoŝe dancas tra la ĉambro kiel urso kaj ĉe la tablo la fremdulo kun mallevita kapo fingre desegnaĉas sur la tablo.

”Ĉu vi venas aresti min?” aŭdiĝis la fremdulo, antaŭ ol Ŝovsin povis ion diri.

”Je via dispono,” ekkriis kompleze Ŝovsin kaj eltiris el la poŝo ferajn katenojn. ”Nur bonvolu, via moŝto, la manetojn etendi, ni surmetos la katenojn, mi petas, belajn fridajn katenojn, tute novajn katenetojn, via moŝto, el

plej fajna ŝtalo, kun bela blenda ĉeneto, ĉio plej bonkvalita.” Dume la ŝercema Ŝovsin tintegis per la katenoj kaj transĵetadis ilin de mano al mano, kvazaŭ montrante varon. ”Bonvolu elekti,” li hastparolis plu gaje, ”neniun ni devigas, nur iom tiun, kiu mem ne volas; superfajnaj braceletoj, via moŝto, kun patentita seruro, bone farita, nenie ĝi premdoloras kaj nenie ĝi ĝenas,” — tiam Ŝovsin komencis ruĝiĝi kaj ŝviti kaj transĵetadi la katenojn pli kaj pli rapide el la mano en la alian, ”belegaj ka-katenoj, faritaj ĝuste por la sinjoro, uf, ha, ha! el kanonŝtaŝta-ŝtalo, hardita en ho-ha-ho-uf! fajro, en fajro, en la plej inkan-kan-kan-kan- hu inkadeska fajrujo kaj — sakre!” subite ekkriegis Ŝovsin kaj ĵetegis la katenojn teren. Kial li, povrulo, ne ĵetegus! kaj kial li ne transĵetadus ilin en la manoj! ja la katenoj estis blanke inkandeskaj, kaj apenaŭ ili falis teren, ilin brultruigis la plankon, mire ke ili ne flamigis ĝin.

Dume ekstere Morney jam miris, ke neniuj revenas. ”Well,” li ekkriis energie, eltiris revolveron kaj penetris en la gastejon. Li rigardis — ĉie fumoplene, Ŝovsin saltas pro doloro tra la ĉambro kaj blovas sur la manplatojn, Leonov tordiĝas kun enpoŝigitaj manoj, Sagazzi kuŝas katenita sur la planko kaj ĉe la tablo la fremdulo, kun mallevita kapo, pentraĉas ion sur la tablotuko.

”Well,” eldiris Morney kaj iris kun revolvero rekte kontraŭ la fremdulon. La fremdulo direktis al li sian dol-

ĉan, mediteman rigardon. Morney eksentis, ke lia mano ektremas ankaŭ tiuj okuloj, sed superregis sin kaj pafis el la plejproksimo je la fremdulo ĉiujn ses kuglojn el la revolvero frunten inter la okulojn.

”Ĉu jam prete?” demandis la fremdulo.

”Ankoraŭ ne,” rediris Morney, eltiris la duan revolveron kaj pafis pluajn ses kuglojn sur la frunton de la fremdulo.

”Prete?” demandis la fremdulo.

”Jes,” diris Morney, turniĝis sur la kalkano, kaj krucmetinte la manojn, eksidis en angulo sur benko.

”Do, mi pagas,” ekkriis la fremdulo kaj per dekhele-ro tintigis la glason. Sed el la hejmanoj venis neniu. Ĉiuj kaŝiĝis pro timo en la subtegmento, aŭdinte la pafadon. La fremdulo lasis do dekheleron sur la tablo, salutis la detektivojn kaj trakvile foriris.

Tiumomente aperis en unu fenestro la kapo de Sciemulo, en la alia de Ĉieestinto kaj en la tria de Ĉiosciulo. Sciemulo unua ensaltis tra la fenestro en la ĉambron.

”Knaboj,” li diris, ”kie vi havas lin?” Kaj li ekridis.

Tra la dua fenestro ensaltis Ĉieestinto. ”Ŝajnas al mi,” li diris, ”ke Sagazzi kuŝaĉas tie sur la planko.”

Tra la tria fenestro ensaltis Ĉiosciulo. ”Kaj al mi ŝajnas,” li diris, ”ke Ŝovsin estas nun iel morna.”

”Mi opinias,” incitis Sciemulo, ”ke Morney nun ne rigardas kiel leono.”

”Kaj mi opinias,” findiris Ĉieestinto, ”ke Leonov ne estas ĝuste sagaca.”

Sagazzi sidiĝis sur la planko. ”Knaboj,” li defendis sin, ”tio ne estas nur per si mem. Tiu ŝtelisto katenis min kaj eĉ ne fingre min tuŝis.”

”Kaj miajn manojn,” murmuris Leonov, ”li al frostigis en la poŝoj.”

”Kaj al mi,” lamentis Ŝovsin, ”li inkandeskigis la kate-
nojn en la manoj.”

”Well,” aldiris Morney, ”ĉio ĉi estas nenio. Sed mi en-
pafis al li dek du kuglojn frunten, kaj post ili restis eĉ ne
vundeto.”

Sciemulo, Ĉieestinto kaj Ĉiosciulo ekrigardis sin.

”Al mi ŝajnas,” komencis Sciemulo.

” — ke la ŝtelisto — ” daŭrigis Ĉieestinto.

” — fakte estas magiisto,” findiris Ĉiosciulo.

”Pa, knaboj,” diris plue Sciemulo, ”ni havas lin en kap-
tilo. Ni alkondukis mil soldatojn — ”

” — kaj igis ĉirkaŭi la gastejon,” daŭrigis Ĉieestinto.

” — ke eĉ ne muso fuĝos de ĉi tie,” aldiris Ĉiosciulo.

Tiumomente eksonis ekstere knalo el mil fusiloj, kva-
zaŭ tondro ekbatus.

”Jam li ne plu vivas,” ekkriis ĉiuj detektivoj kvazaŭ
unubuŝe.

La pordo larĝe malfermiĝis kaj en la ĉambbron salten-
iris la komandanto de la soldatoj. ”Obeeme mi rapor-

tas,” li ekparolis, ”ke la gastejon ni ĉirkaŭis. Mi ordonis, ke eĉ ne muso rajtas el la gastejo. Kaj jen, knaboj, tra la pordo elflugis blanka kolombineto kun teneraj okuloj kaj ĉirkaŭflugadis mian kapon.”

”Aĥ,” ekkriis ĉiuj; nur Morney diris ”Well.”

”Per sabro mi dishakis tiun kolombineton,” daŭrigis la komandanto, ”kaj samtempe ĉiuj mil soldatoj pafis je ŝi. La kolombineto dispeciĝis je mil eroj, sed el ĉiu ero fariĝis blanka papilio kaj flirtis for. Obeeme mi raportas, kion nun?”

La okuloj de Sciemulo ekfajreris. ”Bone,” li ordonis, ”vi mobilizos la tutan armeon, la rezervan armeon kaj la landodefendon, kaj igos ilin iri en ĉiujn landojn, por ke ili kaptu la papiliojn.”

Tio vere okazis kaj ni povas anticipi diri, ke el tio estiĝis tre bela papili-kolekto, kiun ankoraŭ nun oni mont-ras en la Nacia Muzeo. Kiu estas en Prago, devas iri ri-gardi ĝin.

Dume Ĉieestinto diris al la ceteraj. ”Knaboj, ĉi tie vi estas neniel utilaj, iel ni interkonsiliĝos jam sen vi.”

Kaj ili estis triste revenantaj kun malplenaj manoj: Sagazzi, Ŝovsin, Morney, Leonov.

Sciemulo, Ĉieestinto kaj Ĉiosciulo longe konsultiĝis, kiel agi kontraŭ la magiisto. Dume ili elfumis kvintalon da tabako, formanĝis kaj eltrinkis ĉion, kio estis riceve-

bla en Straŝnice, sed nenion elpensis. Fine Ĉiosciulo diris: "Knaboj, tiel ne eblas. Ni devas nin iom aerumi."

Ili iris do eksteren, kaj apenaŭ ili venis antaŭ la gastejon, kiun alian ili tie vidis, ol la magiiston mem. Li sidis tie kaj tre scivole rigardis, kion ili faros.

"Jen li," ekkriis ĝoje Sciemulo kaj unusalte kaptis la magiiston je la ŝultro. Sed tiumomente la magiisto ŝanĝiĝis je arĝentbrila serpento, kaj Sciemulo pro ektimo ĵetegis ĝin teren.

Sed tuj estis ĉi tie Ĉieestinto kaj ĵetis sian jakon sur la serpenton. Sed el la serpento iĝis ora muŝeto kaj elglitis tra butontruo en la dian aeron.

Eksaltis Ĉiosciulo kaj kaptis la oran muŝon en ĉapon, sed el la muŝo fariĝis arĝenta rivereto kaj fluis, fluis for ankaŭ kun la ĉapo.

Ili ĉiuj saltis en la gastejon por glasoj, por kapti la rivereton en la glasojn. Sed la arĝenta rivereto jam fuĝis kaj enfluis en Vultavon. Tial ankoraŭ nun Vultavo, se ĝi estas en bona humoro, estas tiel bele arĝenta: ĝi rememoras la magiiston, muĝas enpense kaj briletas, ke eĉ la kapo turniĝas.

Sed dume Ĉieestinto, Ĉiosciulo kaj Sciemulo staris sur la bordo de Vultavo kaj pripensis, kion nun. Tiam arĝenta fiŝo elmergis la kapon el la akvo kaj rigardis ilin per brile nigraj okuloj, vere per la okuloj de la magiisto. Ĉiuj tri detektivoj aĉetis fiŝhokojn kaj komencis fiŝi en Vulta-

vo. Ankoraŭ nun vi povas ilin vidi en ŝipetoj, sidantaj tie tutajn tagojn kun fiŝhoko, ili fiŝas kaj eĉ ne vorton diras, kaj ne atingos la trankvilon, ĝis ili kaptos la arĝentan nigrokulan fiŝon.

Ankoraŭ multaj aliaj detektivoj klopodis kapti la magiiston, sed vane. Okazadis al ili, veturegantaj per aŭto, por kapti lin, ke subite kapreolino eligis la kapon el jun-arbetaro kaj rigardis ilin per la nigraj, teneraj, scivolemaj okuloj; kaj kiam ili flugis per aviadilo, flugis aglo post ilin kaj ne okullasis de ili siajn fierajn, flagrantajn okulojn; kaj kiam ili ŝipveturis, svingleviĝis el la maro delfeno kaj ĝia prudenta, kvieta rigardo fiksatis ilin; ankaŭ kiam ili sidis en siaj laborĉambroj kaj meditis, okazis, ke floroj sur la tablo komencis brili kaj rigardis ilin scivoleme kaj ĉarme, aŭ ilia polica hundo subite levis la kapon kaj turnis al ili la okulojn tiel homajn kaj belajn, kiajn ĝi alie ne havis. Ŝajnis al ili, ke de ĉie rigardas ilin la magiisto, rigardas kaj denove malaperas: kiel ili povus lin kapti?

4

**KIEL LA GLORA SIDNEY HALL KAPTIS LA
MAGIISTON**

Ĉion ĉi legis en ĵurnalo la glora Sidney Hall, amerika detektivo, li enpenŝiĝis profunde kaj decidis mem provi kapti la magiiston. Li do alivestis sin je milionulo, enpoŝigis revolveron kaj veturis en Eŭropon.

Kiam li ĉi tien venis, li tuj prezentis sin al la polica prezidanto. Tiu ĉion klarigis al li, kiel ili ĉasis la magiiston, kaj finis: "Laŭ ĉio ĉi estas jam tute neeble starigi la krimulon antaŭ la tribunalon."

Sidney Hall ekridetis: "Antaŭ ol pasos kvardek tagoj mi alkondukos lin al vi arestitan."

"Neeble," ekkriis la prezidanto.

"Ni vetu je plado da piroj," diris Sidney Hall. Sidney Hall nome treege ŝate manĝis pirojn kaj same ŝate vetadis.

"Interkonsentite," ekkriis la prezidanto. "Kaj kiel, mi petas, vi faros tion?"

"Unue tiel," diris Sidney Hall, "ke mi devos fari voja-

ĝon ĉirkaŭ la tutan mondon. Sed por tio mi bezonus multege da mono.”

Donis do al li la prezidanto multege da mono, kaj por ŝajni saĝa, li diris: ”Aha, jam mi antaŭvidas vian planon. Sed ni devas sekretigi la aferon, por ke la magiisto ne sciiĝu, ke ni ĉasas lin.”

”Male,” diris la detektivo, ”tuj morgaŭ anoncu en ĉiuj ĵurnaloj de la mondo, ke la glora Sidney Hall devontigis sin kapti la magiiston en kvardek tagoj. Dume mi havas la honoron adiaŭi.”

Poste sinjoro Sidney Hall iris rekte al fama vojaĝisto, kiu jam faris vojaĝon ĉirkaŭ la mondon dum kvindek tagoj, kaj diris: ”Ni vetu, ke mi faros la vojaĝon ĉirkaŭ la mondon en kvardek tagoj.”

”Neeble,” diris la vojaĝisto. ”Sinjoro Foks faris la vojaĝon ĉirkaŭ la mondon en okdek tagoj, mi mem dum kvindek tagoj, kaj pli rapide ne eblas.”

”Ni vetu,” post tio Sidney Hall, ”je mil dolaroj, ke mi faros tion.”

Ili do vetis.

Ankoraŭ la saman nokton Sidney Hall forvojaĝiis. Post semajno venis de li telegramo el Aleksandrio en Egiptio: ”Mi sekvas la spuron. Sidney Hall.”

Post sep tagoj denove alflugis telegramo el Bombajo en Hindio: ”La maŝoj kuntiriĝas. Ĉio bonege funkcias. Letero sekvas. Sidney Hall.”

Iom pli poste venis letero el Bombajo, sed ĝi estis skribita per sekreta skribo, kiun neniu komprenis.

Post pluaj ok tagoj alflugis el Nagasako en Japanio kurier-kolombo kun papereto sur la gorĝeto, kie estis skribite: "Mi proksimiĝas al la celo. Atendu min. Sidney Hall."

Poste venis depeŝo el San-Francisko en Ameriko: "Mi havas rinton. Alie ĉio en ordo. Preparu la pirojn. Sidney Hall."

La tridek-naŭan tagon post la forveturo venis fine telegramo el Amsterdamo en Nederlando: "Mi alveturos morgaŭ vespere je la 7-a dek kvin minutoj. Preparu la pirojn. Plej ŝate dolĉpirojn. Sidney Hall."

La kvardekan tagon je la sepa kaj dek kvin minutoj vespere albruis trajno en stacidomon. El la trajno elsaltis sinjoro Sidney Hall kaj post li elvagoniĝis la magiisto, serioza, pala kaj kun mallevitaj okuloj. Ĉiuj detektivoj atendis en la stacidomo kaj ege miris, ke la magiisto tute ne estas katenita. Sed Sidney Hall nur mangestis al ili kaj diris: "Atendu min, knaboj, hodiaŭ vespere en la gastejo 'Ĉe la Blua Hundo'. Nur mi devas konduki ĉi tiun sinjoron en karceron." Poste li endroŝkiĝis ankaŭ kun la magiisto, sed ankoraŭ li rememoris kaj vokis el la veturilo: "Kaj la pirojn alportu al mi tien!"

Vespere do atendis plado da belegaj piroj, ĉirkaŭita de ĉiuj detektivoj, sinjoron Sidney Hall. Jam ĉiuj opiniis, ke

li ne venos, kiam malfermiĝis la gasteja pordo kaj eniris oldega, kaduka maljunuleto, kiu vendadis en gastejoj fiŝetojn kaj kukumojn.

”Avo,” diris al li la detektivoj, ”verŝajne nenion ni aĉetos.”

”Kia domaĝo,” diris la maljunuleto, kaj subite li komencis tuta tremi kaj tremegi, li stertoris, tusetis, estis sufokiĝanta kaj sinkis senspire sur seĝon.

”Miadio,” ekkriis iu detektivo, ”eble li mortis ĉi tie.”

”Ne,” sufoktusis la maljunuleto kaj tordiĝis, ”tion ne plu mi eltenos!” Kaj jen ĉiuj vidis, ke la maljunuleto fakte tiel treege ridas kaj ne povas ĉesi. Liaj larmoj fluis, lia voĉo modulis, la vangoj bluiĝis, kaj jam nur li ĝemis: ”Infanoj, infanoj, tion mi ne eltenos!”

”Aveto,” diris la detektivo, ”kion vi volas ĉi tie?”

Tiam la aveto ekstaris, ŝanceliris al la tablo, elektis el la plado la plej belan piron, senŝeligis ĝin kaj per unufojo formanĝis. Nur poste li deŝiris la falsan barbon, falsan nazon, falsajn grizharojn kaj blujajn okulvitrojn kaj montris glate razitan, ridetantan vizaĝon de Sidney Hall.

”Knaboj,” diris Sidney Hall senkulpige, ”ne koleru je mi; sed dum la tutaj kvardek tagoj mi devis subpremaĉi la ridon.”

”Kiam vi kaptis la magiiston?” demandis la detektivoj unuvoĉe.

”Nur hieraŭ,” diris la glora Sidney Hall; ”sed jam tuj de la komenco mi emis ridi, kiel mi superruzos lin.”

”Kaj kiel,” insistis la detektivoj, ”ni petas, vi kaptis lin?”

”Nu,” diris Sidney Hall, ”estas longa historio. Mi, knaboj, diros ĝin al vi, nur kiam mi formanĝos ankoraŭ ĉi tiun piron.”

Kaj manĝinte ĝin, li komencis proksimume jene: ”Aŭskultu, kolegoj, antaŭ ĉio kaj ĉefe al vi mi diras tion, ke ĝusta detektivo ne rajtas esti azeno.” Ĉe tio li ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ eble li povus trovi iun azenon inter la ĉeestantoj.

”Kaj kio plue?” demandis la detektivoj.

”Kio plue?” diris Sidney Hall. ”Due, li devas esti ruzeĝa. Kaj trie,” li daŭrigis, senŝeligante al si pluan piron, ”li devas esti iom vulpulo. Eble vi scias, kiel oni kaptas muson?”

”Per lardo,” diris la detektivoj.

”Kaj ĉu vi scias, per kio oni kaptas fiŝon?”

”Per vermo aŭ lumbriko.”

”Kaj ĉu vi scias, per kio oni kaptas magiiston?”

”Ni ne scias.”

”Magiisto,” diris klerige Sidney Hall, ”estas kaptata kiel ĉiu alia homo; nome per la propra malforteco. Unue oni devas trovi, kiun malfortecon li havas. Kaj ĉu vi scias, knaboj, kiun malfortecon havis la magiisto?”

”Ni ne scias.”

”Scivolemon,” deklaris sinjoro Sidney Hall. ”Ĉion sciopovis la magiisto, sed li estis scivolema. Ege scivolema. Sed nun mi devas formangî ĉi tiun piron.”

Kaj manĝinte ĝin, li daŭrigis: ”Vi ĉiuj opiniis, ke vi persekutas la magiiston. Sed dume la magiisto persekutis vin. Li sekvis vin kaj ne okullasis vin. Li estis ege scivolema kaj volis ĉion vidi, kion vi entreprenas kontraŭ li. Senĉese li turniĝis post vin, kiam vi ĉasis lin. Kaj surbaze de lia scivolemo mi konstruis mian planon.”

”Kiun planon?” kriis la detektivoj avide.

”Nu, tian. La vojaĝo ĉirkaŭ la mondon, tio estis, knaboj, nur amuz-ekskurso. Jam delonge mi volis fari vojaĝon ĉirkaŭ la mondon. Sed iel mi ne havis okazon. Sed veninte ĉi tien, tuj mi sciis, ke la magiisto senĉese postsekvos min, por vidi, kiel mi ĉasos lin. Tia estas lia scivolemo. Nu, kio, mi diris al mi, mi tiros lin post min ĉirkaŭ la mondon; ĉe tio mi mem ion vidos kaj lin mi ne okullasos. Nome li ne okullasos min. Kaj por ke lia scivolemo estu ankoraŭ pli granda, mi vetis, ke tion mi plenumos en kvardek tagoj. Sed nun mi formangos ĉi tiun belan piron.”

Kaj manĝinte ĝin, li diris: ”Nenio superas la pirojn. Do mi prenis revolveron kaj monon, alivestis min je sveda komercisto kaj ekvojaĝis. Unue al Genovo; vi scias, knaboj, tio estas en Italio, kaj veturante tien, oni vidas la

tutajn Alpojn. Estas treega alteco, la Alpoj; kiam de la supro de la Alpoj derompiĝas ŝtono, ĝi falas malsupren tiel longe, ke antaŭ ol ĝi finfalas, ĝi tute muskokovriĝas. Kaj el Genovo poste mi volis ŝipi en Aleksandrion en Egiptio.

Genovo estas tre bela haveno, tiel bela, ke tien ĉiu ŝipo mem kuras jam de malproksime. Cent mejlojn antaŭ Genovo oni ĉesas hejti en vaporŝipoj, la radoj ne turniĝas kaj la veloj estas malhisataj, sed la ŝipo tiel ĝojas je Genovo, ke tien ĝi alvenas de si mem.

Mia ŝipo estis veturonta je la kvara posttagmeze akurate. Je la tria kvindek minutoj mi kuras al la haveno, sed survoje mi vidas plorantan etan knabinjon.

'Etulino,' mi diras al ŝi, 'kial vi ploras?'

'Bee,' ploras la etulino, 'mi peldiĝis.'

'Se vi perdiĝis,' mi diras, 'do serĉu vin.'

'Sed mi peldis mian panjon,' beas la etulino, 'kaj mi ne scias, kie ŝi estas.'

'Tio do estas io alia,' mi diras, prenas la knabinjon je la mano kaj serĉas ŝian panjon. Buboĵ, horon mi estis trakuranta la tutan Genovon, antaŭ ol mi trovis la panjon. Sed kion nun? Estis la kvara kvindek minutoj. Mia ŝipo estis jam delonge forveturinta. Pro la etulino, mi pensis, mi preterlasis la tutan tagon. Negaje mi iris en la havenon, kaj jen, mi rigardas, la ŝipo tie ankoraŭ haltas. Mi rapidas en ĝin. 'Nu, Svedulo,' diras al mi kapitano de

la ŝipo, 'vi ne ŝparis la tempon. Delonge jam ni estus fornavigintaj, se la ankro ne implikiĝus iel strange sur fundo, tiel ke tutan horon ni ne povis ĝin eltiri.' Mi, kompreneble, ĝojis pri tio. Sed nun eble mi povus manĝi piron."

Kaj finmanĝinte ĝin, li diris: "Estis hometo, ege bona. Do ni ekŝipis sur la Mediteraneo. Ĝi estas tiel bele blua, ke oni ne scias, kie estas la firmamento kaj kie la maro. Tial ĉie sur la ŝipoj kaj sur la bordo estas tabuletoj, kaj sur ili estas skribite, kie estas supre kaj kie estas sube. Alie oni tion konfuzus. Jes, antaŭ nelonge, rakontis al ni la kapitano, iu ŝipo eraris kaj anstataŭ sur la maro ĝi ekis sur la ĉielo; kaj ĉar la ĉielo estas senfina, ĝis nun ĝi ne revenis kaj neniu scias, kie ĝi estas. Kaj sur tiu maro ni alveturis en Aleksandriion. Aleksandriio estas urbo granda, ĉar ĝi estis fondita de Aleksandro la Granda.

El Aleksandriio mi forsendis telegramon, por ke la magiisto opiniu, ke mi zorgas pri li. Sed neniel mi zorgis pri li, nur ĉie mi antaŭsentis lin. Kiam laroj aŭ kormoranoj ĉirkaŭflugadis la ŝipon aŭ albatroso en la foro traadis per sia rapidaflugilo la firmamenton, mi sciis, ke eble inter ili estas la magiisto, kiu akompanas min. Kiam fiŝeto fiksas la okulojn je mi el la marprofundo, mi sentis, ke eble li rigardas min per siaj okuloj. Kaj kiam hirundoj transflugante la maron malsupreniĝis sur vel-

stangojn de nia ŝipo, mi estis preskaŭ certa, ke tiu blanka inter ili, tiu plej bela el ĉiuj, estis li.

Kaj estante jam en Aleksandrio, mi veturis sur la sankta rivero Nilo malsupren al Kairo. Ĝi estas urbo tiel granda, ke ĝi mem en si ne orientiĝus, se oni ne estus konstruinta tie grandajn moskeojn kaj minaretojn. Ili estas videblaj de tia distanco, ke eĉ la plej foraj dometoj orientiĝas laŭ ili.

Apud Kairo mi iris baniĝi en Nilo, ĉar tie estas ega varmo. Mi surhavis nur bankalsonon kaj revolveron, kaj la ceteran vestaĵon mi lasis sur la bordo. Tiam elrampis sur la bordon grandega krokodilo kaj formanĝis mian vestaĵon kun ĉio, ankaŭ kun horloĝo kaj mono. Mi iris do kontraŭ ĝin kaj pafis sesfoje el la revolvero. Sed la kugloj repuŝiĝis de ĝia karapaco, kvazaŭ ĝi estus el ŝtalo. Kaj la krokodilo laŭte min mokis. Sed nun mi manĝos piron.”

Estinte preta kun la piro, sinjoro Sidney Hall daŭrigis sian rakontadon. ”Vi scias, bando, ke ĉiu krokodilo scias plori kaj krii kiel bebo. Per tio ĝi logas homojn en akvon. Oni opinias, ke tie dronas infano, kaj kuras lin helpi, kaj tiam krokodilo onin kaptas kaj forvoras. Sed ĉi tiu krokodilo estis tiel maljuna kaj saĝa, ke ĝi lernis ne nur plori kiel infano, sed ankaŭ insulti kiel maristo, kanti kiel operkantistino kaj entute paroli kiel homo. Eĉ ĝi akceptis onidire la mahometanan konfesion.

Sed al mi estis iom angore. Kion mi faru sen la vestaĵo kaj mono? Tiam, subite neatendite staris apud mi nigra arabo kaj diris al la monstro: 'Ci, krokodilo, ci forvoris la vestaĵon kaj la horloĝon?'

'Forvoris,' diris la krokodilo.

'Ci malsaĝulo,' diris la arabo, 'la horloĝo ja ne estis streĉita. Por kio utilos horloĝo al ci, se ĝi ne funkcias?'

La krokodilo tempeton meditis, kaj poste diris al mi: 'Jen, iomete mi malfermos la buŝon; palpu en mia stomako, eligu la horloĝon, streĉu ĝin kaj denove remetu ĝin.'

'Nu, kial ne,' mi diris, 'mi farus tion, sed ci formordus mian manon. Sciu, mi metos perpendikle inter ciajn makzelojn ĉi tiun bastonon, por ke ci ne povu fermi cian malbelegan faŭkon.'

'Mi ne havas malbelegan faŭkon,' diris la krokodilo. 'Sed se vi ne volas alie, enpuŝu la bastonon inter miajn honorindajn makzelojn kaj faru rapide.'

Memkomprene, mi faris tion, eltiris el ĝia stomako ne nur la horloĝon, sed ankaŭ mian vestaĵon, ŝuojn kaj ĉapelon, kaj diris: 'La bastonon, ci oldulo, nun mi lasos en cia buŝo rememore.' La krokodilo volis insulti, sed ne povis, ĉar ĝi havis la faŭkon plenlarĝe kaj en ĝi subapoge la bastonon; ĝi volis ĝin vori kaj ne povis; ĝi volis peti kaj ne povis. Trankvile mi vestis min kaj diris al ĝi: 'Kaj sciu,

ci havas malbelegan, antipatian, malsaĝan faŭkon,' kaj mi kraĉis en ĝin. Tiam la krokodilo pro furiozo eklarmis.

Kiam mi rerigardis la arabon, kiu tiel sagace helpis min, li estis for. Kaj la krokodilo ĝis nun naĝas sur Nilo kun la plenlarĝa faŭko.

El Aleksandrio mi navigis al Bombajo, alivestita je hinda raĝo aŭ princo. Knaboj, kiel tio plaĉigis min! Unue ni navigis sur la Ruĝa Maro. Ĝi nomiĝas tial, ĉar senĉese ĝi hontas, ke ĝi ne estas pli granda. Kiam ankoraŭ ĉiuj maroj estis junaj kaj malgrandaj kaj estis ankoraŭ kreskontaj, la Ruĝa Maro ludis sur la bordo kun arabaj infanoj kaj dume la tempo tiom pasis al ĝi, ke ĝi forgesis kreski, kvankam la disinjoro preparis al ĝi ĉie ĉirkaŭe sur la dezertoj belan sablon, el kiu ĝi faru al si fundon. Nur lastmomente ĝi rememoris tion, se ĝi povis kreski nur laŭlonge, kaj krome lasis sekan terstrion inter si kaj Mediteraneo, kun kiu ĝi estis kuniĝonta. Pro tio ĝi tiel ĉagreniĝis, ke la homoj kompatis ĝin kaj kunigis ambaŭ marojn per kanalo. Ekde tiu tempo la Ruĝa Maro ne tiel ruĝiĝas.

Kiam ni jam trapasis ĝin, foje mi dormis en mia kajuto. Subite iu frapas mian pordon. Mi iras malfermi — en la koridoro neniu. Momenton mi atendas, kaj jen mi aŭdas, ke al mia kajuto proksimiĝas du maatoj. 'Ni mortigos la raĝon,' flustras unu, 'kaj forprenos de li la perlojn kaj diamantojn, kiujn li surhavas sur la vesto.' Je mia

animo, knaboj, ĉiuj miaj perloj kaj diamantoj estis vitraj. 'Atendu ĉi tie,' flustras la alia maato, 'mi forgesis la tranĉilon supre.' Dum li kuris por la tranĉilo, mi ekkaptis la duan maaton je la gorgo, ŝtopis lian buŝon, vestis lin kiel raĝon kaj katenitan metis sur mian liton. Poste mi surprenis lian veston kaj stariĝis sur lia loko antaŭ la pordo. Kiam venis la alia kun la tranĉilo, mi diris al li: 'La raĝon ne plu mortigu, mi strangolis lin; sed iru kaj forprenu de li la perlojn kaj diamantojn, dume mi atentos ĉi tie.' Apenaŭ la dua eniĝis en mian kajuton, tuj mi ŝlasis lin kaj iris al la kapitano. 'Kapitano,' mi diris, 'mi ricevis strangan viziton.' — Kiam la kapitano vidis, kio okazis, li skurĝigis ambaŭ maatojn; sed mi kunvenigis ĉiujn ceterajn, montris al ili miajn perlojn kaj diamantojn kaj diris: 'Vidu, infanoj kaj latronoj, kiel malmulte gravas por saĝulo perloj kaj diamantoj, do plaŭd!' Kaj mi ĵetis ĉiujn miajn vitrajn juvelojn en la maron. Tiam ĉiuj komencis riverenci al mi kaj vokis: 'Ho, saĝa estas la raĝo kaj la majesta!'

Sed kiu frapis mian kajuton kaj savis mian vivon, tion ĝis nun mi ne scias. Kaj nun mi formanĝos ĉi tiun belan, grandan piron."

Ankoraŭ li ne finmanĝis ĝin, kaj jam plu plenbuŝe li parolis: "Tiel feliĉe ni alnavigis Bombajon en Hindio. Hindio, knaboj, estas lando granda kaj kurioza. Oni povas diri, tie estas tiel varmege, ke ankaŭ la akvo estas

tie tute seka kaj devas esti priverŝata, por ne elvaporigi. La arbaroj tie estas tiel densaj, ke en ili estas loko eĉ ne por arboj, kaj tion oni nomas praarbaro. Kiam pluvas, ĉio ege kreskas; ankaŭ tutaj preĝejoj kreskas el la tero, kiel ĉe ni fungoj, kaj tial ekzemple en Banaraso estas tiom da preĝejoj. Kaj da simioj estas tie, kiom ĉe ni pasejoj, kaj estas tiel mildaj, ke ili enrampas eĉ en ĉambbron. Iam oni matene vekigis kaj trovas en sia lito anstataŭ sin mem simion. Tiel mildaj estas la bestaĉoj. Kaj la serpentoj tie estas tiel longaj, ke kiam ia serpento rerigardas sian voston, ĝi eĉ ne ekkonas, ke ĝi estas ĝia propra, kaj opinias, ke ĝin ĉasas iu serpento ankoraŭ pli granda ol ĝi mem estas; tiam ĝi fuĝas antaŭ ĝi kaj mizere pereas pro mortlaciĝo. Kaj ankoraŭ tute mi ne rakontas al vi pri elefantoj, kiuj tie hejmas. Entute, knaboj, Hindio estas lando granda.

El Bombajo mi sendis telegramon kaj poste la leteron en sekreta skribo, por ke la magiisto opiniu, ke dioscias, kion mi kaŝintencas.”

”Kio estis skribite en la letero?” demandis la detektivoj.

”Mi,” rapidis fanfaroni iu detektivo, ”duone mi solvis tiun vian leteron.”

”Vi estas do pli saĝa ol mi,” diris post tio la glora Sidney Hall, ”ĉar mi mem ne povus ĝin deĉifri. Tio estis nur zigzagoj aspektantaj kiel sekreta skribo. Poste el Bom-

bajo mi trajnis en Kalikaton. En Hindio estas en la trajnoj bankuvoj anstataŭ sidiloj, por ke ne estu al oni tiel varme. Ni veturis tra dezertoj kaj arbaregoj. En densejoj mi vidis brili terurajn tigro-okulojn kaj en rivervadejoj mi renkontiĝis kun la saĝa rigardo de majestaj okuloj de blanka elefanto. Reĝa aglo devancadis nian trajnon kaj iriza papilio flirtis ĉe trajnfenestroj. En ĉio ĉi, knaboj, mi sentis la proksimecon de la magiisto.

Apud Kalikato ni proksimiĝis al la sankta Gango. Ĝi estas rivero tiel larĝa, ke kiam vi ĵetas ŝtonon al la alia bordo, la ŝtono flugas horon kaj duonon. Ĝuste kiam ni veturis sur la bordo, iu virino estis tie lavanta lavotaĵon. Eble ŝi tro kliniĝis, mallonge, ŝi falis en la akvon kaj estis dronanta. Tuj mi saltis el la veturanta trajno kaj eltiris la hindan mallertulinon sur la bordon. Mi opinias, knaboj, ke tion farus ĉiu el vi.”

La detektivoj konsente ekmurmuretis.

”Nu jes,” daŭrigis Sidney Hall, ”mi ne mensogu, en ĉio mi ne tiel malkare sukcesis. Kiam mi estis trenanta la virinon en la akvo, proksimiĝis al mi mavulo aligato kaj terure mordvundis mian manon. La virinon mi surbordigis, sed mi mem svenis sur la tero. Kvar tagojn fleĝis min hindaj maljunulinoj, kaj — unuvorte — jen memore mi havas oran ringon. Koncize, buboj, homoj scias esti dankemaj ĉie en la mondo, eĉ se ili estas nigraj pa-

ganoj, kaj ia nudulo en Hindio neniel estas pli malbona homo ol iu el ni, kaj fino kaj halt’.

Sed kion fari, kvin tagojn mi perdis. Kaj kun ili mi perdis ankaŭ mian veton. Mi sidis sur la bordo kaj pensis: Mi ne plu sukcesos fari tion en kvardek tagoj. Mildolara veto estas en la infero. Kaj la plado da piroj ankaŭ en la infero. Kaj dum mi tiel meditas, alnaĝis tien io, nu, ĵonko oni tion nomas, tia malsaĝa ŝipeto kun veloj el bastmatoj. Kaj sur ĝi tri brunaj histrionoj, malajoj, kaj ridrikanas je mi, kvazaŭ mi estus manĝebla. ’Nia nania pĥe ĥem agasaki,’ hastparolas al mi unu el ili. ’Aĥ, ci pulĉinelo,’ mi diras, ’kiel mi komprenu cin?’ ’Nia nania pĥe ĥem Nagasaki,’ plu li klakparolas kaj ridas je mi laŭ maniero, pri kiu li eble opinias, ke ĝi estas ĉarma. Sed ’Nagasaki’ mi komprenis. Ĝi estas haveno en Japanio, ĝuste tien mi volis navigi. ’Ĉu al Nagasako,’ mi diras, ’en tia barelaĉo? Neniel.’ ’Nai,’ li rediris, kaj hastparolas ankoraŭ ion, montras sian ĵonkon, la ĉielon, sian koron, kaj mallonge, ke mi navigu kun li. ’Eĉ ne por plado da piroj,’ mi diras. Sed tiam la tri brunaj satanoj saltis sur min, terenfaligis min, enpakis en la matojn kaj ĵetis min en sian ĵonkon kiel paketon. Kion dume mi pensis, ne estis tro bela, sed fine en la matoj mi ekdormis. Kiam mi vekigis, mi ne estis en la ĵonko, sed sur marbordo, super la kapo anstataŭ la suno granda krizantemo, kaj la arboj ĉirkaŭ mi estis bele lakitaj, ĉiu sablero sur la bordo pure lavita

kaj glatigita, kaj laŭ la pureco mi ekkonis, ke mi estas en Japanio. Kaj renkontinte la unuan harplektulon, flavan uleton, mi demandis lin: 'Kie ja, civitano, mi povas esti?' Kaj ridante li diras 'Nagasako'."

"Knaboj," daŭrigis sinjoro Sidney Hall enpense, "oni-dire mi ne estas malsaĝa. Sed por kompreni, kiel en la mizera ĵonko mi atingis dumnokte el Kalikato Nagasakon, kiam la plej rapida ŝipo faras tion en dek tagoj — je tio, pardonu, mi estas iom malsaĝa. Sed nun mi manĝos ĉi tiun piron."

Senŝeliginte ĝin zorgeme kaj formanĝinte, li pluparolis: "Japanio estas lando granda kaj aparta, kaj la popolo estas tie gaja kaj lerta. Ili scias fari el porcelano tiel maldikajn te-pokaletojn, ke por ili oni ne plu bezonas porcelanon, oni prenas nur la polekson, cirkloturnas ĝin en la aero, poste sur la supraĵo oni tion bele pentras, kaj la pokaleta estas preta. Se mi dirus al vi, kiel japanoj scias pentri, tute vi ne kredus tion al mi. Mi vidis iun pentriston, el kies mano la peniko elfalis sur blankan paperon; kaj dum la peniko ruliĝis sur la papero, ĝi pentris pejzaĝon kun dometoj kaj arboj, homojn sur strato kaj sur la ĉielo sovaĝajn anserojn. Kiam mi miris pri tio, tiu pentristo diris al mi: 'Nenio kompare al tio, kion scipovis mia mortinta instruisto. Foje dum pluvo li kotmalpurigis siajn respektindajn babuŝojn. Kiam la koto iom sekiĝis, li montris ilin al ni: sur unu babuŝo estis per koto

pentrite, kiel hundoj kaj ĉasistoj ĉasas leporon, kaj sur la dua, kiel infanoj ludas je lernejo kaj instruisto.'

El Nagasako mi navigis per vaporŝipo al San-Francisko en Ameriko. Dumvoje okazis nenio aparta, nur nia vaporŝipo en tempesto vrakiĝis kaj estis dronanta. Ni ĉiuj rapide elsaltis en la savboatojn, sed kiam ili estis jam plenplenaj, du maristoj en la dronanta ŝipo vokis: 'Ĉi tie estas ankoraŭ unu sinjorineto. Ĉu vi havas iom da loko por ŝi en la boato?' 'Ni ne havas,' kriis kelkaj; sed mi ekkriis: 'Ej, ni havas, nur donu ŝin ĉi tien!' Tiam oni ĵetis min en la akvon, por fari al ŝi lokon en la boato. Nu, knaboj, ne tro mi defendis min; sinjorino, mi opiniis, ĉiam havas preferon. Kiam la ŝipo dronis kaj la boatoj fornaĝis, mi estis tutsola sur la vasta maro. Mi eksidis sur iu trabo kaj balanciĝis sur la ondoj; alie ĝi estus tre bela, krom la granda malseko. Tiel mi naĝis tagon kaj nokton, kaj jam ŝajnis al mi, ke ĉio malbone finiĝos. Sed jen alnaĝis al mi ladskatolo kaj en ĝi estis raketoj.

'Kion per la raketoj?' unue mi pensis, 'pirojn mi pli ŝatus.' Sed poste mi divenis ion pli bonan. Kiam venis la nigrenigra nokto, mi bruligis la unuan raketon. Ĝi flugis eltegen kaj brilis kiel meteoro. La dua raketo estis stelforma kaj la tria sunforma; la kvara estis kantanta kaj la kvina flugis tiel alten, ke ĝi implikiĝis inter la stelojn kaj brilas tie ĝis nun. Dum mi tiel amuziĝis, alveturis granda ŝipo kaj prenis min sur la ferdekon. 'Hometo,' diris al

mi kapitano, 'se ne estus la raketoj, vi dronus ĉi tie. Sed ĉar ni vidis el distanco de dek mejloj brili la raketojn, ni opiniis, ke iu vokas nin por helpo.' Kaj je rememoro de la brava kapitano mi manĝos ĉi tiun piron."

Kaj manĝinte ĝin, li parolis plu gaje: "En San-Francisko mi surpaŝis do sur la amerikan teron. Ameriko, knaboj, estas mia patrio kaj — mallonge — Ameriko estas Ameriko. Se mi rakontus ion pri ĝi, certe vi ne kredus tion al mi; tiel granda kaj aparta lando ĝi estas. Mi nur diras, ke mi ekvojaĝis per Granda Pacifika Fervojo kaj veturis al Novjorko. Tie estas domoj tiel altaj, ke oni ne plu povas ilin finkonstrui. Antaŭ ol la masonistoj kaj tegmentistoj per eskalo atingas la supron, estas jam tagmezo; do supre ili manĝas tagmanĝon, kiun ili kunprenis, kaj descendas malsupren, por veni vespere en liton, kaj tiel sekvas tagon post tago. Entute, nenio superas Amerikon; kaj al kiu ne plaĉas lia patrio tiel kiel al mi Ameriko, tiu estas olda azeno.

Kaj el Ameriko mi navigis per ŝipo al Amsterdamo en Nederlando. Dumvoje — dumvoje — nu dumvoje okazis al mi tio plej bela kaj plej amuza. Jen, knaboj, jen la ĉefa amuzaĵo el la tuta mia ekspedicio."

"Kio do?" kriis avide la detektivoj.

"Nu tio," diris sinjoro Sidney Hall kaj ekruĝis, "ke mi fianĉiĝis. Vojaĝis per la ŝipo ia virinjo, nu sufiĉe bela, mallonge ŝi nomiĝas Alica, kaj neniu en la mondo, an-

kaŭ neniu el vi, estas pli bela ol ŝi. — Ne, certe ne,” aldiris sinjoro Sidney Hall post profunda meditado. ”Sed ne opiniu, ke mi diris al ŝi, kiel ege ŝi plaĉis al mi. Estis jam la lasta tago de nia vojaĝo kaj ankoraŭ mi nenion diris al ŝi. Kaj nun mi manĝos ĉi tiun piron.”

Manĝinte ĝin kun la konvena apetito, sinjoro Sidney Hall daŭrigis kiel sekvas: ”Do tiun lastan vesperon mi promenis sur la ferdeko kaj subite fraŭlino Alica venis mem al mi. ’Sinjoro Sidney Hall,’ diris ŝi, ’ĉu vi estis iam en Genovo?’ ’Jes, fraŭlino,’ mi diris. ’Kaj ĉu vi vidis tie iun knabinjon, kiu perdis la panjon?’ demandis Alica. ’Nu, fraŭlino,’ mi diris, ’mi vidis; kondukis ŝin iu stulta oldulo.’

Alica momenton silentis, kaj poste diris: ’Kaj ĉu vi estis, sinjoro Sideny Hall, ankaŭ en Hindio?’ ’Jes, fraŭlino,’ mi diris. ’Kaj ĉu vi vidis,’ diris ŝi, ’kiel iu brava knabo saltis el veturanta trajno en riveron Gango, por savi dronantan lavistinon?’ ’Mi rigardis tion,’ mi diris iel en embaraso, ’li estis iu olda frenezulo, fraŭlino; prudenta homo tion verŝajne ne farus.’

Alica momenton silentis, kaj iel tiel strange, iel dolĉe rigardis en miajn okulojn. ’Kaj sinjoro Hall,’ denove ŝi diris, ’ĉu estas vero, ke iu nobla homo sur la maro oferis sin, por enboatigi dronantan sinjorinon?’ Al mi, knaboj, estis jam varme el tio. ’Nu, fraŭlino,’ mi diris, ’se mi

ne tro eraras, do iu olda malprudentulo antaŭ nelonge baniĝis en la maro.'

Alica aletendis al mi ambaŭ manojn, ruĝiĝis kaj diris: 'Ĉu vi scias, sinjoro Sidney Hall, ke vi estas ege bona homo? Kaj por tio, kion vi faris por la genova knabinjo, hinda lavistino kaj nekonata sinjorino, ĉiu devas vin ŝati.'

Tiam, knaboj, la disinjoro mem puŝis min en mian dorson, por ke mi ĉirkaŭbraku Alican. Kaj kiam ni tiel gefianĉiĝis, mi diris: 'Aŭdu, Alica, kiu rakontis al vi pri mi ĉiujn ĉi malsaĝaĵojn? Mi, Dio scias, al neniu fanfaronis pri tio.'

'Sciu,' diris Alica al mi, 'hodiaŭ vespere mi rigardis la vastan maron kaj iom mi pensis pri vi. Tiam venis al mi iu eta nigra sinjorino kaj ĉion ĉi rakontis al mi pri vi.' Ni serĉis poste la nigran sinjorinon, por dankis al ŝi, sed ni ne povis ŝin trovi. Kaj tiel, knaboj, mi fianĉiĝis sur la ŝipo," finis sinjoro Sidney Hall kaj viŝis siajn brilantajn okulojn.

"Kaj la magiisto?" kriis la detektivoj.

"La magiisto?" ripetis la glora Sidney Hall. "Tiu iĝis viktimo de la propra scivolemo, kiel mi antaŭvidis. Kiam mi tranoktis en Amsterdamo, subite iu frapis mian ĉambron kaj eniris. Estis la magiisto mem, pala kaj maltranquilla. 'Sinjoro Sidney Hall,' li diris, 'tion mi ne plu eltenos; diru al mi, mi petas vin, kiel vi volas min kapti.'

'Sinjoro magiisto,' mi rediris serioze, 'tion mi ne diros al vi. Se mi dirus tion al vi, mi malkaŝus mian planon, kaj vi eskapus al mi.'

'Aĥ,' lamentis la magiisto, 'kompatu jam: Mi ne plu povas dormi pro nura scivolemo, kio estas via plano.'

'Sciu do,' mi diris al li, 'mi diros do ĝin al vi; sed unue vi devas ĵuri al mi, ke ekde ĉi tiu momento vi estas mia kaptito, kaj ke vi ne provos eskapi al mi.'

'Mi ĵuras,' ekriis la magiisto.

'Magiisto,' mi diris leviĝante, 'ekde ĉi tiu momento plenumiĝis mia plano. Sciu do, ci olda longorela stultulo, ke mi kalkulis nur kun cia scivolemo. Mi sciis, ke ci estas post mia dorso sur la maro kaj firmaĵo, por vidi, kion mi entreprenos kontraŭ ci. Mi sciis, ke fine ci venos al mi, kiel ĵus ci venis, kaj prefere perdos cian liberecon, nur por kontentigi cian scivolon. Kaj ĵus ĝi plenumiĝis!'

La magiisto paliĝis, morniĝis kaj diris: 'Vi estas, sinjoro Sidney Hall, granda fripono; eĉ magiiston vi super-ruzis.' Kaj jen, knaboj, mia tuta historio."

Kiam Sidney Hall tiel finparolis, ĉiuj detektivoj komencis treege ridi kaj gratulis al la feliĉa amerikano pro lia sukceso. Sinjro Sidney Hall kontente ridetis kaj estis elektanta sur la plado belan piron. Subite li trafis piron enpakitan en papero. Kaj li dispakis la paperon kaj sur ĝi trovis skribite:

"Rememore al sinjoro Hall de la genova etuleto."

Sinjoro Sidney Hall rapidis palpi en la pladon, trovis duan enpakitan piron, dispakis la paperon kaj trovis sur ĝi skribite:

”Bonan apetiton deziras la lavistino de la rivero Gango.”

Ankaŭ trian piron malpakis sinjoro Sidney Hall kaj legis:

”Al sia nobla savinto dankas la sinjorino el la maro.”

Kvaran fojon palpis sinjoro Sidney Hall en la pladon, dispakis la kvaran piron kaj legis:

”Mi rememoras vin. Alica.”

En la plado restis kvina, la plej bela piro. Sinjoro Sidney Hall ĝin distranĉis kaj trovis interne falditan leteron. Sur la koverto estis skribite: Al sinjoro Sidney Hall.” Rapide Hall malfermis la leteron kaj legis:

”Homo, havanta sekreton, gardu sin antaŭ febro. La vundita detektivo sur la bordo de Gango elbabilis en la febra dormo sian sekretan planon. Ĝi estis plano de olda longorela stultulo. Via amiko ne volis vin senigi de la rekompenco, kiu estas fiksita je lia kapo, kaj tial memvole igis sin aresti. La rekompenco, kiun vi por tio ricevos, estas lia edziĝodonaco al vi.”

Sinjoro Sidney Hall ege ekmiregis kaj diris: ”Knaboj, nun jam mi komprenas ĉion. Mi estas olda azeno. La magiisto estis tiu, kiu tenis sur la fundo la ankron de la ŝipo, dum mi estis kuranta tra Genovo kun la perdita

knabinjo. La magiisto estis tiu, kiu en figuro de arabo helpis min de la krokodilo. La magiisto estis tiu, kiu min vekis, kiam la du maatoj volis min murdi. La magiisto aŭskultis mian planon, kiam post la lezo mi deliris apud Gango. La magiisto sendis al mi la misteran ŝonkon, por ke ĝi navigu min ĝustatempe al Nagasako. La magiisto subŝovis al mi skatolon da raketoj, kiu savis mian vivon sur la maro. La magiisto en staturo de la eta nigra sinjorino inklinigis al mi la koron de Alica. Kaj fine la magiisto memvole ŝajnis sin malsaĝa kaj scivola, por helpi al mi al la premio fiksita je lia kapo. Mi volis esti pli saĝa ol la magiisto, sed la magiisto estas pli saĝa ol mi kaj krome pli nobla. NENIU SUPER LA MAGIISTO! Knaboj, voku kun mi: VIVU LA MAGIISTO!”

”Gloro al la magiisto!” ekkriis la detektivoj tiel forte, ke en la tuta urbo ekremis la fenestroj.

5

KIEL LA MAGIISTO SIDIS EN KARCCERO

Kiam do, kiel jam vi scias, la glora Sidney Hall alkondukis la arestitan magiiston, estis komencita juĝa proceso pro la ŝtelita kato.

Post alta tablo tronis juĝisto Doktoro Korpus Juris, same dika kiel severa. Sur la benko de akuzitoj sidis la magiisto kun katenitaj manoj.

”Leviĝu, kanajlo,” ektondris je li Doktoro Korpus. ”Ci estas akuzita, ke ci ŝtelis de la reĝo la katon Jurka, naskiĝintan en ĉi tiu lando, aĝanta unu jaron. Ĉu ci konfesas, sentaŭgulo?”

”Jes,” diris la magiisto mallaŭte.

”Ci mensogas, latrono,” tondris la juĝisto, ”eĉ ne unu vorton mi kredas al ci. Tion oni devas pruvi. Hej, alkonduku ĉi tien atestantinon, nian serenisman prcidinon.”

Oni alkondukis la malgrandan prcidinon, por ke ŝi atestu.

”Princidinjo,” pepis dolĉe Korpus, ”ĉu ĉi tiu fiulo ŝtelis vian noblan katon Jurka?”

”Jes,” diris la princidino.

”Jen, friponego,” ektondris la juĝisto je la magiisto, ”ci estas konvinkita! Kaj diru, kiel ci ŝtelis ĝin?”

”Nu tiel,” diris la magiisto, ”ke ĝi mem falis sur mian kapon.”

”Mizerulo, ci mensogas,” ekkriis je li la juĝisto kaj turniĝis je la principino per la plej tenera voĉo: ”Principidino, kiel tiu krimulo ŝtelis vian plej moŝtan katon?”

”Ĝuste tiel,” diris la principino, ”kiel li diras.”

”Nun ci vidas, ci rabulo,” kriis la juĝisto je la magiisto, ”nun ni jam scias, kiel ci ŝtelis ĝin! Kaj kial, protokanajlo, ci ŝtelis ĝin?”

”Ĉar pro la falo rompiĝis ĝia krureto. Mi prenis ĝin sub la jakon por reĝustigi kaj bandaĝi ĝian krureton.”

”Ci abomenulo,” abruptis Doktoro Korpus, ”ĉio, kion ci diras, estas mensogo! Alkonduku ĉi tien atestanton, la gastejestron el Straŝnice!”

Oni alkondukkis do tiun atestanton.

”Hej, gastejo,” ekkriis la juĝisto, ”kion vi scias pri ĉi tiu krimulo?”

”Nur tion,” diris la gastejestro timeme, ”ke li venis, glora tribunalo, en mian gastejon, eltiris el sub la jakon nigran katon kaj bandaĝis ĝian piedeton.”

”Hm,” murmuris Doktoro Korpus, ”eble vi mensogas. Kaj kion poste li faris kun la nobla besteto?”

”Poste,” diris la gastejestro, ”li liberlasis ĝin, kaj la kato kuris for.”

”Ha, ci best-turmentanto,” bruskis la juĝisto je la magiisto, ”ci liberlasis ĝin, por ke ĝi fuĝu! Kie nun estas la reĝa kato?”

”Eble ĝi kuris,” diris la magiisto, ”al tiuj lokoj, kie ĝi naskiĝis. La katoj, ni scias ja, tion faras.”

”Ha, ci senhontulo,” vulkanis la juĝisto, ”ci volas min instrukcii? Princidinjo,” li turniĝis denove al la princidino tenervoĉe, ”kiel alte vi taksas vian altestimatan katon Jurka?”

”Mi donus ĝin eĉ ne por duono de la reĝolando,” deklaris la princidino.

”Jen ci vidas, fripono,” ekronbris la juĝisto je la magiisto, ”ci ŝtelis duonon de la reĝolando. Je tio estas, mizerulo, mortpuno!”

La princidino ekbedaŭris la magiiston. ”Eble mi donus,” ŝi rapidis diri, ”Jurkan por peceto da torto.”

”Kaj kiom kostas, princidino, peceto da torto?”

”Nu,” diris la princidino, ”el nuksoj ĝi kostas kvinheleron, el fragoj du kvinhelerojn kaj el kremo tri kvinhelerojn.”

”Kaj por kia torto vi donus, princidinjo, Jurkan?”

”Eble por la krema,” diris la princidino.

”Ha, ci mordulo,” kriis la juĝisto je la magiisto, ”same, kvazaŭ ci ŝtelus tri kvinhelerojn. Por tio, kanajlo, laŭ la leĝo ci punsidus tri tagojn en arestejo. Ek en la arestejon, arkifripono, por tri tagoj, krimulo, ŝtelisto, rabisto!

Kara principino,” li turniĝis denove al la principino, ”mi havas la honoron danki vin pro via saĝa kaj indiĝena atesto. Transdonu, mi petas, al sinjoro paĉjo la plej sindonan saluton de lia plej obeema, plej fidela kaj plej justa juĝisto Doktoro Korpus.”

Kiam oni forkondukis la magiiston en la arestejon, oni donis al li pecon da ŝima pano kaj en kruĉo fetoran akvon. Sed la magiisto nur sidis kaj ridetis, kaj liaj okuloj brilis pli kaj pli. Noktomeze li leviĝis kaj mansvingis. Tiam eksonis dolĉa muziko kaj la aero ekbonodoris kva-zaŭ de miloj da floroj. Kaj fakte, sur la dezerta karcerkorto subite elkreskis densejoj da florantaj rozoj, tufoj da lilioj levis siajn kalikojn al la blanka luno, ekfloris bedoj da trikoloretoj kaj konvaloj, floranta viburno kaj peonio balancis pezajn florojn, kratago disfloris blanke kaj ruĝe kaj en ĝia arbosupro ekkantis najtingalo.

Tiam vekiĝis en sia ĉelo kondamnita murdinto, kaj incendiinto sur sia malmola lito frotforigis dormon el siaj okuloj; punata batiĝulo mirigite leviĝis, ŝtelisto ekkriis pro mirego kaj trompulo pentiganta tie sian kulpon, kunplektis siajn manojn ne komprenante, kio okazas. Ĉar la fridaj kaj humidaj karceraj muroj apertiĝis kaj disvolbiĝis en formo de svelta kaj gracia kolonaro; la malpuraj litoj de la punatoj kovriĝis per blankega lino, ne estis plu rigliloj kaj kradoj, nur kelkaj ŝtonaj ŝtupoj kondukis direkte en la florantan ĝardenon.

”Francisko,” murmuris la murdinto al la incendiinto, ”ĉu vi dormas?”

”Mi ne dormas, homo,” diris la incendiinto, ”sed mi miraĝas; ŝajnas al mi, ke ne plu mi estas en karcero.”

”Knaboj,” ekkriis la batiĝulo, ”mi opinias, ke ĵus mi mortis kaj venis en la ĉielon!”

”En la ĉielon,” ekkriis la trompulo, ”ĉu ekzistas por mi ia ĉielo? Sed ankaŭ mi havas belan sonĝon, kvazaŭ mi estus en la paradizo.”

”Tio ne estas sonĝo,” diris la ŝtelisto, ”knaboj, ĉio estas palpebla; ĝuste mi palpas la lilian floron. Aĥ, se mi rajtus ĝin pluki!”

”Nur pluku ĝin,” eksonis potenca kaj afabla voĉo, kaj ĉe la punatoj staris la magiisto en blanka robo. ”Ĝi estas por vi, amiko!”

”Sinjoro,” demandis la incendiinto singene, ”vi estas ĉi tie kiel provoso?”

”Mi estas punato kiel vi, amikoj,” respondis la magiisto. ”Kondamnita kiel vi. La ĝardeno estas por ni. Por ni sub la arboj estas regal-preparitaj la tabloj. Por ni kantas la najtingalo kaj floras la rozoj. Venu vespermanĝi!”

Ĉiuj sidiĝis al la riĉa tablo kaj komencis festeni. La magiisto estis ilin priservanta per raraj manĝaĵoj kaj vino. Kiam li verŝis vinon al la trompulo, mallevis ĉi tiu la okulojn kaj diris mallaŭte: ”Ne, sinjoro, ne al mi!”

”Kial vi ne volas vinon?” demandis la magiisto.

”Ĉar, sinjoro, mi ne meritas ĝin. Mi malriĉigis multajn, multajn homojn. Aĥ, sinjoro, kiel mi povus ĝui vinon?”

Tiam ekbrilis la okuloj de la magiisto, sed li mem diris nenion kaj estis priservanta la ceterajn. Kiam li estis verŝanta en pokalon de la murdinto, ekstrems la mano de la murdinto kaj kelkaj gutetoj da ruĝa vino falis sur la tablotukon.

”Sinjoro,” ekkriis malespere la murdinto, ”kial la vino rememorigas al mi la sangon? Aĥ, kial mi verŝis la sangon de senkulpulo! Ve al mi plej mizera!”

La magiisto diris nenion, sed liaj okuloj ekflamis ankoraŭ pli hele. Kiam li estis verŝanta vinon al la batiĝulo, tiu ekkriis: ”Sinjoro, kion mi havu kun vino? Mi batmortigadis homojn pro senbridemo kaj lamigis ilin nur pro arbitro; mi ekbatis manon proponanta al mi amikecon, kaj mi suferigis tiujn, kiuj amis min plej multe!”

Luno etendiĝis sur la vizaĝo de la magiisto, sed li mem eĉ ne vorton diris, turniĝis al la ŝtelisto kaj prezentis al li pladon da plej belaj fruktoj. ”Prenu, amiko,” li diris kore, ”ĝi estas via.”

”Sinjoro,” ekkriis la ŝtelisto, ”mi prenadis, kio ne apartenis al mi; permesu, ke mi ne prenu, kio eble apartenas al mi!”

La magiisto ekridetis kaj alpaŝis al la incendiinto: ”Prenu vi, mi petas vin,” li diris al li, ”ĝi refreŝigos vin.”

”Mia sinjoro,” oponis la incendiinto, ”mi bruligis teg-

menton super la kapo de tiuj, kiuj bonfaris al mi; nun ili estas almozuloj kaj petas pri peco da pano. Aĥ, se mi povus prefere refreŝigi tiujn, kiujn mi maljustumis!”

Tiam ekbrilis la okuloj de la magiisto kiel steloj, kaj li mem alte leviĝis kaj diris: ”Knaboj, dum jaroj vi malsatis kaj soifis; dum jaroj vi ne sentis dolĉaĵojn sur la lango kaj ĝojon en la koro. Kial nun vi ne povus manĝi kaj trinki, festeni kaj ĝui la vivon? Prenu el ĉio, ĝi estas via!”

Sed tiumomente aŭdeblis en la ĝardeno muĝado kva-zaŭ de multaj paŝoj kaj al la festenantoj proksimiĝis aro da malriĉuloj, lamuloj kaj almozuloj.

”Mia dio,” ekkriis la trompulo, ”jen iras tiuj, kiujn mi malriĉigis!”

”Kaj mi,” ekkriis la murdinto duonkonsternite kaj duonĝoje, ”mi vidas ĉi tie tiun, kiun mi murdis!”

”Miadio,” aŭdiĝis la batiĝulo, ”la lamuloj kaj vunditoj, sinjoro, estas tiuj, kiujn mi maljustumis!”

”Kaj ĉi tie vi estas, vi ĉiuj,” ekkriis la ŝtelisto ekzalte, ”kiujn iam mi priŝtelis!”

”Ve,” ekkriis la incendiinto, ”al ĉi tiuj almozuloj, sinjoro, iam mi forbruligis tegmenton super la kapo!”

Tiam eksaltis la trompulo kaj komencis porti manĝaĵojn kaj vinojn al tiuj, kiujn iam li malriĉigis; la murdinto disŝiris la tablotukon, algenuis al tiu, kiun li estis murdinta, per siaj larmoj lavpurigis liajn vundojn kaj bandaĝis ilin; la batiĝulo surverŝis vinojn kaj oleojn sur

la vundojn de tiuj, kiujn li maljustumis; la ŝtelisto prenis la oran kaj arĝentan manĝilaron kaj trudis ĝin al la priŝtelitoj; kaj la incendiinto vidante tion, ekploris kaj diris: "Ve, kion mi donu al vi, almozuletoj, kiujn mi senigis je ĉio?" Kaj tuje li plukis ĉiujn florojn en la ĝardeno kaj ŝutis ilin en interbrakojn de la almozuloj.

Kiam la trompulo satigis kaj trinkigis tiujn, kiujn li mizerigis, kiam la murdinto bandaĝis la vundojn de la murdinto, kaj la batiĝulo flegis la vunditojn, kiam la ŝtelisto pridonacis la priŝtelitojn kaj la incendiinto florkronis ĉifonojn de la almozuloj, ili mem manĝis nenion, sed alkondukis siajn gastojn en la palacon, kuŝigis ilin al dormo sur blanke sternitaj litoj kaj mem kuŝiĝis apud ilin sur la malmola tero.

Nur la magiisto restis en la ĝardeno kun la interplektitaj manoj kaj kun la stellumaj okuloj. Dolĉa, kvieta dormo descendis super la karceron.

Tiam eksonegis pezaj frapoj kaj tra la pordo de la karcero enpaŝis la provoso. "Leviĝu, latronoj," li ekkriegis, "jam tri tagojn vi dormas kaj ni ne povas vin vekti!"

La punatoj tuj vekigis. Kaj ili vidis, ke ili kuŝas sur la tero apud siaj malmolaj, malpuraj litoj; la aerkolonoj denove ŝanĝiĝis je la humidaj karcermuroj kaj el la dezerta korto malaperis ĉio, kio povus simili al floreto aŭ floranta arbo; nur sur la planko kuŝis ankoraŭ kelkaj ruĝaj kaj liliaj folietoj.

”Ĉu tri tagojn ni dormis?” miris la murdinto.

”Kio!” ekkriis la incendiinto, ”ĉu tio estis nur songo?”

”Sinjoro provoso,” demandis la ŝtelisto, ”ĉu estis ĉi tie iu krom ni?”

”Estis ĉi tie tiu,” murmuris la provoso, ”kiu ŝtelis la reĝan katon. Tri tagojn li staris en sia ĉelo senmove kaj liaj okuloj brilis kiel steloj. Hodiaŭ matene li malaperis, kiam li estis pentiginta sian punon. Li estis ia fripona birdeto! Antaŭ ol li malaperis, li alŝorĉis al nia honorinda juĝisto, Doktoro Korpus, azenorelojn. Sed nun ek, kanajloj, leviĝu!”

Kaj denove komenciĝis al la punatoj en la karcero la iama vivo. Sed tamen io ŝanĝiĝis: la fetora akvo en la kruĉo gustis al ili ĉiam kiel la plej dolĉa vino, la ŝima pano ŝanĝiĝis en iliaj buŝoj je la plej delica gusto, rava bonodoro de floroj blovis tra la malliberejo, kaj nokte, kiam ili estis kuŝiĝantaj, sterniĝis iliaj litoj per blanko la plej pura. Ĉiunokte krome etendiĝis super la karcero paca dormo sen riproĉoj kaj suferoj.

6

FINO DE LA FABELO

Kiam do la principino sciigis ĉe la tribunalo, ke eble ŝia kato Jurka fuĝis tien, kie ĝi naskiĝis, tuj ŝi sendis kurieron al la kabaneto de la avino.

Galopegas la kuriero surĉevale, ĝis fajreroj ŝprucas el sub la hufoj, kaj jen, li vidas antaŭ la kabaneto la nepon de la avino Vaŝek kun la nigra kato enbrake.

”Vaŝek,” kriis la kuriero, ”la principino volas sian katon Jurka redone.”

Ekdoloris la koro de Vaŝek, ke li devas perdi Jurkan, sed li diris: ”Mi mem, sinjoro kuriero, ĝin alportos al la principino.”

Kuris do Vaŝek en la kastelon kun Jurka en sako kaj rapide al la principino: ”Jen, principino,” li diris, ”mi portas nian katon. Se ĝi estas via Jurka, lasu ĝin por vi.”

Malfermis Vaŝek la sakon, sed Jurka ne elsaltis jam tiel vivece, kiel tiam siatempe el la dorskorbo de la avino; ĝi lamis, povrulino, je unu piedeto.

”Mi ne scias,” diris la principino, ”ĉu ĝi estas nia Jur-

ka. Jurka eĉ ne iomete lamis. Sed sciu, ni vokos Bafeno-
non.”

Kiam Bafeno ekvidis Jurkan, ĝi komencis pro ĝojo vostumi, ke nur ĝi siblis; sed kion ĝi diris al la kato kaj kion respondis Jurka, tion komprenis neniu el la ĉeestantoj.

”Ĝi estas Jurka,” ekkriis la principidino. ”Bafeno ĝin ekkonis. Sed, Vaŝek, kion mi donu al vi por tio, ke vi ĝin alportis? Ĉu vi volas monon?”

Vaŝek ekruĝis kaj rapidis diri: ”Mi ne volas, principidino. La avino havas tiom da ĝi, ke pro tio ŝi estas senkonsila.”

”Aŭ — aŭ — ĉu vi volus peceton da torto?” demandis la principidino.

”Tute ne,” diris Vaŝek, ”ni havas tiom da buĥtoj, laŭplaĉe.”

”Aŭ — aŭ —” pripensis la principidino, ”ĉu vi volus elekti iun el miaj ludiloj?”

”Ne, ne,” mansvingis Vaŝek. ”Mi havas, rigardu, tian tranĉilon kaj per ĝi mi skulptas al mi kion ajn.”

La principidino vere ne plu sciis, kion proponi al Vaŝek. ”Sed, Vaŝek,” ŝi diris fine, ”diru mem, kion vi volas ricevi.”

”Nu, principidino,” diris Vaŝek kaj ruĝiĝis kiel papaveto.

”Nu, diru, Vaŝek,” insistis la principidino.

"Tion mi ne rajtas diri," defendis sin Vaŝek ruĝa ĝisorele.

Nun denove ekruĝis la principidino kiel peonio. "Kaj kial," ŝi diris, "vi ne rajtus tion diri?"

"Ĉar," diris la malfeliĉa Vaŝek, "tion cetere vi ne donus al mi."

La principidino ruĝiĝis kiel rozo. "Kaj kio," ŝi diris embarase, "se mi ĝin donos al vi?"

Vaŝek kapneis: "Vi ne donos."

"Kaj se mi donos?"

"Vi ne rajtas," diris Vaŝek malgaje. "Mi ne estas reĝido."

"Rigardu, Vaŝek, tien," rapidis diri la principidino, kaj kiam Vaŝek rerigardis, ŝi ekstaris piedpinte kaj donis al li kison sur la vangon. Antaŭ ol Vaŝek rekonsciiĝis, ŝi estis jam en angulo, kaptis Jurkan kaj estis kaŝanta la vangojn en ĝia tegumento.

Vaŝek ardis kaj brilis. "Disinjoro vin rekompencu, principidino," li diris, "kaj mi denove iros."

"Vaŝek," flustris la principidino, "ĉu ĝi estis tio, kion vi volis?"

"Estis, principidino," ekparolis Vaŝek fervore. Sed en la salonon eniris korteganinoj kaj Vaŝek klopodis malaperi.

Gaje Vaŝek trotis hejmen; en la arbaro li restis nur tiom longe por skulpti el arboŝelo belan ŝipeton kaj kun la ŝipeto enpoŝe li kuris hejmen.

Kiam li venis hejmen — Jurka tie sidis sur la domperono kaj lavis sian tegumenton per la lama piedeto.

”Avinjo,” komencis krei Vašek, ”ĵus mi portis Jurkan en la kastelon!”

”Nu, knabo,” diris la avinjo, ”tia jam estas karaktero de la katoj, ke ili revenas tien, kie ili naskiĝis, eĉ se tio estus mejlojn malproksime. Kuru kaj portu ĝin matene denove en la kastelon.”

Matene denove Vašek kuris kun Jurka en la kastelon.

”Principidino,” li diris senspire, ”jen ree mi portas Jurkan. Ĝi, mavulino, fuĝis de vi, rekte en nian kabanon.”

”Vi bubo,” diris la principidino, ”vi scias ventkuri!”

”Principidino,” hastparolis Vašek, ”ĉu vi volus havi ĉi tiun ŝipeton?”

”Donu ĝin,” diris la principidino. ”Kaj kion mi donu al vi hodiaŭ por Jurka?”

”Mi ne scias,” diris Vašek, kaj ekruĝis tuj ĝis la hararo.

”Diru do,” flustris la principidino kaj ruĝiĝis ankoraŭ pli.

”Mi ne diros.”

”Diru!”

”Mi ne diros.”

La principidino klinis la kapon kaj fingretis la ŝipeton. ”Ĉu vi volus,” diris ŝi fine, ”eble tion, kion hieraŭ?”

”Nu eble,” ekridis Vašek haste; kaj ricevinte tion, li

kuris gaje hejmen. Nur ĉe salikoj li restis iomete kaj faris belan, melodian fajfileton.

Kiam li venis hejmen — Jurka sidis sur la domperono kaj per piedo karesas sian barbaĵon. "Avinjo," ekparolis Vaŝek denove, "Jurka estas ree ĉi tie."

"Nu, kaptu ĝin," diris la avinjo, "kaj kuru kun ĝi morgaŭ denove en la kastelon. Eble poste tie ĝi kutimiĝos."

Matene do Vaŝek kuris denove en la kastelon, kun Jurka en la sako surdorse. "Principidino," tuj li ekis, "Jurka denove fuĝis al ni."

Sed la principidino paŭtis kaj diris nenion.

"Rigardu, principidino," hastparolis Vaŝek, "ĉi tiun fajfileton mi faris hieraŭ."

"Donu ĝin," diris la principidino kaj plu paŭtis. Vaŝek piedumis kaj ne sciis, kial la principidino koleras.

La principidino ekblovis en la fajfileton, kaj kiam la fajfileto bele ekkantis, ŝi diris: "Vi bubo, mi scias, ke vi tion faras intence kun la kato, por ke mi — por — por ke vi ricevu rekompence denove tion, kion hieraŭ."

Vaŝek tristiĝis, prenis la ĉapon kaj diris: "Se vi, principidino, tion opinias, do bone; sed neniam plu mi venos ĉi tien."

Malgaje kaj lante Vaŝek revenis hejmen. Apenaŭ li venis — Jurka sidis denove sur la domperono kaj nur ĉirkaŭlekis sin, tiom da lakto ĝi eltrinkis. Kaj Vaŝek sidiĝis al ĝi, prenis ĝin sur la sinon kaj silentis.

Jen hop, hop, sur ĉevalo algalopis la reĝa kuriero. "Vaŝek," li kriis, "la reĝo sciigas vin, ke vi alportu Jurkan en la kastelon."

"Tio ne havas sencon," diris Vaŝek, "la kato ĉiam revenos tien, kie ĝi naskiĝis."

"Sed la principidino, Vaŝek," ordonas la kuriero, "la principidino sciigas vin, ke vi ĝin alportu eble ĉiutage."

Vaŝek kapneis. "Mi diris al ŝi, ke mi ne plu venos."

Tiam eliris sur la domperonon la avinjo kaj diris: "Sinjoro kuriero, la hundo vivas ĉe la homo, sed la kato ĉe kabano. Al ĉi tiu kabano Jurka jam estos fidela."

La kuriero turnis la ĉevalon kaj galopis al la kastelo. La sekvintan tagon alveturis antaŭ la kabanon de la avino granda veturilo, trenata per cent ĉevaloj. Koĉero descendis kaj vokis la avinon. "Avinjo," li diris, "sinjoro reĝo sciigas vin, ke se la kato restadas ĉe la kabano, mi alveturigu la katon ankaŭ kun la kabano kaj ankaŭ kun vi kaj Vaŝek. La kabano havos ja lokon en la reĝa ĝardeno."

Venis multaj homoj kaj helpis ŝarĝi la tutan kabanon sur la veturilon. La koĉero vipklakis kaj kriis "hot", cent ĉevaloj ektiris kaj la veturilo kun la kabano moviĝis al la kastelo. Sur la veturilo, sur la sojlo de la kabano, sidis la avino, Vaŝek kaj Jurka. Tiam la avino rememoris, ke la reĝa panjo songiŝis, ke Jurka alkondukos en la kastelon la venontan reĝon kaj ke la venonta reĝo alveturos kun sia tuta domo. Ŝi rememoris tion, sed diris nenion.

Kun granda ĝojo oni bonvenigis la veturilon en la kastelo, transmetis la kabanon en la ĝardenon, kaj ĉar Jurka restis ĉe la kabano, ĝi ne plu intencis fuĝi. Ĝi vivis tie kun la avino kaj Vaŝek kiel hejme. Kiam la principidino volis ludi kun ĝi, ŝi devis iri al ĝi en la kabanon; kaj ĉar verŝajne ŝi tre ŝatis Jurkan, ŝi iradis tien ĉiutage kaj tre ege amikiĝis kun Vaŝek.

Kio poste sekvis, tio ne plu apartenas en nian fabelon. Sed se Vaŝek fariĝis vere reĝo en tiu lando, kiam li maturiĝis, tio estis, infanoj, nek pro la kato, nek pro amikeco de la principidino, sed pro grandaj kaj bravaj agoj, kiujn la granda Vaŝek faris por la tuta lando.

Fabelo hunda

Dum la veturilo de mia avo, de tiu muelisto, veturigadis tra vilaĝoj panon kaj reen en la muelejon belan grenon, Nukseton konis ĉiu ajn; nu, Nukseto, dirus ĉiu al vi, ĝi ja estas tiu hundeto, kiu sidas sur la koĉerbenko apud la maljuna Ŝutilek kaj rigardas kvazaŭ ĝi direktus la tutan veturilon; kaj kiam ĝi veturas supren iom malrapide, ĝi komencas boji kaj la radoj tuj ektorniĝas pli rapide, Ŝulitek vipkrakas, Ferdo kaj Ĵano, nome ambaŭ ĉevaloj de nia avo, ektiras, kaj nun la tuta veturilo glorie kuras en la vilaĝon kaj elskuas nuran belodoron de la didonaco. Tiel infanoj, veturadis la mortinta Nukseto tra la tuta paroĥo.

Jes, tiutempe ankoraŭ estis neniuj deĉenigitaj aŭtomobiloj; tiam oni veturadis lante, orde kaj por ke tio estu aŭdebla. Neniu ŝoforo en aŭtomobilo scias tiel bele vipokraki kiel la mortinta Ŝulitek, dio donu al li eternan gloron, aŭ tiel ŝmaci je la ĉevaloj, kiel li sciis tion; kaj apud neniu ŝoforo sidas la saĝa Nukseto, ne koĉeras, nek bojas, nek terurigas, nenio. Aŭtomobilo nur preterpasegas kaj ekfetas, kaj jen rigardu, kie jam ĝi estas; tute nevidebla ĝi estas pro nura polvo. Jes, Nukseto ve-

turadis pli solide; duonhoron antaŭe oni pintigis la ore-
lon, ekflaris kaj diris: "Ha!" Oni jam sciis, ke al oni vetu-
ras la pano, oni stariĝis sur domperono, por diri al ĝi
bonan matenon. Kaj nun jam vere veturas la veturilo de
la avo en la vilaĝon, Ŝulitek ŝmacas per la lango, Nukseto
bojas sur la koĉerbenko kaj subite hop, ĝi saltas sur
la gropon de Ĵano (ĝi estas ja grupo, dio benon donu!
tablolarĝa, kvar homoj povus manĝi sur ĝi), kaj nun ĝi
dancas sur la dorso de Ĵano, kuras de la jungaĵo al la
vosto, de la vosto al la jungaĵo kaj sian buŝon ĝi povas
franĝi pro ĝojo: Haf, haf buboj, uf, kiel ni veturegis, mi
kaj Ĵano kaj Ferdo; hura! Kaj la buboj okulegas; ĉiutage
alveturas ĉi tien la pano, kaj ĉiam tia jubilo, mia dio, kva-
zaŭ la imperiestro mem veturus! — Jes, mi diras, tiel so-
lide jam delonge oni ne veturas, kiel dum tempo de
Nukseto.

Kaj boji sciis Nukseto, kvazaŭ oni pafus el pistolo.
Kraĥ! dekstren, tiel ke la anseroj tie pro la ektimo kuras,
kuras kaj haltos nur en Police sur la foirplaco, tute mi-
rigitaj, kiel ili tien venis; kraĥ! maldekstren, ke la kolom-
boj el la tuta vilaĝo ekflugas kaj flugdescendas ie apud
Altman, por diri, ke ĝis la prusa flanko; tiom sciis boji
Nukseto, la hundaĉo mizera, kaj poste, mire ke ĝia vosto
ne forflugis, kiel ĝi svingis ĝin pro ĝojo, kiam ĉion ĉi ĝi
faris; Nu jes, ĝi povis vere orgojli; tiel fortan voĉon eĉ ne
generalo havas, jes iam ankaŭ deputito ne.

Kaj tamen estis tempo, kiam Nukseto sciis eĉ ne iom boji, malgraŭ tio, ke ĝi estis jam duonmatura kaj havis tiajn dentojn, ke ĝi dismordis la dimanĉajn botojn de la avo. Vi devas scii, kiel la avo venis al Nukseto, plivere Nukseto al la avo. Foje la avo iris el la gastejo malfrue hejmen, kaj ĉar estis nokto kaj ĉar li estis gaja, kaj eble ankaŭ por forpeli la mavajn spiritojn, li kantis dumvoje. Subite en la mallumo li perdis la ĝustan noton kaj devis halti por ĝin serĉi. Kaj serĉante ĝin li aŭdis ian murmureton, ĝemeton, bleketon sur la tero ĉe siaj piedoj; li krucsignis sin kaj palpis surtere, kio povas esti. Li ekpaleis vilan varman buleton, ĝi ampleksis lian manplaton, kaj estis mola kiel veluro; apenaŭ li prenis ĝin en la manon, ĝi ĉesis murmureti kaj suĉis lian fingron, kvazaŭ ĝi estus el mielo. "Nu mi devas ĝin rigardi," pensis la avo, kaj portis tion hejmen, en la muelejon. La avino, povru-lino, atendis la avon por povi diri al li bonan nokton; sed antaŭ ol ŝi povis konvene aŭdiĝi, la friponeta avo diris: "Rigardu, Helena, kion mi portas al vi." La avino prilumis tion, kaj jen, estis ja hundido, mia kamaradeto, hunda bebeto ankoraŭ blinda kaj flava, kiel elŝeligita nukso. "Ni vidu," ekmiris la avo, "hundeto, kies fakte ci estas?" La hundeto memkomprene diris nenion; ĝi tremis sur la tablo kiel amaseto da malfeliĉo, ĝis ĝia rata vosteto saltetis, kaj bleketis malĝojege; kaj jen, ha friponeto, sub ĝi fariĝis marceto kaj kreskis kiel malbona konscienco.

"Karlo, Karlo," kapbalancis serioze la avino je la avo, "kie vi lasis la prudenton? La hundido ja pereos sen patrino." Tion la avo ektimis. "Rapide, Helena," li diris, "varmigu lakton kaj preparu bulketon," La avino ĉion preparis, la avo trempetis panmolon en lakto, ĉirkaŭligis ĝin per pinto de poŝtuko kaj faris tiel bonan suĉbuleton, ke el ĝi la hundido satsuĉis, ĝis ĝi havis la ventreton kiel tamburon.

"Karlo, Karlo," denove kapbalancis la avino, "kie vi lasis la prudenton? Kiu varmigis la hundidon, por ke ĝi ne pereu pro malvarmo?" Sed, pa, la avo! al li oponi! Li prenis la hundidon kaj rekte kun ĝi en la stalon; mia kara, tie estis varme pro la spirado de Ferdo kaj Ĵano. Ambaŭ ĉevaloj jam dormis sed kiam venis la mastro, ili levis la kapon kaj sekvis lin per saĝaj, afablaj okuloj. "Ĵano, Ferdo," diris la avo, "ne mistraktu Nukseton, vi komprenas? Mi donas ĝin al vi sub protekton." Kun tio li metis la etan Nukseton antaŭ ilin en pajlon. Ĵano ekflaris al la stranga kreitaĵo kaj sentis el ĝi la bonajn manojn de la mastro; kaj ĝi flustris al Ferdo: "Ĝi estas nia!" Kaj prete.

Tiel Nukseto kreskis en la stalo, nutrata per suĉbuleto el poŝtuko, ĝis ĝiaj okuloj malfermiĝis kaj ĝi mem povis trinki el telereto. Kaj varme estis al ĝi kiel ĉe patrino, kaj tiel baldaŭ iĝis el ĝi eta bubaĉo kun malsaĝa kapo, nu, hundido; ĝi eĉ ne scias, kie ĝi havas la postajon, sur

kiu ĝi devas sidi, ĝi eksidas sur la propra kapo kaj miras, ke ĝi premdoloras; ĝi ne scias, kion kun la vosto, kaj ĉar ĝi scias kalkuli nur ĝis du, ĝi eraras ĉiujn siajn kvar kru-rojn; fine pro miro ĝi ĵetiĝas teren kaj eligas la langeton bele rozetan, kiel ŝinkofolion. Sed ĉiu hundido estas ja tia, mallonge, kiel infanoj. Multe pli dirus al vi Ĵano kaj Ferdo; ili dirus al vi, kia sufero estas por maljuna ĉevalo, senĉese atenti, por ne piedireti tiun folan hundaĉon; sciu hometoj, hufo ne estas babuŝo kaj oni devas ĝin metadi lantete, leĝerete, por ke io sur la planko ne komencu dolore kviviti kaj plendi. Jes, ja, estas egaj zorgoj pri infanoj, dirus al vi Ĵano kaj Ferdo.

Kaj el Nukseto fariĝis jam tuta hundo, gaja kaj plendenta kiel ĉiu alia, sed io ne estis ĉe ĝi en ordo: neniu aŭdis ĝin boji nek murmuri. Ĝi nur kvivitis kaj muĝis, sed bojado tio ne estis. Foje diris al si la avino: "Kial Nukseto ne bojas?" Ŝi meditas, tri tagojn iradas kiel korpo sen la animo, kaj la kvaran tagon ŝi diras al la avo: "Kial nur Nukseto neniam bojas?" Meditas la avo, tri tagojn li iradas kaj senĉese kapskuas. La kvaran tagon li diras al Ŝulitek, la koĉero: "Kial nur nia Nukseto neniam bojas?" Ŝulitek komencis tion defunde; li iris en gasstojn kaj meditis tie tri tagojn kaj tri noktojn; la kvaran tagon li emis jam dormi, iel estis en lia kapo konfuze, li vokis do la gastejstron kaj tiris el la poŝo krejcerojn por elspezo. Li kalkulis, kalkulis, sed la diablo mem impliki-

ĝis en tion, kaj li ne kaj ne finkalkulis. "Nu Ŝulitek," diras la gastejestro, "ĉu la panjo ne instruis vin kalkuli?" Tiumomente Ŝulitek preterlasis la elspezon, ekbatis sian frunton kaj kuris al la avo. "Mastro," li kriis jam en por-do, "jam mi trafis ĝin! Nukseto tial ne bojas, ĉar ĝia pan-jo ne instruis tion al ĝi!"

"Verver," diris la avo, "jam la vero; la panjon Nukseto ne konas, Ferdo kaj Ĵano ne instruis al ĝi boji, en la najbareco ekzistas neniuj hundo, kaj tial Nukseto eĉ ne scias, kio estas bojado." Sciu, Ŝulitek," li diras, "vi devas al ĝi instrui la bojadon." Ŝulitek sidiĝis en la stalo al Nukseto kaj instruis al ĝi boji. "Haf, haf," li klarigis al ĝi, "atentu, kiel oni tion faras; unue vrrr en la gorgo, kaj poste subite ci elbuŝigos tion: haf, haf. Vrrrr, haf, haf, haf!" Nukseto pintigis la orelojn, tio estis muziko, kiu plaĉis al ĝi, mem ĝi ne scias kial; kaj subite pro nura ĝojo ĝi mem ekbojis. Ĝi estis ekbojo iom stranga, ĝi ekkvivitis, kvazaŭ tranĉilo sur telero ekgrincus, sed ĉiu komenco estas malfacila; ankaŭ vi ne tuj konis la alfabeton. Ferdo kaj Ĵano aŭskultis, kial la maljuna Ŝulitek bojas; fine ili ŝultrolevis super li kaj neniam plu lin estimis. Sed Nukseto havis por la bojado egan talenton, la lernado rapide progresis, kaj kiam unuafoje ĝi ekveturis kun la veturilo, ĝi aŭdiĝis krak maldekstren, krak dekstren, kvazaŭ oni pafus el pistolo; tamen ĝis la plej malproksima morto Nukseto ne satavidis sian bojadon kaj bojis

la tutan dian tagon; tiom ĝojigis ĝin, ke tion ĝi solide el-lernis.

Sed veturadi kun Ŝulitek kaj koĉeri, tio ne estis la sola, kion Nukseto prizorgadis. Ĉiuvespere ĝi ĉirkaŭiris la muelejon kaj korton, ĉi ĉio estas ĝustloke, abruptis kokinojn, ke ili ne plu kluku kiel onklinaĉoj en bazaro, kaj poste ĝi stariĝis antaŭ la avon, vostumis kaj sagace rigardis, kvazaŭ ĝi volus diri: "Iru nur jam dormi, Karlo, ĉion mi atentis." La avo ĝin do laŭdis kaj iris dormi kun dia fido. Sed dumtage la avo ofte ĉirkaŭrigardis vilaĝojn kaj urbetojn, por aĉeti grenon kaj kelkion, ankaŭ trifolian semon, lenton aŭ papavon; kaj tiam Nukseto kuris kun li, kaj irante nokte hejmen, neniel ĝi timis kaj trafis la vojon ankaŭ tiam, kiam la avo mem vojeraris.

Foje do la avo aĉetis ie semon, jes, tio estis tie en Zlice; li aĉetis kaj haltis momenton en gastejo, Nukseto atendis tempeton antaŭ la gastejo; kaj jen en ĝia nazo ektiklis io bona, nu, ia bela bonodoro el la kuirejo, tiel ke ĝi devis iri tien rigardi. Kaj per mia animo, tie hejmanoj manĝis andujojn; kaj Nukseto sidiĝis kaj atendis, ĉu falos sub la tablon ia aminda andujeto. Kaj dum ĝi atendis, haltis antaŭ la gastejo veturilo de najbaro de la avo, kiel nur li nomiĝis, nu eble Joudal; Joudal trovis la avon en la verŝejo, vorto sekvis vorton kaj jam ambaŭ najbaroj sin portis al la veturilo, por kunveturi hejmen. Ili

ekveturis, kaj la avo forgesis Nukseton kiel la morton, dume Nukseto figuris en la kuirejo antaŭ la anduoj.

Kiam la hejmanoj finmanĝis, ili ĵetis anduj-restaĵojn al la kato sur la fornon; Nukseto sekis la buŝon kaj nur nun ĝi rememoris, kie ĝi lasis la avon. Ĝi serĉis, flaris tra la tuta gastejo, sed la avo nenie. "Nukseto," diris la gastejestro, "cia mastro veturis tra tie," kaj montris permane. Ĉi tion Nukseto komprenis kaj ekiris hejmen sola; komence ĝi iris laŭ la ŝoseo sed poste ĝi diris al si: "Mi estus freneza; tie trans la monteton mi devancos". Ĝi ekiris do trans la monteton kaj tra la arbaro. Estis jam vespero, estis jam nokto; sed Nukseto neniel timis. De mi, ĝi opiniis, neniu ion ŝtelos. Sed ĝi malsatis kiel hundo.

Estis jam nokto, kaj aperis plenlumo; kaj kiam ie la arboj sporadiĝis, ĉu en trahakejo, ĉu en senarbejo, aperis la luno super la arbosuproj kaj estis tie tiel bele, tiel arĝente, ke la koro de Nukseto batis pro mirego. La arbaro muĝis tiel mallaŭte, kvazaŭ ĝi ludus harpon. Nun Nukseto kuris tra la arbaro kvazaŭ tra nigrenigra koridoro; sed subite aperis antaŭ ĝi arĝenta lumo, la harpoj ludis kvazaŭ pli laŭte, kaj sur Nukseto hirtiĝis ĉiu haro; ĝi alprenis sin al la tero kaj rigardis preskaŭ duonkonscia. Antaŭ ĝi arĝenta senarbejo kaj sur ĝi dancis hundaj najadoj. Ili estis belaj blankaj hundoj sed tutblankaj, preskaŭ diafanaj, kaj tiel leĝeraj, ke eĉ ne roson de la herbo ili deskuis; nu, ili estis hundaj najadoj, tion Nuks-

eto tuj ekkonis, ĉar mankis al ili ia interesa odoreto, laŭ kiu hundo ekkonas veran hundon. Nukseto kuŝas en la malseka herbo kaj povas foruzi siajn okulojn. La najadoj dancas, ludpelas sin, luktas inter si aŭ rondturniĝas post sian vosteton, sed ĉion tiel leĝere, tiel aere, ke eĉ ne pajlereto kliniĝis sub ili. Nukseto bone atentis: se iu el ili komencos sin grati aŭ mordos pulon, ĝi ne estas najado, sed blanka hundo. Sed neniu gratis sin nek pulon ek-mordis; estis do sankte ke tio estis najadoj. Kiam la luno estis tre alte, la najadoj levis la kapon kaj komencis delikate, bele jelpi kaj kanti; jes, eĉ ne orkestro de la Nacia Teatro tion tiel scias. Nukseto ploris pro emocio kaj estus kantanta kune, se ĝi ne timus, ke ĉion ĝi fuŝos.

Kiam ili finkantis, ili kusiĝis ĉirkaŭ ia majesta hunda maljunulino, ŝi estis verŝajne ia potenca feino aŭ sorĉistino, tute arĝenta kaj kaduka. "Rakontu al ni," petis ĉiuj najadoj.

La maljuna hunda feino enpensiĝis kaj poste rakontis:

"Mi rakontos al vi, kiel hundoj kreis la homon. Kiam la disinjoro kreis la tutan mondon kaj ĉiujn bestojn, li starigis al ili fruntan hundon, kiel la plej bonan kaj saĝan. Ĉiuj bestoj en la paradizo vivis kaj mortadis kaj denove feliĉe kaj kontente naskiĝadis, nur la hundoj estis ĉiam malĝojaj. Demandis ilin do la disinjoro: "Kial vi tristas, dum ĉiuj ceteraj bestoj ĝojas?" Kaj diris la plej

aĝa hundo: "Sciu disinjoro, al la ceteraj bestoj nenio mankas; sed ni hundoj havas iom da prudento en la kapo, kaj per tia saĝo ni ekkonas, ke ekzistas io pli supera ol ni, ke tio estas vi, ho, Kreinto. Ĉion ni povas ekflari, nur ne vin, kaj tio al ni hundoj ege mankas. Tial, ho, Sinjoro, plenumu nian sopiron kaj kreu al ni ian dion, al kiu ni povus ekflari." Ekridetis la disinjoro kaj diris: "Alportu al mi iajn ostojn, kaj mi kreos al vi dion, al kiu vi povus flari." Kaj la hundoj diskuris kaj ĉiu alportis ian oston: tiu de leono, tiu ĉevalan, tiu kamelan, tiu katan, mallonge, de ĉiuj bestoj, nur neniun hundan; ĉar neniun hundo tuŝas nek hundan viandon, nek hundan oston. Da ostoj estis granda amaso, kaj el tiuj ostoj la dio faris homon, por ke la hundoj havu sian dion, al kiu ili povas flari. Kaj ĉar la homo estas farita el ĉiuj bestoostoj, nur ne el la hundaj, li havas ecojn de ĉiuj bestoj: li havas leonan forton, laboremon de kamelo, ruzon de kato kaj grandanimecon de ĉevalo, nur ne la hundan fidelecon, nur la hundan fidelecon ne!"

"Rakontu ankoraŭ ion," petis la hundaj najadoj denove. La maljuna hunda feino enpensiĝis kaj poste komencis:

"Mi rakontos al vi, kiel la hundoj venis en la ĉielon. Sciu, ke la homaj animoj iras post la morto sur stelojn, sed por la hundaj animoj restis neniun stelo, kaj la hundanimoj iris post la morto dormi en la teron. Tio restis ĝis

tempoj de Jesuo Kristo. Kiam la homoj skurĝis Jesuon Kriston ĉe kolono, restis tie multe da sango, multege da sango. Kaj iu malsata hundo sen mastro venis kaj lekis la sangon de Jesuo Kristo. "Sankta Maria," ekkriis la anĝeloj en la ĉielo, "tiu hundo ja akceptis la sangon de la Sinjoro!" "Se ĝi akceptis la sangon de la Sinjoro," diris Dio, "ni prenos ĝian animon en la ĉielon." Kaj li faris novan stelon, kaj por ke oni sciu, ke ĝi estas por la hundanimoj, li afaris al ĝi voston. Apenaŭ tiu hundanimo venis sur la stelon, ĝi havis el tio tian egan ĝojon, ke ĝi komencis kuri kaj kuradi en la ĉiela spaco kiel hundo sur herbejo kaj ne tiel bonordan vojon, kiel la ceteraj steloj; kaj tiajn hundstelojn, kiuj miskuras tra la ĉielo kaj agitas la voston, oni nomas kometoj."

"Rakontu ankoraŭ ion," petis la hundaj najadoj la trian fojon.

"Ankoraŭ do mi diros al vi," komencis la maljuna feino, "ke antaŭ longegaj tempoj, la hundoj havis sur la tero reĝolandon kaj grandan hundan kastelon. Sed la homoj enviis al la hundoj ilian reĝolandon sur la tero kaj sorĉis tiel longe, ĝis la hunda reĝolando ankaŭ kun la hunda kastelo falis en la terprofundon. Sed kiu rastus sur la ĝusta loko, perrastus groton, kie restis la hunda trezoro."

"Kia estas la hunda trezoro?" demandis la najadoj avide.

”Nu,” diris la maljuna feino, ”ĝi estas halo pompe bela. La kolonoj estas el la plej belaj ostoj, sed ne ĉirkaŭmorditaj, tute ne; sur ili estas tiom da viando, kiom sur anserfemuro. Poste estas tie fumaĵita trono kaj al ĝi kondukas ŝtupoj el plej neta lardo. Kaj sur la ŝtupoj estas tapiŝo el nuraj anduj-ŝeloj kaj en la ŝeloj estas dikfingra farĉo —”

Tion Nukseto ne plu povis elteni. Ĝi ekimpetis sur la herbejon kaj vokis: ”Ha, ha, kie estas la trezoro? Ha, ha, kie estas la hundtrezoro?”

Sed tiumomente per unufojo malaperis ĉiuj hundaj najadoj, ankaŭ la maljuna hunda feino. Nukseto frotis siajn okulojn; nenio tie estis, nur la arĝenta herbejeto, eĉ ne pajlero estis ĉifita pro la danco de la feinoj, eĉ ne roseto defluis teren. Nur la kvieta luno brilis super la ĉarma herbejeto, kaj ĉirkaŭe staris arbaro kiel nigrenigra murego.

Tiam Nukseto rememoris, ke hejme atendas ĝin almenaŭ erigita pano en akvo, ĝi ekkuris hejmen, kiom nur ĝiaj kruroj kapablis. Sed ekde tiu tempo, kiam ĝi iris iam denove kun la avo tra herbejoj kaj arbaroj, de temp’ al tempo ĝi rememorigis al si la hundan trezoron trafalintan sub la teron kaj komencis rasti, furioze rasti per ĉiuj kvar profundan truon en la teron. Ĉar verŝajne ĝi konfidis tion ankaŭ al la hundoj el la najbareco, kaj tiuj al la aliaj, kaj la aliaj al la pluaj, okazas al ĉiuj hundoj en

la mondo, ke ie en la kamparoj ili rememoras la trafalintan hundan reĝolandon kaj rastas truon en la tero kaj flaras, flaras, ĉu el la profundo de la tero ne estas sentebla la fumajita trono de la iama hunda regno.

Fabelo birda

Pa, infanoj, vi ne scias, kion la birdoj babilas. Nome ili interparolas per la homa lingvo nur frumatene, ĉe sunleviĝo, kiam ankoraŭ vi dormas; poste, dum la hela tago, ili ne plu havas tempon por multaj paroloj — vi scias, igas multan penon, tie beki grajneton, tie elterigi lumbrikon aŭ ie ekkapti en la aero muŝon. Tia birda paĉjo povas forkonsumi siajnflugilojn, dume la birda panjo devas hejme varti la infanojn. Tial la birdoj babilas nur frumatene, kiam ili malfermas en siaj nestoj la fenestrojn, elmetas la kusenetojn por aerumo kaj kuiras matenmanĝon.

”Bonmatenon,” krias merlo nestanta sur pino, al najbaro pasero, loĝanta en defluilo. ”Jam temp’ estas.”

”Mi scias, scias, scias,” diras la pasero. ”Jam temp’ flugi, ie ion pinĉi, pinĉi, pinĉi, por ion manĝi, kvivit!”

”Kredu, kredu,” kveretas kolombo sur la tegmento. ”Nuraj zorgoj, karul’. Mankas grajno, mankas grajno.”

”Jes, jes,” jesas la pasero ellitiĝante. ”Tion faras la aŭtoj, ĉu? Dum estis pli da ĉevaloj, ĉie estis disŝutitaj grajnoj sed nun! Nun aŭto pasegas kaj postlasas post si nenion, nenion, nenion!”

”Nur ĝi fetoras, fetoras,” kveras la kolombo. ”Damna vivo, brr! Prefere ĵetegi for la laboraĉon, hometo! Kiom mi rondflugas kaj kveras, kaj kion mi havas por tiu laboro? Eĉ ne manplenon da grajno. Teruraj cirkonstancoj.”

”Ĉu ci opinias, ke ni paseroj pli bone statas?” plumhirtiĝas la pasero. ”Mi diras al ci, se mi ne havus ĉi tie la familion, mi forflugus ien — ”

”Kiel tiu pasero el Dejvice,” aŭdiĝis regolo en vepro.

”El Dejvice?” diris la pasero. ”Tie mi havas iun konaĵon, li nomiĝas Filipino.”

”Tiu li ne estas,” diris la regolo. ”Tiu pasero, kiu forflugis, nomiĝis Joĉjo. Li estis tia hirta pasero, neniam ĝuste sin lavis kaj kombis kaj nur la tutan tagon insultis: ke laŭdire en Dejvice estas enuo kaj tedo, pa, aliaj birdoj, tiuj onidire por la vintro forflugas suden, ekzemple al Riviero aŭ Egiptio, kiel sturnoj kaj cikonioj kaj hirundoj kaj najtingaloj, nur la pasero laboregu la tutan vivon en Dejvice. ’Kaj tiel ni ne lasos tion,’ krietis tiu pasero nomiĝanta Joĉjo; ’se povas flugi en Egiption ia hirundo loĝanta ĉe la angulo, kial, hometoj, mi ne flugu tien? Kaj nepre mi flugos tien, sciu, nur mi enpakos mian dentobroseton kaj noktan ĉemizon kaj rakedon kaj pilkojn, por ke mi povu tie ludi tenison. Atendu, kiel en teniso mi venkobatos Cochet’on kaj Koĵeluh’on kaj Tilde’on; kontraŭ ili mi konas artifikon kaj finton, mi mem, kaj kiam ili eksvingos per la rakedo kontraŭ min,

mi eskapos aŭ fuĝos antaŭ ili, scias? scias? scias vi? Kaj kiam mi venkos ĉiujn, mi edziĝos al riĉa amerikanino kaj poste mi aĉetos palacon de Valdŝejn kaj tie sur la tegmento mi faros al mi neston, sed ne el ia ordinara pajlo, se el rizpajlo kaj marzolino kaj ratafio kaj el marherbo kaj ĉevalkrinoj kaj sciuraj vostetoj, he!’ — Tiel fanfaronis tiu pasero kaj ĉiumatene bruis, ke Dejvice’n li havas ĝisloke kaj ke li flugos al Riviero.”

”Kaj ĉu li flugis?” demandis la merlo de la pino.

”Li flugis,” daŭrigis la regolo en la densejo. ”Nur li atendis ĝis la dudekoka de oktobro pro aŭdi la militkapelon — tiun li ŝategis — kaj matene tuj li ekis suden. Sed la paseroj neniam flugas suden, kaj tial ili ne konas la ĝustan vojon. Kaj tiu pasero Joĉjo eĉ ne havis sufiĉe da tintaĵo aŭ mono por povi tranokti en gastejo, vi scias, ke la paseroj de ĉiam estas proletoj, ĉar dum la tuta tago ili nur flugetas sur tegmentoj. Mallonge, pasero Joĉjo atingis nur Kardaŝova’n Ŝeĉice kaj pluen li ne povis, li havis eĉ ne moneraĉon; eĉ li ĝojis, kiam la paserestro en Kardaŝova Ŝeĉice amike diris al li: ’Ci vagema fripono, ci nenifarulo, ĉu ci opinias, ke en Kardaŝova Ŝeĉice ni havas sufiĉe da ĉevalbuloj kaj ĉeval-ekstrementoj por ĉia vagulo, vagabondo aŭ senhejmulo? Se ci volas, ke ni permesu al ci restadon en Kardaŝova Ŝeĉice, ci rajtas beki nek sur la placo, nek antaŭ gastejo, ankaŭ ne sur ŝoseo, kiel ni malnovloĝantoj, sed nur post la garbejo;

por loĝejo oni destinas al ci aŭtoritate pajlofaskon en la remizeto ĉe la konskripcia numero kvindek sep. Jen subskribu la konskripcian liston kaj marŝ, mi ne vidu cin plu.' — Tiel okazis, ke pasero Joĉjo el Dejvice, anstataŭ flugi al Riviero, restis en Kardaŝova Ŝeĉice.”

”Ĉu li estas tie ĝis nun?” demandis la kolombo.

”Ĝis nun,” diris la regolo. ”Tie mi havas onklinon, kaj tiu rakontis al mi pri li. Onidire nur li mokas la paserojn en Kardaŝova Ŝeĉice kaj nur brupepas: kia nura enuo kaj tede estas al pasero en Kardaŝova Ŝeĉice, nek tramon oni tie havas kiel en Dejvice, nek tiom da aŭtoj, nek sportejoj de Slavia kaj Sparta, nu, totale nenion; por nenio en la mondo li volas morti pro enuo en Kardaŝova Ŝeĉice, li havas ja inviton al Riviero kaj nur atendas, kiam venos al li mono el Dejvice. Kaj li tiom satparolis pri Dejvice kaj Riviero, ke ankaŭ en Kardaŝova Ŝeĉice la paseroj komencis kredi, ke aliloke ili fartus pli bone, kaj tial ili ne plu atentis sian bekadon kaj nur pepas kaj bruas kaj grumblas, kiel tion faras la paseroj ĉie en la mondo, kaj diris: Ĉie aliloke pli da feliĉ', feliĉ', feliĉ'.”

”Jes,” aŭdiĝis parueto, sidanta en la kornusa arbedo, ”ekzistas tiaj strangaj birdoj. Tie apud Kolin, en tia fekunda regiono, vivis hirundo kaj tiu legosciigis en ĵurnalo, ke ĉe ni oni faras ĉion malbone, sed male en Ameriko, hometo, tie estas aliaj ruzuloj, kiuj ĉion kapablas,

kaj alion. Tiu hirundo ekintencis, ke ĝi devas vidi Amerikon. Kaj ĝi veturis tien.”

”Kaj kiel?” rapidis demandi la regolo.

”Tion mi ne scias,” diris la parueto, ”verŝajne ŝipe. Eble ankaŭ per aerŝipo. Ĝi povis fari por si sur la ventreto de la aerŝipo neston aŭ kabinon kun fenestro, por elŝovi la kapon kaj eble ankaŭ kraĉi malsupren. Koncize, post unu jaro ĝi denove revenis kaj diris, ke ĝi estis en Ameriko kaj tie ĉio estas alia ol ĉe ni; ho, tio ne estas komparebla, kia progreso estas tie, ekzemple neniuj alaŭdoj onidire tie estas, kaj la domoj estas tie tiel ege altaj, ke se pasero havus neston sur tegmento kaj el tiu nesto elfalus ovo, la ovo estus falanta tiel longe, ke antaŭ ol ĝi finfalus, dumvoje eloviĝus el ĝi juna pasero kaj tiu maturiĝus kaj edziĝus kaj havus amason da infanoj kaj maljuniĝus kaj mortus en la benita aĝo, do malsupren sur trotuaron anstataŭ la ovo falus maljuna morta pasero. Tiel altaj domoj tie estas. Kaj la hirundo ankaŭ diris, ke en Ameriko ĉio estas konstruata el betono kaj ke ĝi tion lernis; nur ĉiu hirundoj venu rigardi, ĝi montras al ili, kiel oni konstruas hirundan neston el betono kaj ne el koto, kiel tion la malsaĝaj hirundoj faris ĝis nun. Kunflugis do ĉiuj hirundoj de Mnichovo Hradište kaj Časlav kaj Přelouč, el Český Brod kaj Nymburk, jes ankaŭ el Sobotka kaj Čelákovice; estis tiom da hirundoj, ke la homoj devis streĉi por ili dek sep mil tricent kvar-

dek naŭ metrojn da telefon- kaj telegrafdrato, por ke la hirundoj povu sur io sidi. Kaj kiam ĉiuj hirundoj estis kune, la amerika hirundo diris: 'Atentu do, knaboj kaj knabinoj, kiel en Ameriko oni konstruas domojn alinome nestojn el betono. Unue oni alportas amason da cemento. Poste oni alportas amaseton da sablo. Poste oni surverŝas akvon, kaj fariĝas ia kaĉo, kaj el tiu kaĉo oni konstruas modernan neston. Sed kiam vi ne havas cementon, vi ne konstruos neston el betono, sed nur el mortero. Oni faras kaĉon el kalko kaj sablo, sed la kalko devas esti dehidratigita. Unue mi montros al vi, kiel oni dehidratigas kalkon.' Tion ĝi diris kaj ek, jam ĝi flugis al novkonstruaĵo, kiun masonistoj estis konstruantaj, por la ne dehidratigita kalko. Ĝi prenis grajneton en la beketon kaj ek, jam ĝi flugis kun ĝi reen. Sed ĉar en la beketo estas humide, la kalko en la buŝo komencis dehidratiĝi kaj sibli kaj bruldolori. La hirundo ektimis, faligis la kalkograjneton kaj ekkriis: 'Nu do vi scias, kiel la kalko dehidratiĝas. Ajajaj, ĝi bruldoloras! Hu,hu, pikas! Oj, oj, oj, aĥ aĥ aĥ, lalala ho, ve hu hu huj huj ho ve brr uf ho ajajaj, fi, do tiel oni dehidratigas la kalkon!' Kiam la ceteraj hirundoj aŭdis ĝin tiel ege plendi kaj lamenti, ili ne atendis, kio plu okazos, eksvingetis la vosteton kaj flugis hejmen. 'Nu, multe valorus,' ili diris al si, 'ke ankau ni bruldolorigu tiel nian bekon!' Kaj tial la hirundoj ĝis nun konstruas la nestojn el koto kaj ne el betono, kiel

volis tion instrui al ili la hirundoj el Ameriko. — Sed nenio farebla, hometoj, nun mi devas flugi por aĉetaĵo.”

”Onjo parueto,” aŭdiĝis sinjorino merlo, ”se jam vi flugos al la vendoplaco, aĉetu al mi kilogramon da lumbrikoj, sed bele longajn; hodiaŭ mi ne havas tempon por tio, ĉar mi devas instrui flugadon al miaj infanoj.”

”Tion, najbarino, ŝate mi faros al vi,” diris la parueto. ”Mia kora, tion mi scias, kiom da laboro necesas por instrui al la infanoj solide flugi.”

”Certe vi ne scias,” diris sturno sur betulo, ”kiu al ni birdoj instruis flugi? Mi diros do tion al vi; mi scias tion de la karlŝtejna korvo, kiu alflugis ĉi tien, kiam estis grandaj frostoj. Tiu korvo aĝas cent jarojn kaj aŭdis tion de sia avo, al kiu tion diris lia praavo, kiu havis tion de la praonklo de sia avino el la flanko de la panjo, ĝi estas do sanktesankta vero. Vi scias do, ke iam nokte oni povas vidi falantan stelon. Sed tiu falanta stelo tute ne estas stelo; ĝi estas ora anĝela ovo. Kaj ĉar la ovo falas el la ĉielo, ĝi inkandeskiĝas pro la granda falo kaj lumas kiel fajro. Kaj tio estas sankatesankta vero, ĉar tion diris al mi la korvo el Karlŝtejn. Sed la homoj nomas tiujn anĝelajn ovojn iel alie, simile kiel metro aŭ muntisto, mentoro aŭ motoro aŭ iel simile.”

”Meteoroj,” diris la merlo.

”Jes,” konsentis la sturno. ”Tiam ankoraŭ la birdoj ne sciis flugi, sed kuradis surtere kiel kokinoj. Kaj vidante

fali el la ĉielo anĝelan ovon, ili diris al si, ke ili volus ĝin elkovi, por vidi, kia birdo eloviĝos el ĝi. Kaj tio estas ververa vero, ĉar tiel ĝin diris la korvo. Foje vespere ĵus ili parolis pri tio, kiam tute proksime post arbaro bum! el la ĉielo falis ora kaj brilanta ovo, nur ĝi siblegis. Tiam ĉiuj tien ekkuris, plej antaŭe cikonio, ĉar ĝi havas la plej longajn krurojn. Kaj la cikonio trovis la oran ovon kaj prenis ĝin en la manojn; sed la ovo pro la falo estis tute arda, tiel ke cikonio brulvudnis siajn ambaŭ manetojn, sed tamen nun ĝi alportis la ardantan ovon inter la birdojn. Poste rapide hop! ĝi saltis en akvon, por malvarmigi siajn bruldolorajn manetojn. Tial ekde tiu tempo la cikonioj vadas an akvo por malvarmigi siajn grefetojn. Tion rakontis al mi tiu korvo.”

”Kaj kion plu ili rakontis?” demandis la regolo.

”Poste,” daŭrigis la sturno, ”albalanciĝis sovaĝa ansero, por elkovi la ardantan ovon. Sed la ovo estis ankoraŭ tute inkandeska, tiel ke la ansero brulvundis sian ventreton kaj devis salti en fiŝlagon por malvarmigi sian ventreton.

Tial la anseroj ĝis nun naĝas kun la ventreto sur la akvo. Kaj poste venis unu birdo post alia kaj eksidis sur la anĝela ovo, por ĝin elkovi.”

”Ĉu ankaŭ regolo?” demandis la regolo.

”Ankaŭ,” diris la sturno. ”Ĉiuj birdoj de la mondo sidis sur la ovo, por elkovi ĝin. Nur kiam ili diris al la ko-

kino, ke nun estas ĝia vico por sidi, diris la kokino: 'Kluk, kluk, kial, kial, kial, ĉu mi havas tempon? Mi devas beki. Pa, Pa! Kokokodak! Mi estus papag'!' Kaj ĝi ne iris kovi la anĝelan ovon. Kiam ĉiuj birdoj alternis sur la ora ovo, eloviĝis el ĝi dianĝelo. Kaj kiam ili eloviĝis, li komencis nek beki nek pepi, kiel la aliaj birdoj, sed flugis rekte al la ĉielo kaj kantis Haleluja Hosana. Poste li diris: 'Birdetoj, kion mi donu al vi por via amo, ke vi min elkovis? Por tio vi de nun flugos kiel anĝeloj. Jen, vi devas eksvingi laflugilojn kaj hop, jam ĝi flugas. Atentu do: unu, du, tri!' Kaj kiam ĝi diris 'tri', ĉiuj birdoj komencis flugi kaj ili flugas ĝis nun. Nur la kokino ne scias flugi, ĉar ĝi ne volis sidi sur la anĝela ovo. Kaj ĉi tio estas sankta vero, ĉar tiel ĝin rakontis la korvo el Karlštejn."

"Atendu do," diris la merlo. "Unuaa, du, tri!" Kaj tiam ĉiuj birdetoj eksvingis la vosteton, eksvingis laflugilojn kaj ekflugis, ĉiu por sia kantado kaj sia vivtenado, kiel instruis tion al ili la dianĝelo.

Josef Čapek
La unua rabista fabelo

PRI LA DIKA PRAAVO KAJ LA RABISTOJ

Mia mortinta praavo estis profesie mueleja ĉarpentisto kaj krome iam tiam li komercis pri ĉevaloj kaj trifolia semo. Estante naŭdek-okjara li estis, danke dion, ankoraŭ gaja kaj vigla ulo, ronda kaj ruĝetanta kiel pomo, ja, eĉ tiel neordinare dika, ke somere la praavino metis lin en kelon, ĉar supre pro varmo li solviĝus. Li ekloĝis do bele malsupre en la kelo, spiris kaj trinketis bieron kun sukero kaj ĝojis je pri malvarma vetero.

Kiam ĉesis la sufoka vetero, tiam li eliris, balanc-iris, mastrumis, intendantis kaj domrigardis, aĉetadis, vendadis kaj akiradis, najladis, albatadis kaj ĉarpentistis, ŝvitis kaj penklopodis, trampis en babuŝoj kaj klakis per pantofloj, brave manĝis kaj trinkis, kurte, li penadis en sia konsiderinda aĝo kaj respektinda dikeco tiel ĉarme, ke ĉiuj ĝojis pro li. Li havis, homo, la plej heroan ventron en la tuta paroĥo; ja, nia paroĥo ankaŭ fieris pri li. Iu tia alia en la paroĥo ne ekzistis: tiel dika kaj ruĝa, tiel ŝultrolarĝa kaj balanciranta, kun faltoj ĉirkaŭ la okuloj kaj kun tia rondeta nazo kaj dubla mentono.

Ankaŭ en la aliaj paroĥoj ne ekzistis iu tia. Kiam li veturis al la vendoplaco en Hradec Králové, ĉiuj rigardis lin, ĉu studento, episkopo aŭ sinjoro generalo; se nur malsata studento aŭ generalo sekiĝinta kaj morna kiel haringo, se mem sinjoro episkopo eĉ ne proksimume estis tiel dika kaj tiel ruĝvanga, tiel larĝstatura kaj bele balancema kiel mia mortinta praavo.

En la vizaĝo li estis bele razita, sur la nazo, sur la vangoj kaj oreloj ruĝa, preskaŭ violkolora; ĉirkaŭ la kolon li ligis buntan tukon, trans lian ventron volbiĝis forta veŝto kun du vicoj da metalbutonoj, kaj en ĝi li havis egan tabakujon, kiu ampleksis funton da flartabako. Tiel li tie staris inter transportistoj kaj kampistoj, inter muelistoj-kaj muelejaj ĉarpentisatoj kaj parolis kaj rakontis, aŭ sidis en gastejo, se lin la kruroj doloris, kaj tie ili parolis kaj babilis kaj ŝercis. Aĥ, tiaj malnovmodaj kaj solidaj homoj ne plu ekzistas! Sed al mia praavo okazis aferoj tute neordinaraj, kiaj nun ne plu okazas.

Foje do li vendis ĉevalon kaj estis revenanta hejmen kun la hundo Nukseto kaj kelkcent kronoj en la poŝo, kiam inter la montoj surprizis lin ega tempesto. Ĉar la praavo pli ŝatis bieron ol akvon, rapide li serĉis gastejon, kie li povus bele en seko finatendi la pluvegon kaj fulmotondron. Longe-vaste estis nenia konstruaĵo, nur en solejo aĉa gastejo "Ĉe Pendumito kaj Botelo". Kiel jam la nomo sugestas, la gastejo ne havis tute bonan reputa-

cion. Sed ĉar large-vaste estis neniu kaŝejo, restis al la praavo nenio alia ol rifuĝi sub la tegmenton "Ĉe Pendumito kaj Botelo", kaj li faris tion maleme, dum la pluvego tramalsekigis lin ĝishaŭte kaj Nukseton ĝisoste, kaj li malbenis la ŝtormon, trotante preskaŭ spirmanke, al la gastejo, kies ĉiuj fenestroj lumis.

Sed kion nek la bona praavo, nek Nukseto eĉ ne en sonĝo atendis, estas, ke ĉi tie ili enfalos rekte en rabistan balon. Jes, ĝuste la plej malbonaj rabistoj havis tie balon kaj ĉiuj ĉi uloj survestis plej diversajn maskojn. Estis ĉi tie la estro de la rabistoj, la misfama Lotrando, frake vestita, kun blanka kravato kaj gantoj kiel grandsinjoro, lia amatino, la ruza kaj pudrita Kokoteta alivestis sin je baleristino, la misfama murdulo Gorĝotranĉulo vestis sin en helbluan kaj ruĝetan atlason je paĝio, estis ĉi tie la Granda Fripono, la Sanga Jiro kaj Ŝtelulo kaj Longstang, ankaŭ la mava Tranĉemulo kaj la internacia rabisto Dinamito kaj trompulo Arkifripono, mallonge ĉia kanajlaro, kiu surmetis maskojn de turkoj, ĉinoj, ursoj kaj tamburistoj, gurdistoj, kavaliroj kaj ĵonglistoj, ja kiel ĉio estas en maskobaloj. Ĉi tie do ili dancis, festenis kaj amuziĝis kiel tute decaj kaj honestaj homoj, sed el iliaj sarkasmaj okuloj vidiĝis nenio bona. Kaj sub la perukoj ili havis hirtan hararon, survange cikatrojn. Al la Sanga Jiro mankis sur la maldekstro du fingroj, sed la restantaj estis plenplenaj de ringoj, la manojn ili ne havis la-

borkonsumitajn, sed kun grandaj ŝtelistaj artikoj kaj post la ungoj malpuraĵon kaj kelkaj havis ankaŭ malpurajn orelojn, ĉar konstante ili intencas kanajlaĵojn kaj poste forgesas funde lavi sin per sapo kaj varma akvo. Ili nur tuŝetis per malseka manaĉo la vizaĝon kiel kato kaj opinias, ke per tio ĝi finiĝis. Tion do, knaboj, memoru kaj lavu vin funde kiam la panjo ordonos tion matene al vi.

Nu, la praavo tre ekmiris, ke li enfalis rekte en la balon, iom li ektimis, sed ne tuj venis al li ideo, ke tio povus esti ĝuste rabistoj. Nukseto ŝprucetis kaj skuiĝis kaj, mi opinias, tute nenion ĝi pensis. La praavo do salutis: "Bonan amuzon al vi ĉiuj!", flankensidiĝis kaj mendis al si fromaĝetojn kaj bieron. Kaj tiam unu el la rabistoj, kiu ĝuste ĝue regalis sin per eskapoloj, manĝante kun ili alterne kukumojn, glaciaĵon kaj kremtubetojn, diris: "Bonan apetiton!" kaj la avo bele respondis: "Ankaŭ kaj same," ĉar li ŝatis bonkonducon. Sed kompreneble, la rabistoj, vidinte, kia honestulo falis en iliajn manojn, ne bonintencis kun li kaj volis je lia konto malnoble amuziĝi.

Kaj ili komencis. "Sinjoro Dikventrulo," ekpepis moke Kokoketa, kvazaŭ la praavo ne nomiĝus Novotný. "Sinjoro patro, el ni estus bela paro! Mi rezervas por vi unu kvadrilon, skotan dancon, sed ankoraŭ pli ŝate galopdancon." La rabistoj ridegis. Kokoteta estis eĉ troe mal-

dika, kaj galopdanco por la avo! La praavon ĉagrenis tia familiara parolo kaj la rido. Li rememoris la praavinon, kaj kiel mi diras, Kokoteta estis malgrasa kiel ŝindo. Pri tio la bubino devis ne tiel fanfaroni! Kaj la praavo do diris, levante sian grandegan boton kun kalkanferoj kaj botnajloj: "Mi ne prenis por la dancado lakŝuojn, kaj eble, fraŭlineto, mi povus surtreti vian piedeton, kaj vi, mi vidas, vi havas piedetojn kiel stangetojn, kiel alume-tojn, ja eĉ kiel pasero."

Al Kokoteta la respondo ne tro plaĉis, kaj ŝi turniĝis morne al sia Lotrando, kruela rabisto. Lotrando sinistre ektiris siajn tro maldensajn liharojn: "Ha, ĉu ci scias, kie vi troviĝas, ci mizera kampula servutulo? Ci falis inter rabistojn!" La praavo pro ektimo eĉ ekŝvitis; el ĉi tiu renkontiĝo estis atendebla nenio bona. "Mi estas la fama Lotrando," daŭrigis la estro, "kaj jen tiu liuto estas la misfama murdulo Gorĝotranĉulo, kaj tiu turko, li estas la timata Tranĉemulo kaj tiu ĉino, tiu estas la Sanga Jiro, kaj la urso, tiu estas Dinamito, kaj la tamburiso estas Ŝtelulo, kaj la gurdiso, li estas Longstang, kaj la ĵonglisto, tiu estas la Granda Arkifripono, kaj la kavaliro, tiu estas Fripono, ĉiuj miaj sangaj sinjoroj submastroj! Kaj jen nia rabista himno," diris Lotrando kaj komencis kanti:

*Kamaradoj, karaj anoj,
uloj rabaj kaj bandanoj,*

*pretaj riski, trompa ar',
uloj fraŭdaj, murdaj, bataj,
mortigantoj hazardludaj,
al ni bone, al ni hej,
hoj,
kiu volas, al ni voj'!"*

Poste ekkantis la Granda Arkifripono:

*"Ĉenoj el oro, hej, hej,
ring', juvelo kaj ankaŭ gemo.
Atenton, ulo, hej,
se kaptos cin oni, cia fino."*

La ĥoro:

*"Ŝancon do havu sur tiu vojo,
sed nia fin' en malliberejo!"*

Gorĝotranĉulo:

*"Pafpreta pistolo, jej,
akra il' kun kling-radna bril'.
nur ulo, viglu, hej,
ve al ci, se en kaptil'!"*

La ĥoro:

*"Ul' frata, frato, ek al foro,
ja ni ariĝos ĉe prokuroro!"*

La Sanga Jiro:

*"Nur fluu sango, hej,
nur piku, batu kaj pafu!
Ulo, atentu, hej,
Kaj cian vivon ŝatu."*

La ĥoro:

*"Adiaŭ, nia kamarilo,
revidos ni nin sub pendumilo!"*

Tiel kantis la rabistoj kaj tintigis ĥore plenigitajn gla-sojn, dum la praavo tremis, ke ili povas kanti tiel teruran kanton kaj esti dume tiel gajaj. Rapide li meditis, kion fari kaj jen li havis ideon, ke ankaŭ li deĉenigu hororon: do terure li ekokulegis, sulkis la frunton kaj malbele ek-paŭtis kaj provis mensogi: "Mi scias ja," li diris. "Tial mi venis inter vin. Ankaŭ mi estas alivestita. Mi alivestiĝis je la maljuna dika mueleja ĉarpentisto, sed fakte mi estas la fama ŝtelisto, rabisto kaj multobla murdulo Arki-murdulo, kiu mem propramane pikmortigis, tratranĉis kaj murdis sesdek virojn, tridek virinojn kaj dek kvin infanojn kaj elrabis ĉiujn kastelojn kaj burgojn kaj domojn kaj kabanojn en la tuta vasta ĉirkaŭaĵo! Kaj jen mia polica hundo, feroĉa Akrodento," aldiris la praavo, reri-gardante Nukseton.

Sed la rabista bando nur senbride ekridaĉis. Kial ne!

Nukseto bele starsidis kaj humile petis la festenantajn rabistojn pri osteto. Kaj Lotrando moke altenlevis burson kun mono, tabakujon, ja eĉ la buntan poŝtukon, ĉion, kion de la nenioscianta praavo dum lia fanfarona parolo elpoŝigis la elasta ŝtelisteto la Granda Arkifripono. "Jen," diris Lotrando, "sed ĉi tio estas, mi opinias via propra mono, ankaŭ la tabakujo kaj flartabako, kion la Granda Arkifripono tiel bele ŝtelis de vi. Ja, mia kara, vi devas lerni nian metion ĉe ni, se vi volas preni la fremdan kaj reteni vian."

La praavo ekgratis la nukon; el ĉi tiu aĉa situacio, li ekpensis, mi ne eskapos tiel facile. Kaj la rabistoj tuj ekrumoris: "Jes, li devas iĝi nia metilernanto!" — Kiel mi diris: unue ili volis primoki lin kaj ege suferigi kaj kiu scias, kion plej malbonan poste ili intencis kun li.

Kaj Arkifripono ekparolis: "Diru, metilarnanto, kiu estas tiu, kiu havas la sian en fremda poŝo?" Kaj la avo pripensis kaj diris: "Tiu estas priŝtelito; kio estis lia, troviĝas en poŝo de ŝtelisto." "Tute ne, malbone," ridaĉis Arkifripono, "tiu estas ŝtelisto! Tiu havas ja en fremda poŝo sian manon!" La enigmo nepre ne plaĉis al la praavo; li vidis, ke kun tiaj trompuloj neniel li sukcesos: se li estus diveninta, ke ŝtelisto, denove ili primokus lin, ke tiu estas priŝtelito, kaj neniam lasus lin diveni.

"Kaj nun, Granda Arkifripono, diru al li, kiajn kvalitojn devas havi ĝusta ŝtelisto," ordonis Lotrando.

La Granda Arkifripono diskurris antaŭ la praavo kaj komencis lecioni: "Ĝusta Ŝtelisto kaj Etŝtelisto estas nokte nigra, en herbo verda, dum la tago travidebla; li estu maldika kiel drateto kaj elasta kiel angilo por tragliti tra taso-anso, ŝlosiltruo, pordotrueto, murfendeto; li scias kaŝiĝi sub trunketo, nek spiras, nek bruetas, rajtas nek terni kaj nek ektusi, scias krabli sur muro kiel muŝo, kaj manojn, piedetojn li havas senbruaajn kiel katineto, por ke pordo ne grincu kaj planko ne knaru, hundo ne ekboju kaj mastro ne vekigu. Li rajtas havi en la korpo nur unu funton da ostoj kaj sur la korpo tri lodojn da karno por en ĉion engliti, ĉien penetri, ĉie kaŝiĝi, tra ĉio traŝoviĝi kaj tragliti; kiam li estas pli peza aŭ pli dika oni devas lin prihaki kaj hakformi, aŭ ĉirkaŭtranĉi kaj detranĉi per tranĉlameno, priraboti kaj prifajli, deskrapo, forskrapo kaj defroti, glatigi kaj poluri, etendi kaj fleksi, moligi, elastigi kaj armaturi, prifrapo per draŝilo kaj bastonego kaj ruli, fibrigi kaj sekigi en akvo, sub la tero, en fajro kaj en la aero."

La hararo de la praavo hirtiĝis sur la kapo pro hororo kaj jam ekstaris antaŭ li Ŝtelisto kaj demandas: "Kaj kion metilernanto, ci faros, se ci enŝteligus en domon kaj tamen iu vekigu en la apuda ĉambro kaj ekkrius: 'Ĉu estas iu tie?' — Kion ci faros?"

"Mi estus silenta, eĉ ne vorton mi dirus," respondis la praavo.

”Eraro,” mokis lin Longstang, ”ci respondos ege laŭte: ’Neniu!’ por ke la vekito kontentiĝu kaj diru: ’Ho bone, mi opiniis, ke iu tie estas.’ — Kaj se li vokos: ’Iu rabas!’ ci respondos: ’Mi tute ne strabas!’ Kaj se li krios: ’Helpon!’ ci respondos al li ĝentile: ’Dankon por la helpo, ĉion jam mi mem forportos.”

”Kaj nun,” decidis la Sanga Jiro, ”ni instruos lin kiel vera ŝtelisto ekipu sin por ŝtelo! Unue senbotigu cin, sed rapide! alie ni bele plirapidigos cin,” li ordonis kaj alcelis pistolon kontraŭ la praavon, por montri al li, ke kun rabistoj, kiuj emas ŝerci, ne eblas ŝerci. Al la povra praavo restis nenio alia ol obei, kaj li komencis, ĝemante kaj ĝemegante demeti siajn kotplenajn tibiingojn. Estis ege malfacile, nu jes! hejme ĉiam helpis lin dum la senbotigado la praavino, kaj kiam la praavino ne sufiĉis, do ankoraŭ la ceteraj virinoj el la dometo, maljuna Ŝulitková kaj ankaŭ iam Maria Ŝulitková kaj ankaŭ Anna kaj eble ankaŭ Roza kaj foje ankaŭ Ŝulitek kaj Zelinka, kaj nun li mem devis senbotiĝi! Fine la malfeliĉaj botoj estis for kaj la praavo tute spirmanka aperis tie en ruĝe kaj verde striitaj ŝtrumpetoj, kiujn la praavino nunjare vintre trikis al li.

”Estas,” diris Arkifripono, ”por ke neniu cin aŭdu.”

Poste ili prenis tabuleton, sur kiu gastejestro krete notadis ŝuldojn kaj skribis sur ĝi ”NENIU” kaj pendigis ĝin sur la dorson de la praavo.

”Estas, por ke neniŭ cin vidu,” rikanis Dinamito.

Poste Gorĝotranĉulo prenis fulgon kaj nigrigis la tutan vizaĝon de la praavo kaj diris: ”Estas, por ke neniŭ cin ekkonu.”

Fine ili donis en unu lian manon lumantan ŝtelistan lanternon, pendigitan per tordita ŝnureto, tiel, ke ĝi senĉese turniĝis, kaj sub la duan ili enpoŝigis al li ŝtelistan ilaron, ŝtelistajn martelojn kaj tenaĵojn, hakilojn, fajfilojn kaj ĉizilojn, borilojn, boriletojn kaj dirkojn, por ke li bone vidu kaj havu ĉion ĉe mane, ĉion bezonatan.

Tiel la mizera ularo mokis la maljunan povrulon, sed la plej malbona estis venonta.

”Kaj nun ci montros, kiel ci ŝtelirus por rabaĵo bele piedpinte, atente, ke lumo de la ŝtelista lanterno ne turniĝu kaj ne moviĝu, silentege kiel museto, delikate kiel serpenteto kaj leĝere kiel muŝeto, subpremante la spiron kaj haltante ĉe ĉiu paŝo, por ke eĉ ne lignotabuleto en la planko ekknaru, grenereto ekgrincu, trunketo eksusuru aŭ voĉeto eklaŭtu! Kaj se la planko ekknarus, grenereto ekgrincos, trunketo eksusuros kaj voĉeto laŭtiĝos, ni prihakos cin kaj hakformos per hakilo, senpezigos, ĉirkaŭtranĉos kaj detranĉos per tranĉilo, prirabotos kaj prifajlos per rabotilo kaj fajlilo, draŝos kaj batos per draŝilo kaj bastonego kaj martelo, moligos, elastigos kaj armaturos, rulos, fibrigos kaj sekigos sub la tero, en fajro kaj en la aero!”

Frosto trakuris la dorson de la praavo aŭdinte, kiel pezan aferon ili postulas de li. Sed li estis en ilia povo kaj devis obei. La rabistoj jam ronde stariĝis, kiel en cirko, kaj ĝojis je la spektaklo.

”Ek!” ekkriis Lotrando.

La praavo subpremis la spiradon kaj provis piedpin-te ŝteliri. Sed ve! li estis tro peza kaj balancema kaj ne povis konservi la ekvilibron. Li klopodis meti siajn maljunajn kruojn leĝere kaj delikate, kvazaŭ ili estus ovoj, sed ĉe ĉiu paŝeto la planko terure knaris kaj en la genuoj brue kraketis kaj li labile balanciris, kvazaŭ li irus sur ŝnuro, kaj kiam li eksvingis la manojn, tiam ĉiuj ŝtelistaj fajfiloj, marteloj, tenaĵoj, boriloj kaj boriletoj kaj dirkoj ege bruegis, kaj sur la frunto aperis ŝvito kaj li laŭtege ĝemis — kaj la rabistoj ridegis, ĝis la ventrojn ili devis teni, diablo prenu ilin, mizerajn latronojn! tiel ili mokis la aĝon kaj la grizan hararon! Ha! jen subite de ekstere aŭdiĝis ega bruo, ĉevala hufobatado, veturilrulado ka aŭtomuĝado kaj bruado de aviadiloj. La rabistoj impete embarasiĝis kaj tuj ĉesis ridi. Dum ili ridindigadis mian praavon, ili tute forgesis atenti, ke neniuj surprizu ilin. Sed ili ja ankaŭ havis kaŭzon timi, bando mizera! Kaj ĝuste nun ĉia granda bruado haltis ĉe gastejo. La rabistoj paliĝis. Malinde: Tio povus esti generalo kun soldatoj, aŭ landa marŝalo kun armita sekvantaro aŭ eble la plej supera polica komisaro mem kun ĝendar-

moj, policistoj kaj sbiroj, delegita kun granda superforto por ĉirkaŭigi, aresti, kateni la rabistan bandon kaj konduki sub pendumilon.

La rabistoj timtremis; estis malfrue fuĝi, kaj ĉies okuloj senkonsile turniĝis al la estro Lotrando. Lotrando tie staris, tiretis siajn longegajn maldikajn lipharojn kaj meditis. Poste li levis la montrofingron de la dekstra mano, kelkfoje frapetis sian frunton kaj diris: "Ha, jam mi havas ideon! Stariĝu ĉiuj senmove kiel statuoj, kaj eĉ ne iomete moviĝu, nur ĝis mi signos al vi. Mi prizorgos jam ĉion ceteran!" La rabistoj ekstaris kiel statuoj, el koridoro jam proksimiĝis paŝoj; estas la plej urĝa tempo.

La pordo malfermiĝis kaj enpaŝis — nek generalo kun soldatoj, nek landa marŝalo, nek la plej supera sinjoro polica komisaro, sed la potencega Lordo Haveloko el Londono, kiu ĝuste estis vojaĝanta tra ĉi tie kun granda akompano, kun servistaro kaj lakeoj, kuiristoj, kun personaj kuracistoj kaj apotekistoj, personaj detektivoj, gardistoj kaj policistoj.

Lordo Haveloko kompreneble ekmiris, kiam li ekvidis tie stari senmovan maskeradon, ĉion, baletistinon kaj turkon, urson, tamburiston, ĵongliston, paĝion kaj gurdiston. Li haltis en la pordo, surmetis monoklon sur okulon, rigardis ĉirkaŭe kaj diris: "Ah!" La vorto estas angla kaj ĉeĥe same signifas aĥ! Poste li daŭrigis kun angla trankvilo: "Survoje surprizis nin tempesto, kaj mi

intencas ĉi tie kun mia sekvantaro ĝisatendi la matenon. Kaj ĉu eble vi estas la gastejestro?" la Lordo demandis Lotrandon, kiu fervore riverencis al li post la tablo.

"Via moŝto," riverencis la ruzega Lotrando, "mi ne estas gastejestro, sed mi estas je viaj servoj, fama majstro Figurini, posedanto de la tutmonde konata migranta teatro, mirinda panoptiko kun moveblaj pupoj. Jen ili," Lotrando ĉirkaŭmontris siajn rigidajn rabistojn. "Dek kvin jarojn mi laboris super ili, kvin jarojn mi perfektigadis ilin. Ĉiu pupo plena de radetoj, hoketoj kaj movigiloj, nura elektro, nenia trompo. Ĉiu alie vestita, pri diverso instruita, de la efektiva homo preskaŭ nere-konebla. La tempesto restigis ankaŭ nin ĉi tie kun mia eta teatro survoje al la plej brilaj reĝaj kaj dukaj kortegoj, de kiuj mi havas multegajn laŭdajn rekononjn, ordonojn kaj distingojn."

"Aĥ," ekmiris la Lordo, "kion scias viaj moveblaj pupoj?"

"Via ekselenco," gubiĝis Lotrando kompleze, "majstro Figurini ne intencis aranĝi la prezentadon ĉi tie. Sed mi sentas min senlime honorita pro via majesta intereso, kaj mi permesos al mi plenumile prezenti al vi mian tutan teatron."

Lordo Haveloko surokuligis la duan monoklon kaj ek-sidis meze de sia sekvantaro. Lotrando denove riverencis ĝis la planko kaj proklamis: "Unu speciala prezenta-

do por Lia Ekselenco Lordo Haveloko!” Li ektiris la fra-keton kaj kun sia blanka kravato kaj blankaj gantoj al-paŝis al Kokoteta, kiu staris tie en sia baletvesto senmove, eĉ ne palpebrumante, kiel vaksmanekeno en vitrino. Lotrando ŝajnis premi sur ŝia dorso ian sekretan butonon, ekkriis ”Baletistinoj!” kaj jen! Kokoteta — la ruza bando tuj orientiĝis en ĉiu trompado — ekskuis la maldikan kruron, poste levetis la manon, rave ekmienis, faris kelkajn dancpaŝojn kaj kelkfoje gracie turniĝis kaj dancatingite sian lokon, denove ekskuis la maldikan krureton, mallevis la manon kaj senmove haltis.

”Aĥ,” diris la Lordo, ”tio estas tre bela.”

Tuj poste Lotrando alpaŝis al Tranĉemulo, alivestita je turko, ŝajnis kvazaŭ li premus sur li sekretan butonon, palpebrumis je li kaj ekkriis: ”Turko!”, kaj jen! en la turko unue io ekbruetis kvazaŭ en maŝino, poste ĝi kelkfoje tremigis la turkon. La turko krucmetis la manojn sur la brusto, trifoje riverencis kaj prononcis ĉiam klare la turkan saluton: ”Salam Alejkum.”

”Aĥ,” ekmiris la Lordo, ”ankaŭ tio estas tre bela.”

Poste Lotrando funkciigis la Sangan Juron, kiu estis prezentanta ĉinon. Ankaŭ en la ĉino io ekbruetis kaj skuigis lin, poste li levis la manojn kun altenlevitaj mon-trofigroj, trifoje riverencis kaj trifoje salutis: ”Ĉi ĉu ha, ĉiri miri ho.”

”Aĥ,” esprimiĝis la Lordo. ”Bela ĉino.”

Tiel do prezentis Lotrando al la Lordo sian tutan teatron: Gorĝotranĉulon kun liuto, kiu pinĉis kanteton, poste kavaliro Arkifripono ekgenuis, ĵuris kaj aklamis trifoje "Hura", la ĵonglisto Granda Fripono faris kapriolon, la urso Dinamito murmuris kaj mallerte turniĝis ĉirkaŭe, la tamburisto Ŝtelulo dume tamburis kaj la gurdisto Longstang turnis krankan de gurdo.

"Aĥ," diris la Lordo. "Belaj moveblaj pupoj. Kion vi postulas por ili, majstro Figurini?"

"Via Ekscelenco," respondis Lotrando, "mi donos ilin malkare al vi, pro vi. Bonvolu mem fiksi la prezon."

"Mi donos cent mil," decidiĝis la Lordo. "Mia kasisto morgaŭ elpagos ilin al vi. Mi lokos la pupojn en mia dormoĉambro."

Jen io por Lotrando vidanta kiel la Lordo mem enkaptiĝas. Kia bela okazo por lia rolo, murdi la Lordon, kiam ĉiuj dormos, kaj akiri grandegan predon!

"Ekscelenco," li riverencis malice, "mi estas feliĉega, ke miaj pupoj havos la grandan honoron restadi en via nobla proksimeco."

Lordo Haveloko tre kontentigita volis jam leviĝi de la seĝo, sed tiam lia vido malkovris mian praavon starantan en angulo en siaj striitaj ŝtrumpoj, kun malpurigita vizaĝo kaj surdorse kun pendigita tabuleto. "Aĥ," ekmiris la Lordo, "kaj kion scias ĉi tiu pupo, majstro Figurini?"

Nia Lotrando tute forgesis nian praavon, kaj nun ne povis rapide elpensi por li iun rolon. Tute li konfuziĝis kaj komencis balbuti: "Ĝi estas, — ĝi estas — mi petas — ee — ĝi estas Neniu. Nome — ee ĉi tiu pupo ankoraŭ nenion scias, ĝi ne estas — ee ankoraŭ preta."

Sed mia dika praavo ne estis novnaskito kaj opiniis, ke nun li mem ege lecionos la rabistojn. Lotrando ankoraŭ ne finbalbutis, kaj la praavo komencis ludi rolon, kiun antaŭ tempeto la rabistoj mem instruis lin. Li komencis antaŭ ĉiuj subite piedpinte ŝoviĝi kiel ŝtelisto —

Lotrando mutiĝis, la Lordo mire alokulis la trian monoklon, ekkriis "Ah," kaj kun li ekkriis "Aĥ" lia tuta akompanantaro.

Kaj la praavo ŝteliste ŝoviĝis unue al Ŝtelulo, trapalpis lian vestaĵon kaj elpoŝigadis ĉiujn liajn dirkojn, borilojn, ĉizilojn, kaj boriletojn kaj ĉiun ŝtelistan ilaron kaj aldone al tio kantis la unuan strofon de la rabista himno:

*"Kamaradoj, karaj anoj,
uloj rabaj kaj bandanoj,
pretaj riski, trompa ar',
eŝtelistoj, friponar',
al ni bone, al ni hej,
hoj,
kiu volas, al ni voj'."*

"Aĥ, diris Lordo Haveloko kaj kun li la tuta akompa-

nantaro. La unua adjutanta lorda detektivo Ŝerlok Holmes pintigis la orelojn: li komencis senti, ke temas pri io.

Kaj nun la praavo komencis kanti la duan strofon de la rabista himno:

*"Ĉenoj el oro, hej, hej,
ring', juvelo kaj ankaŭ gemo.
Atenton, Fripono, hej,
se kaptos cin oni, cia fino,"*

kaj celis al la Granda Arkifripono kaj dum la kantado elpoŝigadis la de li ŝtelitajn juvelojn, orajn objektojn, braceletojn, horloĝojn kaj ringojn. Tio estis preskaŭ tuta oraĵista butikoj.

"Aĥ," ekkriis Lordo Haveloko kun kun li la tuta akompanantaro. La dua adjutanta detektivo de la Lordo, Stuart Webbs, pintigis la orelojn: li komencis antaŭvidi, ke temas pri io.

Kaj la praavo kantis:

*"Pafpreta pistolo, hej,
akra il' kun kling-randa bril'.
Nur, ci ulo, viglu, hej,
ve al ci, se ci en kaptil'!"*

kaj estis eltiranta de sub la vestaĵo de Gorgotranculo murdilojn, tranĉilojn kaj pistolojn kaj ponardojn.

"Aĥ," ekkriis Lordo Haveloko kun ku li la tuta akom-

panantaro. La tria adjutanta detektivo de la Lordo, Joe Deeks, pintigis la orelojn: li komencis senti, ke temas pri io.

Mia dika praavo kantante tiel ĉiujn strofojn de la kanto traserĉis unu rabiston post la alia kaj forprenadis de ili ilian ŝtelistan ilaron kaj ŝtelitajn objektojn kaj murdarmilojn kaj ĉion ĉi li estis metanta teren. Lordo Haveloko ĉiam ekkriis "Aĥ" kaj kun li tuta lia akompanantaro kaj sinsekve pintigis la orelojn ankaŭ la adjutnataj lordaj detektivoj Higgs, Lutz, Leblanc kaj Pitt.

Lotrandon la praavo lasis por la fino. Li elpoŝigis de li sian burson kun mono, tabakujon, el kiu tuj abunde li pinĉprenis, ankaŭ sian multokoloran poŝtukon, en kiun li ektrumpetis tiel brue kiel je ĉaskorno, kaj je tio kantis:

*"Nur flugu sango, hej,
nur piku, batu kaj pafu!
Lotrando, atentu,
kaj cian vivon ŝatu!"*

"Ha, Lotrando," ekkriis la lorda adjutanto detektivo Klifron, kiu nun ekhavis certecon, ke temas pri la timata Lotrando kaj liaj komplicoj. "Lotrando!" ekkriis ĉiuj adjutantaj detektivoj de la Lordo kaj eltiris ŝnurojn, katenojn kaj feraĵojn.

"Lotrando!" ekkriis Lordo Haveloko kaj surokuligis la kvaran monoklon. "Lotrando!" ekkriis la sekur-gardista-

ro de la Lordo, gardistaro kaj gardistoj kaj sbiroj kaj akcelis je la estro kaj lia bando fusilojn.

”Ja, miaj karuloj, vi devas veni al mi por lerni, se vi volas prenadi la fremdan kaj la sian reteni,” diris la praavo al la rabistoj.

Lotrandon kaj la rabistojn oni katenis kaj forkondukis ankaŭ kun Kokoteta kaj transdonis al tribunalo.

Mia dika praavo sin ŝuis kaj lavis kaj Lordo Haveloko dankis al li, ke li savis lin de la terura danĝero. Li donacis al li krom aliaj objektoj ankaŭ belegan tabakujon, plenigitan de bonodora flartabako, el kiu poste la praavo igis gustumi al ĉiuj muelejoj ĉarpentistoj ka ĉeval-komercistoj kaj komercistoj kun trifolia semo el la tuta regiono.

La praavo venigis Nukseton, kiu dume en la angulo bone satigis sin per restaĵoj de la rabista festeno tiel, ke ĝi apenaŭ povis moviĝi. La praavino bonvenigis ilin hejme tre malmilde, ĉar ili iras tiel malfrue el la gastejo, sed kiam la praavo rakontis, kio entute okazis, ŝi ekĝojis, ke ĝi tiel bone finiĝis.

Fabelo niksa

Se, infanoj, vi opinias, ke niksoj ne ekzistas, mi diras do al vi, ke ili ekzistas, kaj kiaj! Tiel ekzemple ĝuste ĉe ni, kie ni naskiĝis, loĝis unu en rivero Úpa sub la flu-baro, kaj unu estis en Havlovice apud la ligna ponto, kaj unu restadis en la rivereto Radeč, li estis germano germana, eĉ ne unu ĉeĥan vorton li sciis; foje li venis al mia paĉjo, por eltirigi sian denton, kaj rekompence alportis al li korbeton da arĝentaj kaj rozaj trutoj bele kovritajn per urtikoj, por ke ili restu freŝaj; kaj ke li estis nikso, videblis el tio, ke post li restis sur seĝo malseko. Kaj unu estis apud la muelejo de la avo en Hronov kaj tiu bredis sub la flu-baro dek ses ĉevalojn; tial la inĝenieroj diris, ke tie surloke la rivero Metuje havas dek ses ĉevalfortojn. La dek ses blankaj ĉevaloj senĉese tiris kaj tiris, kaj tial la muelejo senĉese muelis; kaj kiam foje nokte nia avo mortis, la nikso iris kaj silente maljunigis ĉiujn dek ses ĉevalojn kaj la muelejo dum tri tagoj ne muelis. En la grandaj riveroj estas niksoj havantaj multe pli da ĉevaloj, eble kvindek aŭ cent; sed kelkaj estas tiaj malriĉuloj, ke eĉ ne lignan bokon ili havas.

Tia grandnikso en Prago, en Vultavo, memkomprene

estas ege riĉa kaj granda sinjoro; eble ankaŭ li havas motorboaton kaj somere veturas al la maro. En Prago ja tute ordinara subakvisto* havas tiom da mono, kiom da ŝeloj, kaj veturegas en aŭtomobilo, hu, hu, ĝis la koto ŝprucas. Sed ankaŭ estas tiaj sentaŭgaj etniksetoj havantaj marĉeton kiel manplaton kaj en ĝi unu ranon, tri kulojn kaj du skarabojn ditiskojn; ankaŭ ili havas sian metion sur tiel aĉa kanaletto, ke en ĝi eĉ ne muso malsekegitigas sian ventreton; pluraj en la daŭro de la jaro kaptas ne pli ol kelkajn papersĉipetojn kaj infan-vindon, kiun la akvo forportis de iu panjo dum lavado. Kaj denove tia nisko el Romberk eble havas ducent dudek mil karpojn kaj krome tinkojn, perkojn, barbiojn kaj ian denthavan ezokon. Nu jes, ekzistas nenia egaleco en la mondo.

Niksoj estas soleculoj, sed tamen unufoje, dufoje jare, kiam estas granda akvo, ili kolektiĝas el la tuta regiono kaj aranĝas, kiel oni tion nomas, distriktan konferencon. El nia regiono ili kunvenadis ĉiam dum la granda akvo sur la herbejoj apud Gradecio, ĉar tie estas tia bela ebenaĵo kaj belaj profundaĵoj kaj golfetoj kaj sakbranĉoj substernitaj de la plej delikata ŝlimo subtila. La ŝlimo devas esti flava aŭ nur iom bruneta; se ĝi estas ruĝa aŭ griza, ĝi ne plu estas tiel supla, kiel unĝento. Sur tia bela malseka loko ili kunsidas do kaj rakontas, kio nova:

ke tie en Suchovršice oni faras reguligon, do tiea nikso, nome la maljuna Jireček, devas de tie transloĝiĝi; ke la potoj kaj rubandoj plikariĝis, kia teruro: nikso, se li volas iun kapti, aĉetu por tridek kronoj rubandojn, kaj poteto kostas minimume tri kronojn kaj krome ĝi estas varaĉo; plej bone forlasi la metion kaj ekfari ion alian. Kaj tiam la niksoj rakontas, kiel nikso Faltys el Jaromýšl, tiu rufa, komencis komerci kaj vendas mineralakvojn, kaj la lama Slepánek iĝis instalisto kaj faras akvokondukiilojn, kaj aliaj bonhaviĝis per alia metio. Memkomprene, infanoj, nikso povas fari nur tian metion, en kiu estas io de la akvo; li povas esti akvokonkuranto aŭ subakvisto, li povas pentri akvarelojn, li povas havi akvarion aŭ esti okupata ĉe akvoturo, li povas inspekti akvofalon aŭ akvumadi, li povas negoci kun akvamarinoj* — koncize, ia akvo devas enesti.

Kiel vi vidas, restas por la niksoj sufiĉe da metioj, kaj tial ili senĉese malpliĝas; ili kalkulas sin dum siaj jar-konferencoj kaj malĝoje diradas: "Denove ni malpliĝis je kvin; junuloj, tiel nia profesio iom post iom forpasos."

"Nu," diris la maljuna Kreuzman, nikso el Trutnov, "ne plu estas tio, kio estis. Mia kara, pasis de tiam terure multaj jarmiloj; tiam la tuta Bohemio estis sub akvo, kaj homo, tion mi diras, nikso, tiam ja la homoj ankoraŭ ne ekzistis, nu jes, tiam estis aliaj tempoj — damne, kie mi ĉesis?"

”Ke la tuta Bohemio estis sub akvo,” helpis al li nikso el Skalice.

”Ha,” diris Kreuzmann. ”Tiam tuta Bohemio estis sub akvo, Altman kaj Červená Horka kaj Krákorka kaj ĉiuj ceteraj montoj; kaj nikso povis per malseka piedo bele iri sub la akvo eventuale de Brno ĝis Prago. Ankaŭ sur la Neĝomonto estis ulno da akvo. Homoj, kiaj tempoj tiam estis.”

”Jes, estis,” rememoris nikso Kulda el Ratibořice. ”Tiam ni niksoj ankoraŭ ne estis tiaj soleculoj kaj ermitoj kiel nun. Tiam ni havis subakvajn urbojn, konstruitajn el akvobrikoj, kaj la meblaro estis skulptita el malmola akvo, kaj la kusenoj estis el mola pluvakvo, kaj oni hejtis per varma akvo; kaj estis nek fundo nek ia bordo nek akvosurfaco; estis nur la akvo kaj ni.”

”Jes,” diris Vulpo nomata Blekanto, nikso el la malsekejo en Žaborky, ”kaj kia akvo estis tiam! Oni povis ĝin tranĉi kiel buteron kaj fari kuglojn el ĝi, kaj fadenojn el ĝi ŝpini, kaj ŝnurojn el ĝi tordi; ĝi estis kiel ŝtalo kaj kiel lino kaj kiel vitro kaj kiel lanugo kaj densa kiel kremo, kaj firma kiel kverko, kaj ĝi varmigadis kiel peltmantele. Ĉio estis farita el akvo. Karulo, tia akvo nuntempe estas eĉ ne en Ameriko, tute ne!” Kaj la maljuna Vulpo kraĉis, ĝis estiĝis tie profundaĵo.

”Estis,” diris Kreuzmann enpense, ”estis tiam ege bela akvo, sed ĝi estis ankaŭ, nu nu, tute muta.”

”Kiel?” ekmiris Zelinka, kiu ne aĝis tiom, kiom la aliaj.

”Nu, ĝi estis muta,” diris Vulpo Blekanto. ”Ĝi havis neniun voĉon. Ĝi ankoraŭ ne sciis paroli. Ĝi estis tiel silenta kaj muta, kiel nun, kiam ĝi frostiĝis. Aŭ kiel kiam falis neĝo kaj estas noktomezo kaj nenio movas sin; kaj tiam estas tia silento, tia silenta silento, ke eĉ angoron vi sentas, kaj tiam vi elmergas la kapon el la akvo kaj aŭskultas; kaj via koro kunpremiĝas pro la senmezura silento. Tia silento tiam regis, kiam la akvo estis muta.”

”Kaj kial,” demandis Zelinka, kiu aĝis nur sep mil jarojn, ”kial nun ĝi ne plu estas muta?”

”Tio okazis jene,” diris Vulpo. ”Al mi tion rakontis mia praavo, kaj diris, ke ekde tiam pasis pluraj milionoj da jaroj. Tiam vivis do iu nikso, kiel nur li nomiĝis? Rákosník, ne Rákosník, Minařík, ankaŭ ne, Hampl, ankaŭ ne Hampl, Pavlásek ankaŭ ne, mil tondroj, kiel nur li nomiĝis?”

”Arion,” diris Kreuzmann.

”Arion,” jesis Vulpo. ”Ankaŭ mi ĝin havis sur la pinto de la lango. Arion li nomiĝis. Kaj tiu Arion havis ian strangan donacon, ian kapablon de disinjoro, nu tian talenton, ĉu? Li sciis tiel bele paroli kaj kanti, ke la koro al oni ĝojbatis kaj denove eklploris, kiam li ekkantis. Tia muzikanto li estis.”

”Poeto,” korektis Kulda.

”Muzikanto aŭ poeto,” diris Vulpo, ”sed kiel li sciis

tion, mia kara. Mia praavo diris, ke ĉiuj ploris, kiam li ekkantis. Li havis, tiu Arion, grandan doloron en la koro. Neniu scias, kian. Neniu scias, kio malbona okazis al li. Sed ĝi devis esti terura doloro, ĉar li kantis tiel bele kaj tiel triste. Kaj kiam li sub la akvo tiel kantis kaj lamentis, tremis ĉiu akvero, kvazaŭ ĝi estus larmo. Kaj en ĉiu akvero postrestis io el lia kantado, kiel ĝi estis penetranta tra la akvo. Ĉiu guteto kaptis iom de lia voĉo. Kaj tial la akvo ne plu estas muta. Tial ĝi sonoras, tintas, susuras kaj flustras, lirlas kaj ŝaŭmas, plaŭdas, murmuras, muĝas, bruas, ĝemas kaj veas, bruegas, muĝegas, siblegas kaj tondras, suspiras kaj vespiras kaj ridas, ludas kvazaŭ sur arĝenta harpo, trilas kiel balalajko, kantas kiel orgeno, blovegas kiel ĉaskorno kaj parolas kiel homo ĝojanta aŭ tristanta. Ekde tiu tempo la akvo parolas per ĉiuj lingvoj de la mondo kaj rakontas aferojn, kiujn plu neniu komprenas, tiel strangaj kaj belaj ili estas. Kaj malplej komprenas ilin la homoj. Sed antaŭ ol Arion venis kaj instruis la akvon kanti, ĝi estis same muta, kiel mutas la ĉielo.”

”Sed Arion ne estis tiu, kiu alportis la ĉielon en la akvon,” diris la maljuna Kreuzmann. ”Tio okazis pli poste, dum la vivo de mia paĉjo, dio donu al li eternan gloron, tion faris nikso Kvakvakvakŭaks, kaj nome pro la amo.”

”Kiel ĝi okazis jene, Kvakvakvakŭaks enamiĝis. Kvak-

vakvakŭaks vidis principinon Kŭakŭakŭaksinon kaj ame ekflagris al ŝi, kvak. Kŭakŭakŭaksino estis bela. Ŝi havis flavan ranan ventreton kaj ranpiedetojn kaj la ranbuŝon de la orelo, kaj estis tute malseka kaj malvarma; tia belulino ŝi estis. Tiaj ne plu estas.”

”Nu, kaj plue?” demandis nikso Zelinka avide. ”Nu, kio estis? Kŭakŭakŭaksino estis belega kaj fierega. Ŝi nur ŝveligadis sin kaj diradis kvak. Kvakvakvakŭaks estis kvazaŭ freneza. Se ci prenos min kiel edzon, li diris al ŝi, mi alportos kaj donos al ci, kion nur ci deziros. Kaj tiam ŝi diris: Alportu do al mi la bluon el la ĉielo, kvak.”

”Kaj kion faris Kvakvakvakŭaks?” demandis Zelinka.

”Nu, kion li faris? Li sidis sub la akvo kaj lamentis” Kva, kva kva kva, kva kva kva. Kaj poste li voli sin mortigi. Tial li saltis el la akvo aeren. Kvakvakvakŭaks estis la unua.”

”Kaj kion li faris en la aero?”

”Nenion. Li ekrigardis supren, kaj super li estis la blua ĉielo. Li ekrigardis malsupren, kaj ankaŭ sub li estis la blua ĉielo. Kvakvakvakŭaks ekmiregis. Tiam ankoraŭ neniu sciis, ke la ĉielo respeguliĝas en la akvo. Kiam Kvakvakvakŭaks ekvidis, ke sur la akvo estas la blua ĉielo, ekkriis pro surprizo ’kvak’ kaj falis denove en la akvon. Kaj poste li prenis Kŭakŭakŭaksinon surdorsen kaj ek saltis kun ŝi en la aeron. Kŭakŭakŭaksino ekvidis sur la

akvo la bluan ĉielon kaj ekkriis pro ĝojo 'kavkva'. Ĉar Kvakvakvakŭaks alportis al ŝi la bluan el la ĉielo."

"Kaj kio plu estis?"

"Nenio. Poste ili kune feliĉe vivis, kaj naskiĝis al ili multe da frajo. Kaj ekde tiu tempo la niksoj rampas el la akvo eksteren, por vidi, ĉu la ĉielo estas ankaŭ tie, kie estas ilia hejmo. Kiam iu forlasas la hejmon, li estu kiu ajn, kaj rerigardas, kiel Kvakvakvakŭaks ekrigardis la akvon, vidas ke tie hejme estas la ĝusta ĉielo. Sciu, tiu ĝusta blua kaj bela ĉielo. Kvak."

"Kaj kiu tiun pruvis?"

"Kvakvakvakŭaks!"

"Kaj kŭakŭakŭaksino!"

Ĝuste tiumomente preteriris iu homo kaj pensis: "Kiel hodiaŭ la ranoj kvakas!" Kaj li ekprenis ŝtonon kaj ĵetis ĝin en la malsekejon. La akvo alten ekŝprucis, ekplaŭdis, kaj estis silente: ĉiuj niksoj saltis en la akvon, kaj nur venontjare ili denove konferencos.

Dua rabista fabelo

Okazis jam antaŭ ege longa tempo, tiel longa, ke eĉ la mortinta maljuna Zelinka, dio donu al li eternan gloron, tion ne memoris, kaj tiu memoris ja ankaŭ mian mortintan dikan praavon. Okazis do antaŭ treege longe, kiam en la Brendymontaro regis la glora kaj mava rabisto Lotrando, murdulo el ĉiuj plej kruela, kun siaj dudek unu helpantoj, kontrabandistoj kaj ricelistoj. Tiu Lotrando embuskis do ĉe ŝoseo al Poříčí aŭ al Kostelec aŭ Žalronov, ĝis preterveturos iu veturigisto, komercisto, judo aŭ kavaliro sur ĉevalo; tiam li ekpaŝis kontraŭ lin, ekkriegis kaj prirabis ĉion, kaj la trafito krome ankoraŭ povis ĝoji, ke Lotrando lin ne trapikis, ne pafmortigis aŭ ne pendigis sur arbo. Tia murdulo kaj malhumano estis tiu Lotrando.

Veturas tia komercisto survoje, diras al la ĉevaloj "tpru" kaj "hot" kaj ĝojas, por kiom li vendos en Trutnovsian varon. Kaj veturante tra arbaro, iom li timas la rabistojn, sed por ne vidigi tion sur si, li fajfas al si belan kanteton. Kaj subite elpaŝas el la arbaro ulo kiel monto, pli larĝa ol sinjoro Šmejkal aŭ sinjoro Jahelka, se ankoraŭ je du kapoj pli alta, kaj krome plenbarba, ke pro la

nura barbo li ne vidas sian buŝon; do tia ulaĉo stariĝas antaŭ la ĉevalojn kaj kriegas: "Monon aŭ vivon," kaj celas la komerciston per pistolo larĝa kiel bombkanono. Memkomprene, la komercisto donas la monon, kaj Lotrando krome prenas de li ankaŭ la veturilon kaj la varon kaj la ĉevalojn, sed ankaŭ jakon, pantalonon, kaj detiras de li la botojn kaj ankoraŭ aldonas al li kelkajn vipobatojn, por ke, la povrulo, kuru pli leĝere hejmen. Kiel mi diras al vi, tiu Lotrando estis nenio alia al pendumoto.

Sed ĉar longe-vaste estis neniu rabisto (nur apud Maršov estis alia, sed tiu estis fuŝulo kompare al Lotrando), la rabista metio de Lotrando prosperis ege bone, tiel ke li estis pli riĉa ol ia kavaliro, aŭ fabrikanto. Ĉar li havis etan fileton, diris al si la maljuna rabisto: "Pa, mi sendos lin ien studi, kostu eĉ plurajn milojn, tion mi povas permesi al mi; li lernu la germanan kaj francan, li sciu bele diradi pitŝen kaj ĵevuzem, kaj ludi pianon, kaj danci menueton aŭ kvadrilon, kaj manĝi el telero kaj mungi en poŝtukon, kiel decas kaj konvenas. Mi estas ja nur rabisto, sed mia filo estu kiel ia grafo. Kaj jam mi diris tion kaj sufiĉe."

Li diris tion, prenis la etan Lotrandon antaŭ sin sur ĉevalon kaj jam galopis al Broumov. Tie li demetis la fileton de la ĉevalo antaŭ monaĥejo de patroj benediktanoj kaj terure tintegante la spronojn li iris rekte al la patro prioro. "Via pastra moŝto," li diris dikvoĉe, "mi lasos al

vi ĉi tiun bubeton por edukado, por ke vi instruu lin manĝi, mungi kaj danci kaj diradi 'pitŝen' kaj 'ĵevuzem' kaj ĉion, kio necesas, kiam oni jam estas kavaliro; kaj jen," li diris "por tio estas sako da dukatoj, luidoroj, florenoj piastroj, rupioj, dubleoj, rubloj, taleroj, napoleon-doroj, gineoj, arĝentaj talantoj, kaj nederlandaj guldenoj kaj piŝtoloj kaj pundoj, por ke li fartu ĉe vi kiel princideto."

Tion dirinte, li turniĝis sur la kalkano kaj ek en la arbarojn, lasante al la patroj benediktanoj la etan Lotrandon por zorgado.

Tiel do la eta Lotrando lernis kun multaj princidetoj, grafidoj ka aliaj riĉaj junuletoj en la konvento ĉe la sinjoroj patroj; kaj la dika patro Spiridono instruis lin diradi "pitŝen" kaj "gorsamadinr" germane, kaj patro Dominiko enkapigis al li diversajn francajn "treŝarme" kaj "silvuple", kaj sinjoro patro Amadeo instruis al li ĉiujn komplimentojn, menuetojn kaj bonmanierojn kaj sinjoro ĥorestro Kraupner instruis lin mungi, ke ĝi sonu delikate kiel fluto aŭ subtile kiel ŝalmo, kaj ne, ke ĝi trumpetu kiel kontrafagono, trombono, jeriĥa trumpeto, piŝto aŭ aŭto, tiel kiel trumpetadis la maljuna Lotrando; konci-ze, ili instruis al li la plej delikatajn manierojn kaj noblaĵojn kiel al vera kavaliro. Ja, la juna Lotrando estis en la nigra velura vesto kun punta kolumo ege bela knabo, kaj tute li forgesis, ke li kreskis en la rabista groto en la

sovaĝa montaro Brendy, ke lia patro, la maljuna murdulo kaj rabisto Lotrando, iradis en bovofelo kaj fiodoris ĉevalviande kaj manĝis krudan viandon nur per nudaj manoj, kiel jam rabistoj tion faras.

Mallonge, la juna Lotrando floris laŭ scioj kaj ĝentileco, kaj ĝuste meze de la plej bona studado, krak-eksonis ĉevalhufoj antaŭ la konvento de Broumov kaj de ĉevalo saltis hirta bubego, frapegis la pordegon, kaj kiam la patro-pordisto enlasis lin, li diris krudvoĉe, ke li veturas por la juna sinjoro Lotrando, ke lia patro, nome la maljuna Lotrando pretiĝas morti kaj vokas al si sian solfilon, por ke li transprenu lian metion. La juna Lotrando do larmokule adiaŭis la respektindajn patrojn benediktaĵojn, same ankaŭ la ceterajn junajn sinjoretojn kaj studentojn, kaj veturis kun la bubego al Brendy, cerbumante, kian metion la patro volas postlasi al li, kaj promesante al si, ke li ĝin gvidos diplaĉe, noble kaj kun modela ĝentileco al ĉiuj homoj.

Tiel ili alveturis al Brendy, kaj la bubego kondukis la junan sinjoron al la mortlito de la patro. La maljuna Lotrando kuŝis en granda groto sur stoko da netanitaj bovofeloj kaj kovrita per ĉevalkovraĵo.

”Nu, Vincenzo, ci lantulo,” peze li aŭdiĝis, ”ĉu ci kondukas jam mian bubon?”

”Kara patro,” ekvokis la juna Lotrando genuante, ”dio

bonvolu restigi vin longajn jarojn por ĝojo de la proksimuloj kaj neeldirebla fiero de via idaro.”

”Lante, knabo,” diris la maljuna rabisto. ”Hodiaŭ mi veturos en la infernon kaj ne havas multe da tempo por via kverado. Mi opiniis, ke mi postlasos al vi sufiĉe grandan havaĵon, por ke vi vivu el tio senlabore. Sed tondre, bubo, kiaj mizeraj jaroj estis nun por nia metio.”

”Aĥ, patro,” ĝemis la juna Lotrando, ”mi ne antaŭvidis, ke vi suferas mankon.”

”Nu jes,” murmuris la maljuna, ”Sciu, mi havas podagron kaj mi ne povis foiri malproksimen de ĉi tie. Kaj al la plej proksimaj ŝoseoj la komercistoj, sagaculoj, ial evitadis. Plej urĝa tempo, ke mian laboron transprenu iu pli juna.”

”Kara patro,” diris la juna sinjoro fervore, ”mi ĵuras per ĉio en la mondo, ke mi transprenos vian laboron kaj plenumados ĝin honeste, kompleze kaj al ĉiu maksimume afable.”

”Mi ne scias, kiel vi sukcesos per afableco,” ekgruntis la maljuna. ”Mi faris tion jene, ke mi pikmortigis nur tiujn, kiuj volis sin defendi. Sed komplimentojn, fileto, al neniu mi faris; sciu, tio iel ne konvenas al mia metio.”

”Kaj kiu estas, kara patro, via metio?”

”La rabistado,” diris la maljuna Lotrando kaj mortis.

Tiel la juna Lotrando restis sola en la mondo, konsternita ĝisfunde kiel pro morto de la patro, tiel pro la ĵuro,

per kiu li devontigis sin esti rabisto post li. Post tri tagoj venis al li la hirta bubego Vincenzo, ke plu nenio estas por manĝo kaj oni devas, liadire, komenci jam orde labori.

”Kara bubego,” diris la juna Lotrando lamente, ”ĉu fakte devas tiel esti?”

”M’komprene,” rediris Vincenzo malafable. ”Ĉi tie, hometo, neniu pastreto alportos al ni farĉitan kolombidon. Kiu volas manĝi, laboru.”

La juna Lotrando prenis do belegan pistolon, surĉevaliĝis kaj rajdis sur ŝoseo, nu, ni diru, sur ŝoseo apud Blatovice. Tie li kuŝiĝis embuske kaj atendis, ĝis preterveturos iu komercisto, por lin prirabi. Kaj fakte post kelkaj horoj estis alveturanta tolvendisto, veturiganta tolojn al Trutnov.

La juna Lotrando eliris al la kaŝejo kaj profunde demetis ĉapelon. La tolvendisto ekmiris, ke lin salutas tia bela sinjoreto, nu, kaj ankaŭ demetis la ĉapelon kaj diris: ”Ĝis eterne, juna sinjoro.”

Lotrando alpaŝis pli proksimen kaj denove demetis la ĉapelon. ”Permesu,” li diris dolĉe, ”mi esperas, ke mi ĝenas vin.”

”Pa, dio mia, nepre ne,” diris la tolvendisto, ”kaj per kio mi povus servi al vi?”

”Mi petas vin, sinjoro, plej insiste,” plu parolis Lotran-

do, "ke vi ne timiĝu. Nome mi estas rabisto, la terura Lotrando el Brendy."

La tolvendisto estis ruza kaj eĉ ne iom timiĝis. "Aj, aj," li diris gaje, "do kolego. Ankaŭ mi estas rabisto, kaj nome la Sanga Klingo el Kostelec. Certe vi konas, ĉu?"

"Mi ne havas la honoron," senkulpigis sin Lotrando embarase, "mi estas ĉi tie, sinjoro kolego, hodiaŭ unuafoje. Nome mi transprenis la entreprenon de mia sinjoro patro."

"Ha," diris tolvendisto Klingo, "de la maljuna Lotrando el Brendy, ĉu? Ĝi estas malnova, renoma rabista firmo. Tre solida entrepreno, sinjoro Lotrando. Mi gratulas vin. Sed sciu, mi estis ega bona amiko kun via mortinta patro. Antaŭ nelonge ni renkontiĝis kaj li diris: 'Sciu Sanga Klingo, ni estas najbaroj kaj kolegoj, ni dividis tion bonintence; la ŝoseo de Kostelec ĝis Trutnov estos via kaj sur ĝi rabos nur vi.' Tiel li tion diris, kaj je tio ni mandonis, jes."

"Aĥ, milfoje mi petas pardonon," ekskuis sin ĝentile la juna Lotrando. "Vere mi ne sciis, ke ĉi tie estas via ĉasdistrikto. Eksterordinare mi bedaŭras, ke mi metis ĉi tien la piedon."

"Nu, ĉi-foje ne gravas," diris la ruza Klingo. "Sed via patro ankaŭ diris: 'Kaj sciu, Sanga Klingo, se ĉi tien mi aŭ iu el miaj homoj enpaŝos, vi povas preni de li pistolon kaj ĉapon kaj jakon, por ke li memoru, ke tio estas

via ŝoseo.' Tion diris tiu via maljuna komplico kaj je tio ni manpremis."

"Se tiel estas," respondis la juna Lotrando, "mi devas vin plej respekte peti, ke vi akceptu ĉi tiun inkrustitan pistolon, mian bereton kun aŭtentika strutplumo kaj ĉi tiun jakon el la angla veluro memore kaj pruve de mia plej profunda respekto kaj bedaŭro, ke mi kaŭzis al vi tian malagrablajon."

"Nu, bone," diris Klingo post tio. "Donu ĝin ĉi tien, kaj mi pardonos al vi. Sed neniam plu, sinjoreto, mi vidu vin ĉi tie. Do hot, ĉevaletoj. Adiaŭ, sinjoro Lotrando."

"Dio vin akompanu, nobla kaj patreca sinjoro," vokis post lin la juna Lotrando, kaj revenis al Brendy ne nur sen predo, sed ankaŭ sen la propra jako. La bubego Vincento aĉe insultis lin kaj instrukciis lin, ke venontan tagon li pikmortigu kaj prirabu la unuan, kiun li renkontos.

La sekvintan tagon do la juna Lotrando embuskis kun sia mallarĝa spado sur la ŝoseo apud Zbečník. Kaj post nelonge traveturas tie veturigisto kun ega varstoko.

La juna Lotrando elpaŝis kaj ekkriis: "Mi bedaŭras, sinjoro, sed mi devas vin pikmortigi. Mi petas, ke vi rapide prepariĝu kaj preĝu."

La veturigisto ekgenuis kaj preĝis kaj meditis, kiel saviĝi el la mizero. Li preĝis la unuan, la duan Patronian,

kaj dume neniu saĝa ideo venis al li. Li preĝis jam la dekan kaj la dudekan Patronian, kaj tamen nenio.

”Nu, sinjoro,” ekvokis la juna Lotrando, ŝajnigante severecon, ”ĉu jam vi estas preparita morti?”

”Tute ne,” diris la veturigisto, dentklakante. ”Mi estas ja ege granda pekulo, tridek jarojn mi ne estis en preĝejo, mi sakris kiel pagano kaj blasfemis kaj hazardludis kaj pekis ĉe ĉiu paŝo. Sed se mi povus konfesi en Police, eble la disinjoro absolvus miajn pekojn kaj ne damnus mian animon al infero. Por ke vi sciu, rapide mi veturos al Police, kaj kiam mi konfesos la pekojn, mi revenos ĉi tien kaj vi pikmortigos min.”

”Bone,” konsentis Lotrando, ”dume mi atendos ĉe via veturilo,”

”Jes,” diris la veturigisto, ”kaj vi, mi petas vin, pruntedonu al mi vian ĉevalon, por ke mi pli frue revenu.”

Ankaŭ kun tio konsentis la ĝentila Lotrando, kaj tiel la veturigisto eksidis sur lia ĉevalo kaj rajdis al Police, dum la juna Lotrando maljungis la ĉevalojn de la veturigisto kaj lasis ilin paŝtiĝi sur la herbejo.

Sed tiu veturigisto estis fripono kaj ne rajdis al Police por konfesi, sed nur ĝis la plej proksima gastejo, kaj tie li diris, ke sur la ŝoseo atendas lin rabisto; kaj ankoraŭ en la gastejo li trinkis por kuraĝiĝi kaj kun tri stalservistoj pelis sin kontraŭ Lotrandon. Kaj la kvar uloj kru-ele bategis la povrulon Lotrando kaj pelis lin ĝis la mon-

taro, kaj tiel la ĝentila rabisto revenis en la groton ne nur sen predo, sed ankaŭ sen la propra ĉevaletto.

La trian fojon veturis Lotrando sur ŝoseo al Náchod kaj atendis, kian predon alportos la hazardo al li. Jen veturas, vetuas veturiletto korita per baŝo, kaj en ĝi bazarulo veturigas al la vendoplaco en Náchod nurajn marcipanajn korojn. Kaj denove la juna Lotrando baras la vojon kaj krias: "Homo, kapitulacu, mi estas rabisto." Nome, tion instruis al li la hirta Vincento.

La bazarulo haltis, gratis sin sub la ĉapo kaj poste levitis la baŝon de la veturilo kaj diris internen: "Edzino, estas ĉi tie iu sinjoro rabisto."

Tiam disfaldiĝis la baŝo kaj el la veturiletto elrampis maljuna dira sinjorinetto, apogis la manojn je la koksoj kaj ekspulis je la juna Lotrando: "Ci antikristo, ci arkilatrono, ci Babinsky, ci bandito, ci Barabaso, ci baŝibozuko, ci besto, ci brokantulo, ci cigano, ci diablofloro, ci diablulo, ci diboĉulo, ci durkorulo, ci ekscesulo, ci fantomo, ci feroculo, ci fihomo, ci fikaraktero, ci fiulo, kion ci aŭdacas, tiel ataki honestajn kaj bonkonukatajn homojn?"

"Pardonu, damo," flustris Lotrando konsternite, "mi ne supozis, ke en la veturilo estas damo."

"Memkomprene, estas," daŭrigis la bazarulino, "kaj kia damo, ci fripono, ci Goljato, ci gorgotranculo, ci He-

roldo, ci homtrompulo, ci huligano, ci incediisto, ci indiano, ci insidulo, ci iu, ci Judaso, ci Kaino, ci kanajlo!”

”Mi petas milfoje pardonon, ke tiel mi timigis vin, sinjorino,” ekskuzis sin Lotrando en la plej teruraj embarasoj. ”Treŝarme, madame, silvuple, mi certigas vin pri mia plej humila bedaŭro, ke — ke — ”

”Paku cin for, ci kanibalo,” kriis la respektinda damo, ”alie mi diros al ci, ke ci estas kriminalulo, krimulo, kruelulo, latrono kaj lucifero, mahometano, malbelulo, malbonulo, malhumanulo, malornamo, malsakrulo, kaj mavulo, monstro, mortiganto kaj murdulo, pirato, plagulo kaj profotripono, protokanajlo, rabisto, rabiulo kaj ribelulo kaj Rinaldo Rinaldini — ”

La juna Lotrando ne plu aŭdis, ĉar li fuĝis kaj haltis nur en Brendy; kaj ankoraŭ ŝajnis al li, ke la vento portas post lin ion kiel: ”— sangavidulo, satano, sendiulo kaj senkorulo, sentaŭgulo kaj ŝtelemulo, tataro, tigro, trompulo, turko kaj vampiro kaj vulgarulo —”

Kaj tiel senĉese ĝi kontinuus. Apud Ratibořice la juna rabisto atakis oran kaleŝon, sed en ĝi sidis principino el Ratibořice kaj estis tiel bela, ke Lotrando enamiĝis al ŝi kaj prenis de ŝi nur — kaj ankoraŭ mildmaniere — parfumitan tuketon. Kaj memkomprene, la bonodoro ne satigis lian bandon en Brendy. Kaj alifoje apud Suchovrřice li atakis viandiston kondukanta bovinon al Úpice en

buĉejon, kaj volis lin mortigi; sed la viandisto petis, ke li komuniku al liaj dekdu orfoj tion kaj alion, kun nun li dirigis al ili tiel emociajn, ege noblajn kaj kortuŝajn aferojn, ke Lotrando ekploris kaj la viandiston liberlasis ne nur kun la bovino, sed altrudis al li ankoraŭ dek du dukatojn, por ke li donu al ĉiu sia infano po ormonero memore al la terura Lotrando; sed dume la viandisto, fripono, estis maljuna fraŭlo kaj eĉ ne katon li havis, des malpli dek du infanojn. Nu, koncize, ĉiam, kiam Lotrando volis iun mordi aŭ prirabi, io enmiksiĝis, kio instigis lian ĝentilecon kaj delikatsentemon, ke nenion de iu li prenis kaj krome disonis ĉion sian.

Sed tiel lia metio ne prosperis; liaj bubegoj ankaŭ kun la hirta Vincento diskuris kaj prefere iris honeste labori inter homojn; Vincento mem iĝis muelhelpanto en muelejo apud Hronov, staranta ankoraŭ ĝis nun sub preĝejo. La juna Lotrando restis sola en la rabista kaverna en Brendy, kaj malsatis kaj estis senkonsila. Tiam li rememoris la sinjoron prioron ĉe la benediktanoj en Broumov, kiu lin treege ŝatis, kaj ekiris al li, por demandi lin pri konsilo, kion fari.

Veninte al li, li ekgenuis kaj ploris kaj rakontis, ke al sia patro li devoligis sen esti rabisto, sed estante edukita en ĝentileco kaj afableco, li ne povas kaj ne povas iun mortigi aŭ prirabi kontraŭlia volo. Kaj kion do li faru.

La sinjoro prioro post tio dekdufoje snufis tabakon kaj dekdufoje enpenŝiĝis kaj poste diris: "Kara filo, tion mi laŭdas, ke vi estas ĝentila kaj afabla al la homoj; sed rabisto vi ne povas resti, unuflanke tial, ĉar ĝi estas mortpeko, aliflanke, ĉar tion vi ne scias. Sed por ke vi plenumu la ĵuron, kiun vi donis al via patro, plu vi atakos la homojn, sed plenhoneste. Vi luprenos akcizejon, embuskon ĉe ŝoseo, kaj kiam tie iu preterveturos, vi ekpaŝos kontraŭ lin kaj postulos de li du krejcerojn akcize. Nu, kaj prete. Ĉe ĉi tiu metio vi povas esti ĝentila, kiel nur vi scias kaj deziras."

Poste la sinjoro prioro skribis leteron al la sinjoro distrikta prefekto en Turnov, kie li propetis por la juna Lotrando, ke la sinjoro prefekto bonvolu konfidi al li akcizejon. Kaj kun la letero Lotrando ekiris al la prefektejo en Trutnov, kaj vere ricevis la akcizejon sur la ŝoseo en Zálesí. Tiel la ĝentila rabisto igis akcizisto sur ŝoseo kaj atakis veturilojn kaj keleŝojn, por plenhoneste enkasigadi dukrejcaran akcizon.

Multajn jarojn poste la sinjoro prioro veturis el Broumov per kabrioleteto al Úpice vizite al sinjoro paroĥestro. Jam anticipe li ĝojis, ke ĉe la akcizejo en Zálesí li vidos la ĝentilan Lotrandon kaj demandas lin, kiel li fartas. Kaj vere ĉe la akcizejo alpaŝis al la kabrioleteto barbulo — li

estis Lotrando mem — kaj ion murmurante aletendis la manon.

La sinjoro prioro enpoŝigis la manon, sed ĉar li estis iom dika, li devis per unu mano leveti la ventron, por per la dua mano atingi la pantalonon; kaj tial momenton daŭris, ol li elpoŝigis monon.

Kaj tiam Lotrando ekparolis krudvoĉe: "Nu, kiam estos? Kiom longe mi atendu por ricevi la du krejcerojn?"

La sinjoro prioro serĉis en la burseto kaj diris: "Sed mi ne havas krejcerojn; mi petas vin, hometo, ŝanĝu al mi dekkrejceron."

"Tondro al vi," ekkriis Lotrando, "se vi ne havas krejcerojn kial diabloj portas vin ĉi tien? Aŭ vi donos ĉi tien du krejcerojn, aŭ forplandu reen."

"Lotrando, Lotrando," diris la sinjoro prioro bedaŭre, "ĉu vi ne ekkonas min? Kie vi lasis vian ĝentilecon?"

Lotrando embarasiĝis, ĉar nun li ekkonis la sinjoron prioron. Kaj li murmuris ion ege malbelan, sed ekreginte sin diris:

"Via pastra moŝto, ne miru, ke ne plu mi estas ĝentila. Ĉu iu iam vidis ĝentilan kaciziston, pontakciziston, enkasigiston aŭ ekzekviston, kiu ne estus iom murmullo?"

"Vi pravas," diris la sinjoro prioro. "Tion ankoraŭ neniam iu vidis."

”Do, vidu,” ekmurmuris Lotrando. ”Kaj nun veturu jam al ĉiuj diabloj.”

Jen la fino de la fabelo pri la ĝentila rabisto; eble li jam mortis, sed liajn idojn vi renkontos en multaj kaj multaj lokoj kaj vi ekkonos ilin laŭ tio, ke plej kompleze ili insultas vin, eĉ senkaŭze. Kaj tio ne bezonus esti.

Vagabonda fabelo

Estis foje malriĉa sinjoro aŭ homo, fakte li nomiĝis Francisko Grafo, sed tiel oni nomis lin nur tiam, kiam lin arestis policisto kaj kondukis al komisarejo pro vagado, kie oni enskribis lin en dikan libron kaj igis pasigi nokton sur kuŝbreto kaj matene oni forsendis lin denove pluen; ĉe la policejo oni nomis lin Francisko Grafo, sed la ceteraj homoj nomis lin ĉiel alie: tiu vagulo, tiu ĉifvestito, tiu vagabondo, tiu senhejmulo, tiu nenifaranto, tiu tedulo, tiu ĉifonulo, tiu ĉifulo, tiu stratvagulo, tiu pigrulo, tiu mizerulo, tiu misindividuo, tiu homo, tiu kiu-scias-kiu, tiu vagtrotulo, tiu ŝosetrotanto, tiu proskribito, tiu trotulo, tiu deliktulo, tiu sentaŭgulo, tiu avidulo, tiu ulaĉo, tiu kanajlo kaj ankoraŭ aliajn nomojn oni donadis al li; se ĉiu kromnomo validus almenaŭ unu kronon, li povus aĉeti por ili flavajn ŝuojn kaj eble ankaŭ ĉapelon, sed tiel li aĉetis por tio nenion kaj havis nur tion, kion la homoj donis al li.

Kiel do videblas, la nomita Francisko Grafo ne ĝuis la plej bonan reputacion kaj fakte li estis nenio alia ol vagabondo ŝtelanta de disinjoro tempon (sed disinjoro en la eterno havas tiom da tempo, ke tiel eĉ ne minimumo

perdiĝis) kaj sciis nenion alian ol fajfi tranĉilon. Ĉu vi scias, kio estas fajfi tranĉilon? Tion oni faras jene, ke matene la buŝo fastas, tagmeze ĝi havas nenion por mordi kaj vespere anstataŭ manĝo oni foŝetas inter dentoj; kiam poste la stomako murmuris pro malsato, oni diris pri tio fajfi tranĉilon. Francisko Grafo sciis fajfi tranĉilon tiel, ke li povus aranĝi koncertojn, alie li estis bonulo ĝis medolo — kie sur li, povrulo, troviĝus karno! Kiam li ricevis pecon da pano, li formanĝis ĝin, kaj kiam oni donis al li malbonan vorton, ankaŭ li englutis ĝin; tiom li malsatis. Kaj kiam li ricevis nenion, li ekkuŝis ie post barilo, kovris sin per mallumo kaj petis la steletojn, ke ili atentu, por ke neniu ŝtelu lian ĉapon.

Tia migranta homo scias diversion pri la mondo; li scias, kie li ricevos manĝon, scias, kie oni insultos lin aŭ kie estas malbonaj hundoj, kiu ĵetiĝas kontraŭ vagabondojn pli ol ĝendarmoj. Sed mi diras al vi, ke foje estis hundo, kiel nur ĝi nomiĝis, aha, Foksl, ankaŭ ĝi, povrulo, jam forpasis. Tiu Foksl do servis en la kastelo Chý e kaj havis ian strangan karakteron, nome kiam ĝi ekvidis vagabondon, ĝi kvivitis pro ĝojo, dancis ĉirkaŭ li kaj kondukis lin rekte en la kastelan kuirejon; sed kiam venis en la kastelon iu grandsinjoro, ni diru barono, grafo, princo aŭ eble eĉ la praga ĉefepiskopo, Foksl bojaĉis je li kiel rabia kaj eble diskarnus lin, se koĉero ne fermus ĝin ra-

pide en ĉevalejon. Kiel vi vidas, ankaŭ inter la hundoj estas ĉiaj diferencoj; des pli inter la homoj.

Sed kiam ni parolas jam pri hundoj, ĉu vi scias, infanoj, kial hundo vostumas? Estas jene. Kiam la disinjoro kreis la mondon kun ĉio kune, li iris de unu dia kreitaĵo al alia kaj bele afable ĝin demandis, ĉu ĝi estas kontenta en la mondo kaj ĉu io mankas al ĝi kaj simile. Tiel li venis ankaŭ al la unua hundo en la mondo kaj demandis ĝin, ĉu eble io mankas al ĝi. La hundo volis rapide kapnei, ke danke dion ne, sed ĉar ĝuste ĝi estis flaranta al io ege interesa (mi opinias, ke estis la unua osto aŭ la unua ŝeleteo el kolbaseto, ankoraŭ varma, eliranta ĝuste el la mano de la Kreinto), la hundo eraris kaj fervore ekvostumis. Ekde tiu tempo la hundo vostumas, dum la aliaj bestoj, kiel ĉevalo kaj bovino, scias kapjesi kiel homo. Nur la porko scias nek kapjesi nek kapnei, nome tial, ĉar kiam Eternulo demandis, kiel ĝi estas kontenta en la dia mondo, ĝi plu fosis per muzelo inter la glanoj kaj nur iomete malpacience svingetis la vosteton, kvazaŭ ĝi volus diri: Pardonu, momenton, ĝuste nun mi ne havas tempon. Ekde tiu tempo la porko senĉese svingetas kaj skuetas la vosteton, dum ĝi vivas, kaj ĝia vosteto pune ĝis nun estas konsumata kun kreno aŭ mustardo, por ke tio ĝin piku post la morto. Tiel estas ekde la kreo de la mondo.

Sed ne pri tio mi volis hodiaŭ rakonti, sed pri la vaga-

bondo, kiu nomiĝis Francisko Grafo. Tiu vagabondo vagis tra la tuta mondo; li estis eĉ en Trutnov, kie estas jam germanoj, kaj en Hradec, kaj en Skalice, eĉ en Vodolov kaj Maršov kaj aliaj foraj urboj de la tuta mondo. Dum iom da tempo li servis ankaŭ ĉe mia avo en Černov, sed sciu, vagabondo estas vagabondo; li prenis siajn kvin aĵojn kaj pluiris, al Starkoč aŭ iu alia fino de la mondo, kaj denove nek spuro nek aŭdo estis pri li; tia nomada karaktero li estis.

Jam mi diris al vi, ke oni nomis lin vagabondo, ĉifonulo, senhejmulo kaj ankoraŭ diversmaniere; foje ankaŭ oni diris al li, ke li estas ĉioprenanto, ŝtelisto, fripono aŭ rabulo, sed en tio oni ege maljustumis lin. Francisko Grafo neniam ion de iu prenis, ŝtelis, nek pinĉprenis. KREDU MIN, eĉ ne tiom, kiom sub ungo kaŝiĝus. Ĝuste tial, ĉar li estis tiel honesta, fine li ĝisvivis grandan gloron; sed ĝuste pri tio mi volas rakonti al vi.

Foje do tiu vagabondo Francisko staris en Podmýstečko kaj meditis, ĉu iri por bulko al la bakisto Viček aŭ al la maljuna sinjoro Prouza por kornbulko. Kaj jen preter li iras nobla sinjoro, eble li estis fremda fabrikanto aŭ agento, kaj portas en la mano ledan kofreton. Subite ekblovis vento, deĵetis la ĉapelon de tiu sinjoro kaj jam ruligis ĝin tra la ŝoseo. "Homo, tenu ĝin por momento," ekkriis rapide tiu sinjoro kaj ĵetis al Francisko la ledan

kofreton; kaj antaŭ ol vi dirus klak, jam polviĝis post li ĝis ie apud Sychrov, por kapti la ĉapelon.

Staras do Francisko Grafo kun la kofreto en la mano kaj atendas, ĝis revenos tiu sinjoro. Li atendas duonhoron, atendas unu horon, sed la sinjoro nenie. Francisko eĉ ne kuraĝas rapidkuri por la bulko, por ke eble la sinjoro ne preterpasu lin, kiam li revenos por la kofreto. Li atendas du horojn, tri horojn kaj por ne enui, li fajfas dume tranĉilon. La sinjoro ne revenas, kaj jam noktiĝas. Sur la ĉielo briletas la steletoj, la tuta urbeto dormas kaŭrante kiel kato post forno, mire ke ĝi ne ronronas, kiel bone estas al ĝi en la kusenoj. Sed la vagabondo Francisko ankoraŭ senĉese staras, timtremas, rigardas al la steletojn kaj atendas, ĝis la sinjoro revenos. Batis ĝuste la noktomezo, kiam aŭdiĝis post li terura voĉo: "Kion vi faras ĉi tie?"

"Mi atendas ĉi tie iun fremdan sinjoron," diris Francisko. "Kaj kion vi havas en la mano?" demandis la terura voĉo.

"Kofreton de tiu sinjoro," rakontis la vagabondo. "Mi devas ĝin teni por li ĝis lia reveno."

"Kaj kie estas tiu sinjoro?" demandis la terura voĉo la trian fojon.

"Li nur forkuris, por kapti sian ĉapelon," diris Francisko.

”Haha,” diris la terura voĉo. ”Tre suspektinde. Iru kun mi.”

”Ne eblas,” defendis sin la vagabondo, ”Mi devas atendi ĉi tie.”

”En nomo de la leĝo mi arestas vin,” ektondris la granda voĉo, kaj tiam Francisko Grafo komprenis, ke tiu estas sinjoro Boura, policisto, ke li devas obei. Li gratfrotis sin, ekĝemis kaj iris kun sinjoro Boura al la komisarejo. Tie oni enskribis lin en la dikan libron kaj fermis lin en karceron; sed tiun kofreton dume oni ŝlosis, ĝis venos matene sinjoro juĝisto.

Matene oni venigis la vagabondon antaŭ sinjoron juĝiston; kaj tiu ja estis, ververe, sinjoro konsilisto Ŝulc, — ankaŭ tiun la kapo ne plu doloras.

”Ci sentaŭgulo, ci stratvagulo, ci nenifarulo,” diris la sinjoro juĝisto, ”jam denove ĉi tie? Pasis apenaŭ monato, kiam ni fermis cin pro la vagado. Jesuo, hometo, kun ci ni havas ĝenaĵojn! Nu, kie oni cin prenis, ĉu denove ci vagis?”

”Tute ne, moŝta sinjoro,” diris vagabondo Francisko, ”jen sinjoro Boura min arestis, ĉar mi staris.”

”Nu, vidu, ci mavulo,” diris la sinjoro juĝisto, ”kial ci staris? Se ci ne estus starinta, oni ne estus arestinta cin. Sed mi aŭdas, ke oni trovis ĉe ci ian kofreton. Ĉu vere?”

”Mi petas, moŝta sinjoro,” diris la vagabondo, ”tiun kofreton donis al mi iu fremda sinjoro.”

”Homo,” ekkriis la sinjoro juĝisto. ”Tiun fremdan sinjoron, tion jam ni scias. Kiam iu ion ŝtelas, li diras do, ke tion li ricevis de iu fremda sinjoro. Hometo, per tio vi ne trompos nin. Kaj kio enestas en la kofreto?”

”Tion mi ne scias, per mia animo,” diris vagabondo Francisko.

”Ci fripono,” diris la sinjoro juĝisto, ”ni mem rigardos tion.”

Kaj la sinjoro konsilisto malfermis la kofreton kaj eksaltis pro surprizo. Tie estis nura mono, kaj kiam li ĝin kalkulis, ĝi faris unu milionon tricent sesdek sep mil okcent dek kvin kronojn naŭdek du helerojn kaj krome unu dentobroso.

”Tondro al tio,” ekkriis la sinjoro juĝisto, ”homo, kie ci ŝtelis ĝin?”

”Mi petas, sinjora moŝto,” demandis sin Francisko Grafo, ”tion igis min teni tiu fremda sinjoro, kiu estis kaptanta la ĉapelon, kiun vento prenis de li.”

”Ci ŝtelisto ŝtelista,” vokis la sinjoro juĝisto, ”ĉu ci opinias, ke mi kredas tion al ci? Mi ŝatus vidi iun, kiu konfidus al tia ĉifonvestito, kia ci estas, unu milionon tricent sesdek sep mil okcent dek kvin kronojn naŭdek du helerojn kaj krome dentobrosan! Marŝ’ karceren! Mi esploros jam, de kiu ci ŝtelis la kofreton!”

Kaj tiel okazis, ke la povrulon Franciskon oni fermis en arestejo por ege longa tempo. Pasis vintro kaj pasis

printempo, kaj ankoraŭ oni trovis neniun, kiu postulus la monon; kaj tial sinjoro konsilisto Ŝulc, sinjoro policisto Boura kaj la ceteraj sinjoroj de la tribunalo kaj polico opiniis, ke Francisko Grafo, senhejma vagabondo kaj sen daŭra okupo, plurfoje punita kaj entute malornamo fripona, ie mortigis kaj enterigis nekonatan sinjoron kaj prenis de li la kofreton kun mono. Kiam pasis jaro kaj tago, Francisko Grafo staris antaŭ tribunalo pro murdo de nekonata sinjoro kaj pro rabo de unu miliono tricent sesdek sep mil okcent dek kvin kronoj du heleroj kaj dentobroso. Uf, uf, infanoj, por tia afero estas ŝnuro.

”Ci ruzulo, ci rabisto, ci premulo,” diris la sinjoro juĝisto al la akuzito, ”konfesu do fine, kie ci mortigis kaj enterigis tiun sinjoron; ci pendos pli bone, se ci konfesos.”

”Ja mi ne mortigis lin, moŝta sinjoro,” defendis sin la povrulo Francisko; ”li ĉasis nur la ĉapelon, kaj hop, kaj jam polvis post li; li kuregis kiel ŝuisto al foirejo kaj la kofreton li lasis tial en miaj manoj.”

”Nu,” ekĝemis la sinjoro juĝisto, ”sed se neprege ci volas, ni pendumos cin ankaŭ sen konfeso. Sinjoro Boura, tiun obstinegan krimulon helpe de dio pendumu.”

Apenaŭ li findiris tion, kiam disordiĝis kaj tie staris iu fremda sinjoro, plenpolvita kaj spireganta. ”Jam trovite,” li elvortis.

”Kiu estas trovita?” demandis la sinjoro juĝisto severvoĉe.

”Tiu ĉapelo,” diris la fremdulo, ”homoj, kia ĥaoso ĝi estis! Mi iras do, jam unu jaro pasis, tra Podměstečko, kaj subita vento forportas mian ĉapelon. Mi ĵetas mian kofreton, ne sciante al kiu, kaj hop post la ĉapelon. Sed la ĉapelo, fiulo mismora, ruliĝas trans ponton al Sychrov kaj post Sychrov al Zálesí kaj al Rtyně kaj trans Kostelec-on al Zbečnĭk kaj trans la tutan Hronov al Náchod kaj tra tie al la prusa limo. Mi konstante post ĝin; preskaŭ jam mi tenas ĝin, sed sur la limo kaptas min akcizisto, kaj kial vi tiel kuras. Mi diras, post mian ĉapelon. Antaŭ ol mi klarigis tion al li, la ĉapelo estis denove trans la horizonto. Mi satdormis kaj matene ekiris post ĉapelon en Prusion, al Levín kaj Chudoba, kie estas tiu fetora akvo — ”

”Atendu,” diris la sinjoro juĝisto. ”Ĉi tie estas juĝejo kaj ne ia geografia parolado.”

”Mi diros tion do tute koncize,” diris la fremdulo. ”En Chudoba mi sciiĝas, ke mia ĉapelo eltrinkis tie glason da akvo, aĉetis bastonon kaj poste trajne veturis al Svidnice. Memkomprene, mi veturas post ĝin. En Svidnice, la ĉapelo, petolulo, tranoktis en hotelo, ne pagis la fakturon, kaj poste forveturis, oni ne scias kien. Post pli longa esplorado mi sciiĝis, ke ĝi promenas tra Krakovo, kaj eĉ

ĝi volas edziĝi tie al iu vidvino. Mi veturas do al Krakovo post ĝin.”

”Kaj kial vi ĝin tiel ĉasis?” demandis la sinjoro juĝisto.

”Nu,” diris la fremdulo, ”ĝi estis ankoraŭ duonnova ĉapelo, kaj krome, mi enŝovis sub ĝian rubandon mian revenbileton de Svatožovice al Starkoč. Pri tiu revenbileto mi havis intereson, sinjoro konsilisto.”

”Aha,” diris la sinjoro juĝisto, ”tute ĝuste.”

”Mi samopinias,” diris la fremdulo. ”Mi ne aĉetos ja dufoje bileton. Kie mi ĉesis? Ha, ke mi veturas al Krakovo. Bone mi alveturas tien, kaj dume la ĉapelo, kanajlo, forveturis en la unua klaso en Varsovion, ŝajnigante sin diplomato.”

”Sed tio ja estas trompo.” vokis la sinjoro juĝisto.

”Ja mi akuzis ĝin,” diris la fremdulo, ”kaj la polico telegrafis el Krakovo al Varsovio, ke ĝi estu arestita. Sed dume mia ĉapelo havigis al si peltmantelon, ĉar komenĉiĝis jam vintro, kreskigis al si barbon kaj veturis al Moskvo.”

”Kaj kion ĝi faris en Moskvo?” demandis la sinjoro juĝisto.

”Nu, kion ĝi farus tie,” diris la fremdulo. ”Ĝi politikumis, aĉulo. Ĝi iĝis ĵurnalisto. Poste ĝi ekobstinis, ke ĝi uzurpos la regadon, sed tiam la rusoj jam arestis ĝin kaj kondamnis al mortopuno; sed kiam oni gvidis ĝin al la ekzekutejo, ekblovis vento, kaj ĝi, bubaĉo, komencis

ruliĝi surstrate kaj traglitis inter la kruroj de soldatoj kaj ruliĝis tra panjo Rusio ĝis Novoĉerkasko. Tie ĝi surkapiĝis peltĉapon kaj iĝis hetmano de la Donaj kozakoj. Mi persekutas ĝin kaj fine ĝin kaptis; kaj tiam, ĝi, fiulo, alfajfas siajn kozakojn kaj ordonas al ili, ke ili pafmortigu min.”

”Kaj kio plue?” demandis la sinjoro juĝisto avide.

”Nu, kio plu estus,” diris la fremdulo. ”Mi diras al ili, ke kozakojn mi ne timas, ke ni tranĉas ilin por supo*. Mi ne scias, sinjoro konsilisto, ĉu ĉi tie ĉe vi kreskas kozakoj — ”

”Ili kreskas kaj abundde,” diris la sinjoro konsilisto. ”Plej multe apud Libatov, kaj entute tie, kie kreskas betuloj kaj temuloj.”

”Kozako estas tute bongusta fungo,” diris la fremdulo, ”nur ĝi havas iom lignecan piedeton. Mi diras do, kozakojn ni kuiras en supo aŭ distranĉas je pecetoj kaj sekigas; tion la kozakoj tiel ektimis, ke ili liberlasis min. Sed dume mia ĉapelo, fripono, surĉevaliĝis kaj galopis orienten. Memkomprene, mi post ĝin. Kaj en Orenburg ĝi entrajniĝis kaj veturis al Omsk kaj trans la tutan Sibirion, sed en Irkutsk ĝi perdiĝis al mi; onidire tie ĝi havigis al si monon, sed poste ĝin kaptis rabistaj ĥunĥuzoj kaj prirabis pri ĉio, ĝi savis nur sian puran vivon. Poste mi renkontis ĝin sustrate en Blagoveŝĉensko, sed ĝi, ruzulo, eskapis kaj ruliĝis tra la tuta Manĉurio al la Ĉina

Maro. Sur la marbordo mi atingis ĝin, ĉar ĝi timis la akvon.”

”Tie do vi kaptis ĝin?” demandis la sinjoro juĝisto.

”Tute ne,” diris la fremdulo. ”Mi kuras al ĝi sur la bordo de la maro, sed tiumomente la vento turniĝis kaj la ĉapelo ruliĝis okcidenten. Mi post ĝin, kaj tiel mi estis kaptanta ĝin trans Ĉinion kaj Turkestanon, parte piede, parte en portiloj, sur ĉevaloj aŭ kameloj, ĝis denove en Taŝkento ĝi enrajniĝis kaj veturis reen al Orenburg. De tie ĝi veturis al Ĥarkovo kaj Odeso, kaj de tie en Hungarion, poste ĝi turniĝis al Olomouc kaj Česká Třebová kaj al Týniště kaj fine denove ĉi tien. Kaj ĉi tie antaŭ kvin minutoj mi kaptis ĝin sur la placo, ĝuste kiam ĝi volis iri en gastejon por gulaŝo. Do, jen ĝi estas.”

Ĉe tio li montris la ĉapelon; ĝi estis tute kaputa, sed alie neniu estus dirinta, ke ĝi estas tia ruzega fripono.

”Kaj nun ni rigardos,” ekkriis la fremdulo, ”ĉu ĝi havas sub la rubando la revenbileton el Svatožovice al Starkoč.” Li palpis sub la rubandon kaj eligis la bileton. ”Jen ĝi,” li ekkriis triumfe. ”Almenaŭ nun, mi veturos senpage al Starkoč.”

”Hometo,” diris la sinjoro konsilisto, ”tiu via bileto ne plu validas!”

”Kial?” miris la fremdulo.

”Nu, la revenbileto validas nur tri tagojn; kaj ĉi tiu,

kiel mi vidas, aĝas jam unu jaron kaj unu tagon. Mia kara, tiu ne plu validas.”

”Tondre al tio,” diris la fremdulo, ”tion mi ne pensis. Nun mi devos aĉeti novan bileton, kaj mi havas eĉ ne etmoneron.” La fremdulo ekgratis sian kapon. ”Sed atendu, mi igis teni mian kofreton al iu viro, kiam mi ekĉasis la ĉapelon.”

”Kiom da mono estis en ĝi?” rapidis demandi la sinjoro juĝisto.

”Se mi ne eraras,” diris la fremdulo, ”en ĝi estis unu miliono tricent sesdek sep mil okcent dek kvin kronoj naŭdek du heleroj kaj dentobroso.”

”Akurate tiom,” diris la sinjoro juĝisto. ”La kofreton ni havas ĉi tie kun ĉiu mono, ankaŭ kun la dentobroso. Kaj jen staras tiu viro, al kiu vi igis teni vian kofreton. Li nomiĝas Francisko Grafo, kaj ĝuste nun mi kaj tiu sinjoro Boura kondamnis lin al morto, ke li prirabis vin kaj murdis.”

”Ni rigardu,” diris post tio la fremdulo, ”vi arestis do la povrulon? Nu, almenaŭ li ne disipis ĉiun monon, kiu estis en la kofreto.”

Tiam la sinjoro juĝisto ekstaris kaj solene diris: ”Nur nun mi vidas, ke Grafo Francisko ne ŝtelis, ne forprenis, ne alproprigis, ne pinĉprenis, ne kaŝprenis kaj same ne alproprigis al si el la mono ĉe li deponita nek monereton, etmoneron, krejceron aŭ heleron, nikelaĵon, groŝon

nek duongroŝon, kvankam, kiel poste estis konstatite, li mem havis eĉ ne por bankedbulko aŭ por dalamano, kornbulko aŭ alia nutraĵo aŭ frandaĵo, nomata ankaŭ bakaĵo kaj latine cerealia. Per ĉi tio mi deklaras, ke Grafo Francisko ne kulpiĝis pro murdo, vivsenigo, latine homicidio, mortigo, enterigo de mortinto, rabo aŭ perforto, ŝtelo kaj entute pro ŝtelistado; sed male, li atendis tagon kaj nokton surloke, por honeste kaj sen malgrandigo redoni unu milionon tricent sesdek sep mil okcent dek kvin kronojn naŭdek du helerojn kaj la dentobroson. Tial mi deklaras, ke li estas absolvita de la akuzo, amen. Uf, buboj, tiel longan parolon mi faris, ĉu?”

”Nu jes,” diris la fremdulo. ”Vi povus jam doni parolon al ĉi tiu honesta vagabondo.”

”Kion mi diru,” diris Francisko Grafo modeste. ”Dum mia vivo mi prenis de neniu eĉ ne falfrukton. Tia jam estas mia naturo.”

”Homo,” deklaris la fremdulo, ”inter vagabondoj kaj aliaj homoj vi estas blanka korniko.”

”Ankaŭ mi diras tion,” aldiris sinjoro policisto Boura, kiu, kiel jam vi rimarkis, ĝis tiu momento ankoraŭ ne movis la buŝon.

Tiel do Francisko Grafo denove estis libera; sed rekompence por lia honesteco la fremdulo donis al li tiom da mono, ke Francisko povus por ĝi aĉeti al si unu domon, kaj en tiun domon unu tablon, sur tiun tablon unu

teleron kaj sur tiun teleron unu varman andujon. Sed ĉar Francisko Grafo havis truan poŝon, li perdis la monon kaj havis denove nenion. Li iris do, kien la piedoj lin kondukis, kaj dumvoje fajfis tranĉilon. Sed tiu blanka korniko ne lasis lin trankvila.

Por tranokto li enrampis en gardistan budon kaj dormis kiel ŝtupo; kiam matene li eligis la kapon, la suno brilis, la tuta mondo briletis pro freŝa roso kaj sur bariolo antaŭ la budo sidis blanka korniko. Francisko, kiu ĝis nun ne vidis blankan kornikon, rigardis ĝin konfuzite, preskaŭ li ne spiris. Ĝi estis blanka kiel falinta neĝo, la okulojn havis ruĝajn kiel rubenon kaj la kruretojn rozajn, kaj per beko kombis siajn flugilojn. Ekvidinte Franciskon, ĝi ekskuis la flugilojn, kvazaŭ ĝi volus forflugi, sed restis sidanta kaj malfide rigardis per unu rubena okulo la hirtan kapon de Francisko.

”Ci,” ĝi aŭdis subite, ”ĉu ci ne ekbatos min per ŝtono?”

”Mi ne ekbatos,” diris Francisko, kaj nur nun li ekmiris, ke la korniko parolas. ”Kiel eblas, ke ci scias paroli?”

”Malgrave,” diris la korniko, ”Ni blankaj kornikoj, ni ĉiuj scias paroli. La nigraj kornikoj nur grakas, sed mi scias diri kion nur ci rememoros.”

”Lasu tion,” miris vagabondo Francisko. ”Diru la vorton krado.”

”Krado,” diris la korniko.

”Diru do krak’,” petis Francisko.

”Kraĉ’,”ripetis la korniko. ”Ci vidas do, ke mi scias paroli. Ni blankaj kornikoj ne estas ja iu ajn. Ordinara korniko scias kalkuli nur ĝis kvin, sed blanka korniko scias kalkuli ĝis sep. Atentu: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep. Kaj ĝis kiom ci scias kalkuli?”

”Nu, almenaŭ ĝis dek,” diris Francisko.

”Ne troigu! Montru!”

”Eventuale do: naŭ metioj, mizero la deka.”

”Ni vidu,” vokis la nigra korniko, ”ci estas ege sagaca birdo. Ni blankaj kornikoj estas nome la plej bonaj birdoj. Ci vidas, ke en preĝejoj la homoj havas pentritajn grandajn birdojn kun blankaj anserflugiloj kaj homaj bekoj?”

”Aha,” diris Francisko, ”ci opinias anĝelojn.”

”Jes,” diris la korniko. ”Sciu, tio estas fakte blankaj kornikoj; sed nur ne multaj vidis iam blankan kornikon. Ni estas, mia kara ege raraj.”

”Por diri al ci la veron,” diris Francisko, ”onidire ankaŭ mi estas blanka korniko.”

”Nu,” diris la blanka korniko dubeme, ”tro blanka ci ne estas. Kiu diris al ci, ke ci estas blanka korniko?”

”Hieraŭ diris tion al mi sinjoro konsilisto Ŝulc el la tribunalo, kaj iu fremda sinjoro, kaj sinjoro policisto Boura.”

”Ni vidu,” miris la blanka korniko. ”Kio ci fakte estas?”

”Mi estas nur Grafo Francisko,” diris la vagabondo singene.

”Grafo? Ci estas grafo?” ekkriis la korniko. ”Ci mensogas, ĉu? Neniu grafo estas tiel ĉifonvestita.”

”Sciu,” diris la vagabondo, ”mi estas ĝuste ĉifona Grafo.”

”Kaj en kiu lando ci estas grafo?” demandis la korniko.

”Nu, ĉie. Mi estas Grafo ĉi tie, kaj kiam mi estas en Skalice, mi estas ankaŭ Grafo, kaj en Trutnov ankaŭ —

”Kaj en Anglio?”

”En Anglio ankaŭ mi estus Grafo.”

”Sed ne en Francio.”

”Ankaŭ en Francio. Ĉie mi estas Grafo Francisko.”

”Ne eblas,” diris la korniko. ”Diru per mia animo.”

”Per mia animo,” ĵuris Francisko.

”Diru, dio scias,” petis la blanka korniko.

”Dio scias,” diris Francisko. ”Mi trafalu surloke, se tio ne estas vero. Sekiĝu mia lango.”

”Sufiĉas,” interrompis lin la korniko. ”Kaj ĉu inter la blankaj kornikoj ci kuraĝus esti grafo?”

”Ankaŭ inter la blankaj kornikojn,” li diris, ”mi venus nur kiel Grafo Francisko.”

”Atendu do,” diris la korniko, ”tie sur la Grakmonto ni havas parlamenton, kie ni volas elekti grafon por ĉiuj kornikoj. Grafo de ĉiuj kornikoj estas ĉiam nur blanka

korniko. Ĉar ci estas blanka korniko kaj krome vera grafo, eblas, ke ni elektos cin. Sciu, atendu ĉi tie ĝis la tagmezo; kaj tagmeze mi alflugos por diri al ci, kiel finiĝis la elektoj.”

”Mi atendos do,” diris Francisko Grafo; kaj la blanka korniko disetendis la blankajnflugilojn, ke nur ili ekbri-
lis, kaj flugis al la Grakmonto.

Atendis do Francisko Grafo kaj sunĝuis; kiel vi scias, infanoj, ĉiuj elektoj, tio estas ege da parolado, kaj tial la blankaj kornikoj tiel longe disputis kaj kverelis sur la Grakmonto kaj ne povis akordiĝi, ĝis la fabriko en Sychrov signalis tagmezon. Nur tiam la kornikoj komencis la elektadon de grafo de ĉiuj kornikoj.

Sed Francisko Grafo havis da atendado ĝisloke kaj ankoraŭ multe pli da malsato, kaj tial post la tagmezo li ekiris al Hronov al mia avo muelisto pro freŝa bonodora pantranĉaĵo.

Kaj kiam la blanka korniko alflugis por anonci al li, ke li estas elektita grafo, li estis tute for, post montoj kaj valoj.

La kornikoj lamentis, ke perdiĝis ilia grafo; kaj la blankaj kornikoj ordonis al la nigraj, ke ili flugu tra la tuta mondo kaj serĉu lin kaj voku kaj alkonduku al la kornika trono, kiu estas en la arbaro sur la Grakmonto.

Ekde tiu tempo la kornikoj flugas tra la mondo kaj senĉese krias:”Graf! Graf!” Kaj ĉefe en vintro, kiam ili

estas multaj kune, ili ĉiuj rememoras kaj flugas trans kampojn kaj arbarojn kriante: "Graf! Graaf! Graaa! Graaaaaf!"

Granda polica fabelo

Tion eble, infanoj, vi scias, ke en ĉiu policejo aŭ polica stacio viglas kelke da sinjoroj la tutan nokton, se eble io okazus, kiel se eventuale ien entrudiĝus rabistoj aŭ se malbonaj homoj volus iun damaĝi. Tial la sinjoroj policistoj en la policejo maldormas ĝis la mateno, dum la aliaj policistoj, kiujn oni nomas patrolo, iradas tra la stratoj kaj atentis rabistojn, ŝtelistojn, fantomojn kaj iajn aliajn malordojn.

Kaj kiam la patrolon ekdoloras la kruroj, ĝi revenas al la policejo kaj denove alia policisto iras atenti surstrate. Tiel tio daŭras la tutan nokton; kaj por ke la tempo pli bone pasu al ili, la policistoj fumas en la policejo pipojn kaj rakontas al si, kion kie neordinaran ili vidis.

Foje ankaŭ ili tiel fumis kaj babilis, kiam el la patrolado revenis iu policisto, atendu, ja li estis sinjoro Halaburd, kaj diris: "Saluton, junuloj! Mi raportas, ke la kruroj min doloras."

"Sidiĝu do," ordonis al li la plej aĝa sinjoro policisto, "kaj anstataŭ vi iros patroli sinjoro Holas. Kaj nun, sinjoro Halaburd, rakontu al ni, kio nova en via kvartalo kaj en kiuj kazoj vi intervenis en la nomo de la leĝo." "

”Hodiaŭ nokte ne okazis multo,” diris sinjoro Halaburd, ”En strato Štŭpánská batiĝis du katoj; ilin do en la nomo de la leĝo mi dispelis kaj admonis. Poste en Žitná strato elfalis el nesto juna pasero, domicile en numero 23. Mi venigis estingistojn el la Malnova Urbo, ke ili alveturu kun eskalo kaj transportu la koncernan paseron en ĝian neston. Ĝiaj gepatroj estis admonitaj por pli bone atenti. Kaj kiam mi iris tra Ječná strato, io ektiris min je la krurumo. Mi rigardis, jen koboldo. Sciu, tiu barbulo el Karolo placo.”

”Kiu?” demandis la plej aĝa sinjoro policisto. ”Tie loĝas pluraj: Ŝmirbard, Nurbarb nomata Avo, Misbarb, Kalvbarb, Mielpan, Kvakbarb nomata Pipo, Kokidkrur kaj Punket, tiu, kiu transloĝiĝis tien de Apolonario.”

”Tiu, ektirinta mian pantalonon,” diris sinjoro Halaburd, ”estis Kalvbarb, loĝanta en maljuna saliko.”

”Aha,” diris la plej aĝa sinjoro policisto. ”Junuloj, li estas ege brava koboldo, tiu Kalvbarb. Kiam sur Karolo-placo iu ion perdas, ekzemple ringon, pilkon, pilkegon aŭ pilketon, do tiu Kalvbarb ĉiam ĝin alportas al la gardiso kiel honesta trovinto. Do plue.”

”Kaj la koboldo, tiu Kalvbarb,” daŭrigis policisto Halabard, ”diris al mi: ’Sinjoro policisto, mi ne povas hejmen, en mian loĝejon sur la saliko enrampis sciuro kaj ne volas min enlasi.’ Do mi elingigis sabron, iris kun Kalvbarb al lia saliko kaj alvokis en nomo de la leĝo la

sciuron, ke ĝi forlasu la hejmon kaj ne kulpiĝu pri tiaj krimoj, deliktoj kaj misfaroj, kiel estas atenco de posedaĵo, rompado de la publika ordo, perforto kaj ŝtelistado. Post tio la sciuro diris: 'Pa.' Tiam mi demetis la zonan kaj mantelon kaj surgrimpis la salikon. Kiam mi estis ĉe la truo post elfalinta nodo, en kiu sinjoro Kalvbarb havas sian loĝejon, la sciuro komencis plori: 'Sinjoro policisto, mi petas vin, ne arestu min! Mi nur kaŝiĝis ĉi tie ĉe sinjoro Kalvbarb, ĉar pluvis kaj en mian loĝejon venas akvo.' — 'Neniajn parolojn, sinjorineto,' mi diris post tio, 'prenu viajn kvin aĵojn aŭ fagogruktojn kaj paku vin el la privata loĝejo de sinjoro Kalvbarb. Kaj se ankoraŭ foje ripetiĝus, ke vi perforte aŭ inside, sen lia permeso kaj konsento penetrus en lian privatecon, mi venigos do helpotrupojn, ĉirkaŭos vin, arestos vin kaj transportos vin katenita al la polica komisarejo. Do ek!' — Kaj jen ĉio hometoj, kion ĉi-nokte mi vidis."

"Neniam mi vidis iun koboldon," aŭdiĝis policisto Bambas. "Ĝis nun mi havis kvartalon en Dejvice kaj tie en la novaj dometoj tiaj aperaĵoj, estaĵoj aŭ kiel oni tion nomas, supernaturaj fenomenoj ne ekzistas."

"Ĉi tie ili estas multaj," diris la plej aĝa policisto. "Kaj iam, kiom da ili estis! Ekzemple apud la Ŝítkov-baraĵo aperis nikso, jam ekde komenco de la mondo. Neniam la polico havis kun li malfacilaĵojn, tia ordema nikso li estis. Nikso en Libe estas olda fripono, sed tiu el Ŝítkov

estis ege brava ulo. Ja la akvotura ofico en urbo Prago nomumis lin supera urba nikso kaj pagis al li monatan salajron. Tiu nikso el Šítkov gardis Vultavon, por ke ĝi ne sekiĝu; inundojn li ne kaŭzis, tiujn faras provincaj niksoj el Supra Vultavo, ekzemple de Vydra, Krumlov kaj Zvíkov. Sed la nikso el Libe pro envio provokis lin, ke li postulu de urbo Prago por siaj servoj titolon kaj salajron de magistrata konsilisto; kaj kiam en la urbodomo oni diris al li, ke tio ne eblas, ĉar li ne havas la necesan altlernejan klerecon, ofendiĝis tiu nikso el Šítkov kaj elloĝiĝis el Prago. Nun laŭdire li estas ĉe la akvo en Dresdeno. Memkomprene, ĉiuj eblaj niksoj en Germanio ĝis Hamburgo estas ĝisostaj ĉeĥoj. Kaj ekde tiu tempo apud la baraĵo Šítkov estas neniu nikso. Tial en Prago estas malmulte da akvo. Kaj ankaŭ sur la Karol-placo dancis nokte Vaglumo. Sed ĉar ĝi misefikis kaj la homoj ilin timis, la praga komunumo interkonsentis kun ili, ke ili transloĝiĝos al Stromovka kaj tie ili flamigados kaj matene estingados okupito el la gasfabriko. Sed la okupito, kiu ilin flamigadis, dum la milito rekrutiĝis, kaj la Vaglumojn oni forgesis. Kio koncernas Najadon, nur en Stromovka ili estis dek sep; sed tri el ili iris al baletoj, unu iris al filmo kaj unu edziniĝis al iu fervojisto el Střešovice. Tri Najadoj estas en la Kinský-ĝardeno, du aktivas en Gróbovka kaj unu restadas en Jelení příkop (Cervo-fosaĵo). La urba ĝardenisto el Rieger-Parko volis

iun Najadon domiciligi en sia parko, sed ial ŝi ne hejmiĝis tie; mi opinias, ke tie estis por ŝi tro venteme. Police enregistritaj koboldoj, apartenantaj al publikaj konstruaĵoj, parkoj, monaĥejoj kaj bibliotekoj, estas en Prago tricent kvardek sep, ne kalkulante diabletojn en privataj domoj, pri kiuj ni ne havas evidencon. — En Prago estis abundego da fantomoj, sed nun ili estas nuligitaj, ĉar science estis pruvite, ke ekzistas neniu fantomoj. Nur en la Malnova Kvartalo homoj sekrete kaj kontraŭleĝe kaŝas en la subtegmento kelkajn antikvajn fantomojn, kion diris al mi kolego el la malnovkvartala komisarejo. Kaj nun, miasence, ja ĉio.”

”Krom la drako aŭ hidro,” diris policisto Kubát, ”kiun oni mortigis en Žižkov en la Juda Fornaro.”

”Žižkov,” diris la plej aĝa policisto, ”ĝi neniam estis mia distrikto, pri la drako do mi ne scias multon.”

”Mi ĉeestis,” diris policisto Kubát, ”sed la tuta kazo estis pritraktata kaj en sekcio de kolego Vokoun. Ĝi okazis jam antaŭ ege longe, ankoraŭ kiam nia polica prezidanto estis sinjoro Bienert. Foje vespere do diris al tiu Vokoun iu maljuna sinjorino, ŝi estis sinjorino Částková, tabakvendistino, sed fakte ŝi estis ino sorĉista aŭ profetino kaj parco, por ke vi tion sciu, kaj tiu sinjorino Částková diris al kolego Vokoun, ke el la kartoj ŝi sciiĝis, ke en la Juda Fornaro drako Hurdoburdo tenas en kaptiteco belegan virgulinon, kiun ĝi fortrenis de ŝiaj gepatroj;

kaj la virgulino ja estas murciana principino. 'Murciana aŭ nemurciana,' diris post tio policisto Vokoun, 'tiun knabinon la drako devas transdoni al la gepatroj, aŭ mi intervenos kontraŭ ĝi laŭ la regularo, nomata reglamento, normaro aŭ instrukcioj.'

Tion dirinte li zonis sin per ofica sabro kaj iris al la Juda Fornaro. Mi opinias, ke tiel agus ĉiu el ni."

"Mi samopinias," diris policisto Bambas. "Sed en Dejvice kaj Střešovice mi havis neniun drakon. Do plu."

"Kolego Vokoun," daŭrigis policisto Kubát, "zonis sin per flankarmilo kaj iris tuj nokte al la Juda Fornaro. Kaj je mia animo, el unu el la antroj aŭ kavernoj li aŭdas krudajn voĉojn. Kaj li prilumis ĝin per ofica elektra lampeto kaj ekrimarkis teruran sepkapan drakon; kaj la kapoj kune interparolis, respondis unu al la alia kaj iam ankaŭ disputis kaj insultis al si — sciu, tia drako havas neniujn bonmorojn, kaj se iujn, do nur malbonajn. Kaj en angulo de la kaverno vere ploris belega virgulino kaj ŝtopis siajn orelojn por ne aŭdi, kiel la drakokapo inter si vulgare parolas.

'Hej, vi,' vokis kolego Vokoun la drakon ĝentile ja, sed tamen kun deĵora severeco, 'legitimu vin; ĉu vi havas iujn dokumentojn, devenateston, servolibron, pasporton aŭ aliajn indikaĵojn?'

Tiam unu el la drakokapo ekridaĉis, alia blasfemis, alia sakris, alia krikoleris, alia insolentis, alia insultis kaj

unu elŝovis la langon al Vokoun. Sed kolego Vokoun ne cedis kaj vokis: 'En nomo de la leĝo, prepariĝu kaj iru hope kun mi al komisarejo, vi kaj la knabino tie en la fono.'

'Dotpru,' ekkriegis unu el la drakokapo. 'Ĉu ci scias, ci homa neniaĵo, kiu mi estas? Mi estas drako Hurdo-burdo.'

'Hurdoburdo el la Grenada-Montaro,' diris la dua kapo.

'Nomata ankaŭ Granda Drako Mulhacena,' kriis la tria kapo.

'Kaj mi forglutos cin,' ekkriaĉis la kvara, 'kiel fram-bon.'

'Mi faros el ci ĉarpiojn, ĉifaĵojn, mi dispecetigos, dis-pistos cin kaj krome mi duonige disŝiros cin kie harin-gon, ĝis ŝutiĝos el ci segaĵo,' ektondris la kvina kapo.

'Kaj poste mi tordos cian kolon,' tondregis la sesa.

'Kaj for la parado,' aldiris la sepa kapo terurvoĉe.

Kion vi opinias, junuloj, kion nun faris kolego Voko-un? Vi dirus, ke li timiĝis? Nepre ne! Vidante, ke ne eblas mildmaniere, li prenis deĵoran klabon, aŭ bastone-gon kaj per ĝi ekbatis unu drakan kapaĉon post la alia, plenforte; kaj li havis kroman forton.

'Aj, aj,' miris la unua kapo, 'tio ne estas malbona!'

'Ĵus jukis min la verto,' diris la dua.

'Kaj min ĵus mordis surnuke ia pediko.' diris la tria.

'Karulo,' diris la kvara, 'tiklu min ankoraŭ per la bastoneto.'

'Kaj ekbatu pli forte,' konsilis la kvina, 'por ke ĝi iom ekkraketu.'

'Kaj pli maldekstre,' postulis la sesa, 'tie ege jukas.

'Por mi estas tiu cia vergeto tro mola,' opiniis la sepa. 'Ĉu ci ne havas ion pli duran?'

Tiam policisto Vokoun elingigis la sabron kaj sepfoje ekhakis, ĉiun kapon unufoje, ĝis ektintegis skvamoj sur ili.

'Tio estis jam pli bona,' diris la unua drakokapo.

'Almenaŭ ĝi forhakis la orelon de unu pulo,' plaĉis al la dua kapo; 'nome mi havas ŝtalajn pulojn.'

'Almenaŭ ci ekhakis tiun haron, kiu ĵus min jukis,' diris la tria.

'Kaj ci trakombis mian tondfasonon,' konsentis la kvara kapo.

'Per cia kombileto ci povus ĉiutage grati,' murmuris la kvina.

'Ja la plumeton mi eĉ ne sentis,' diris la sesa.

'Ora homo,' diris la sepa kapo, 'tiklu min ankoraŭfoje!'

Tiam policisto Vokoun ektiris la deĵoran revolveron kaj sepfoje pafis, en ĉiun drakan kapon unufoje.

'Brumbrum,' bruskis la drako, 'ne ĵetu sur min sablon, mia hararo ja estos de ĝi plenplena! Tondre, tiu cia areto

enflugis en mian okulon! Kaj jen, cia rubaĵero implikiĝis inter miajn dentetojn!. Nu, kaj ĝuste nun jam sufiĉe,' ekkriaĉis la drako, ektusis per ĉiuj sep gorĝoj kaj el ĉiuj sep faŭkoj sputis kontraŭ kolegon Vokoun.

Kolego Vokoun ne timiĝis; li elteris la deĵorajn instrukciojn kaj tralegis al si, kion policisto faru, havante kontraŭ si superforton; li trovis, ke tiukaze li voku helptrupon. Poste li elserĉis instrukciojn, kion fari, se ie flagras fajro, kaj trovis, ke dum tiaj cirkonstancoj li telefonu por estingistoj. Traleginte ĉion, kio estas farota, li venigis estingistojn kaj polican helptrupon. Kiel helptrupo alrotis ni ses, kolegoj Rabas, Matas, Kudlas, Fibras kaj mi, kaj kolego Vokoun diris al ni: 'Junuloj, ni estas liberigontaj la knabinon el la potenco de la drako. Ĝi estas ja blenda drako, kaj kontraŭ ĝi ĉiu sabro estas malforta, sed mi rimarkis, ke la draka postnuko estas iom pli mola, por ke ĝi povu fleksiĝi. Do kiam mi diros 'tri', vi ĉiuj devas sabri ĝian postnukon. Sed unue la estingistoj devas estingi la drakon, por ke ĝi ne bruldifektu nian uniformon.' Apenaŭ li tion findiris, kiam tra ra ra alveturis al la Juda Fornaro sep motor-estingiloj kun sep fajrobriĝadanoj. 'Fajro-brigadanoj, atentu,' brave ekvokis policisto Vokoun, 'kiam mi diros 'tri', ĉiu el vi komencos surŝpruci unu drakan kapaĉon; vi devas direkti en la gorĝegon, kie la drako havas la tonsilojn, ĉar tra ili la fajro eliĝas. Do, atentu: unu, du, tri!' Kaj dirinte, 'tri' la fajro-

brigadanoj ekis sep akvofluojn direkte en la sep drakofaŭkojn, el kiuj flagris fajro kiel el aŭtogeno. Ŝŝŝ, kiel ĝi ŝuŝis! La drako bavis, snufis, tuskraĉis kaj gruntis, anhelis, furiozis siblis kaj raŭkegis kaj vokis 'panjo' kaj veste bategis ĉirkaŭ si, sed la fajrobrigadanoj ne cedis kaj ŝprucigis kaj ŝprucigis, ĝis el la sep drakokapoj anstataŭ la flagranta fajro eltorentis vaporo kiel el lokomotivo, ne eblis vidi je paŝo antaŭen. Poste la vaporo maldensiĝis, la fajrobrigadanoj ĉesis ŝprucigi, ektrumpetis kaj veturis hejmen; kaj la drako, tute malsekega kaj senaplomba, nur kraĉetis kaj forkraĉadis kaj alfrotadis al si akvon el la okuloj kaj murmuris: 'Atendu, buboj, tion mi ne donacos al vi!' Kaj tiam ekkriis kolego Vokoun: 'Atenton, junuloj: unu, du, tri', ni ĉiuj policistoj ekbatis per sabroj la sep draknukojn kaj sep kapoj ruliĝis sur la tero; kaj el la sep koloj elŝprucis akvo kaj ĝi ŝprucis kiel el hidranto, tiom da akvo enfluis en la drakon. 'Jen iru,' diris kolego Vokoun al la murciana principino, 'sed atentu, ke ĝi ne surŝprucu vian vesteton.'

'Mi dankas vin, nobla heroo,' diris la fraŭlino, 'ke vi liberigis min el la povo de la drako. Ĝus mi ludis kun miaj amikinoj en la murciana parko volejbalon kaj handbalon kaj diabolon kaj kaŝludon, kiam alflugis la dika olda drako kaj fortrenis min senhalte ĝis ĉi tie.'

'Kaj tra kie, fraŭlino, vi flugis?' demandis kolego Vokoun.

'Trans Alĝerion kaj Malton kaj Záběhllice kaj Strašnice ĝis ĉi tie, dum tridek du horoj, dek sep minutoj kaj kvin sekundoj senstope kaj nete,' diris la principidino murciana.

'La drako do atingis longdistancon rekordon kun pasĝero,' miris koleo Vokoun. 'Mi gratulas vin, fraŭlino. Sed nun mi telegrafu al via sinjoro patro, ke li venigu iun por vi.'

Apenaŭ li tion findiris, kiam rulbruis aŭto kaj el ĝi el-aŭtiĝis la murciana reĝo kun la krono surkape kaj tute en ermenpelto kaj brokato kaj komencis pro ĝojo salti sur unu piedo kaj kriis: 'Ora bubino, fine mi vin trovas!'

'Atendu, via moŝto,' interrompis lin kolego Vokoun, 'Per via aŭto vi veturis tra strato kun malpermesita rapideco, komprenite? Vi pagos sep ĉeĥoslovakajn kronojn punpage.'

La murciana reĝo komencis traserĉi la poŝojn kaj murmuris: 'Mi freneza, ja mi kunprenis sepcent ormonerojn, piastrojn kaj dukatojn, mil pesetojn, trimil sescent frankojn, tricent talerojn, okcent dudek markojn kaj mil ducent ĉeĥoslovakajn kronojn, naŭdek kvin helerojn, kaj nun en la poŝoj mi havas nek monereton nek helereton nek groŝeton nek speson. Plej verŝajne dumvoje ĉion mi elspezis pro benzino kaj punpagoj pro la nepermesita rapido. Brava kavaliro, la sep ĉeĥoslovakajn kronojn mi sendos pere de mia veziro.' Post kio la mur-

ciana reĝo tusetis, metis la manon brusten kaj daŭrigis al kolego Vokoun: 'Laŭ via uniformo, same laŭ via majesta aperaĵo, mi vidas, ke vi estas iu potenca batalanto, princo aŭ eĉ ŝtata oficisto. Ĉar vi liberigis mian filinon kaj senvivigis la teruran hidron mulhacenan, necesus proponi al vi la manon de mia filino, sed vi havas sur la maldestra mano fianĉringon, laŭ kio mi konkludas, ke vi estas edziniĝinta. Ĉu vi havas infanetojn?'

'Mi havas,' diris Vokoun. 'Mi havas trijaran bubon kaj bubinon en vindoj.'

'Mi gratulas,' diris la murciana reĝo. 'Mi havas nur ĉi tiun bubinon. Sed atendu, mi donos al vi almenaŭ duonon de mia murciana reĝolando. Tio estas proksimume sepdek mil kvarcent kvindek naŭ kvadrat-kilometroj da areo kun sep mil kaj cent kvin kilometroj da fervojoj, dek du mil kilometroj da ŝoseoj kaj dudek du milionoj sepcent kvindek mil naŭcent dek unu loĝantoj de ambaŭ seksoj. Do, ĉu ni mandone kontraktos?'

'Sinjoro reĝo,' diris post tio kolego Vokoun, 'tio havas siajn malfacialĵojn. Mi kaj la jenaj amikoj mortigis la drakon deĵordeve, ĉar ĝi ne obeis mian oficialan alvokon kaj ne volis iri kun mi al la komisarejo. Kaj pro deĵor-agoneniu el ni rajtas akcepti rekompencan, nepre ne! Mia sinjoro, tion ili malpermesis al ni.'

'Na,' diris la reĝo. 'Tamen eble mi povus duonon de la

murciana reĝolando kun ĉiu stablo dediĉi, por montri mian reĝan dankemon, al la tuta praga policistaro.'

'Tio estus pli ebla,' opiniis kolego Vokoun, 'tamen ĝi havas, sinjoro reĝo, siajn malfacialaĵojn. Ni havas la tutan pragan distrikton ĝis la akcizlinio, kaj kiom da irado kaj gardado ni havas nur kun Prago! Se ni havus ankoraŭ duonon de la murciana reĝolando kaj devus ĝin patroli, ni ege laciĝus pro la kurado kaj niaj kruroj nin dolorus. Sinjoro reĝo, multfoje ni dankas vin, sed al ni Prago sufiĉas.'

'Almenaŭ do,' diris la murciana reĝo, 'mi donos al vi knaboj, ĉi tiun paketon da tabako, kiun mi kunprenis por la vojaĝo. Ĝi estas la vera murciana kaj ĝuste sufiĉas por sep pipoj, se vi ilin ne plenŝtopos. Do filinjo, ek en la veturilon kaj ni veturas.' — Kaj kiam li malaperis en polvo — kaj ege da polvo faris tiu reĝo — ni, nome kolegoj Ravas, Holas kaj Matas, Kudlas, Fibras kaj Vokoun kaj mi, ni iris al la policejo kaj ŝtopis niajn pipojn per la murciana tabako. Junuloj, tian tabakon mi fumis neniam en mia vivo; eble ĝi ne estis tiel forta, sed bonodoris kiel mielo, kiel vanilo, kiel teo, kiel incenso, kiel dianto kaj bananoj, sed ĉar niaj pipoj ege fetoris, do la bonodoron ni eĉ ne sentis. Kaj la drako estis metota en muzeon, sed antaŭ ol oni venis por ĝi, ĝi gelatiniĝis, ĉar ege ĝi malsekiĝis kaj sorbiĝis de la akvo kaj putriĝis. Kaj jen ĉio, kion mi scias."

Kiam la policisto Kubát en la policejo finrakontis la fabelon pri la drako en la Juda Fornaro, ĉiuj policistoj dum iom da tempo silente fumetis; verŝajne ili pensis pri la murciana tabako. Poste aŭdiĝis policisto Ĥoděra: "Se kolego Kubát rakontis al vi pri la drako el Šitkov, mi rakontos al vi pri hidro el la strato Vojtěšská. Foje mi iris patrole tra strato Vojtěšská kaj subite mi vidis en angulo ĉe la preĝejo grandan ovon. Ĝi estis tiel granda, ek eĉ ne en mian deĵorkaskon ĝi povus eniĝi, kaj peza kvazaŭ ĝi estus el marmoro. Prolatutamondo, mi diris al mi, eble ĝi estas strut-ovo aŭ kio, mi portos tion al la polica direkcio. — Tiam en la fako estis kolego Pour kaj ĝuste havis pikholorojn pro lumbo-malvarmumo; li hejtis do en fera forneto, ke tie estis varme kiel en bakujo, kiel en forno, kiel en sekigejo. 'Ha hoj, Pour,' mi diris, 'ĉi tie vi havas varmon kiel diabla avino. Mi raportas, ke en la strato Vojtěšská mi trovis ian ovon.' 'Do, metu ĝin ien,' diris kolego Pour, 'kaj sidiĝu; kaj mi raportos al vi, kian suferon mi havas pro la lumbaj lancen-doloroj.' Nu, kaj iom ni babilis, kiel jam tio okazas; poste krepuskiĝis kaj jen ni aŭdis en la angulo ion kraketi aŭ brueti. Ni do lumigis kaj rigardis, kaj el la ovo rampis hidro — verŝajne ĝi eloviĝis pro la ega varmo. Ĝi ne estis pli granda ol, ni diru, pudelo aŭ terhundo, sed ĝi estis hidro, tuj ni ekkonis tion, ĉar ĝi havis sep kapojn; laŭ tio nome oni ekkonas drakon.

”Hu, hu,’ diris kolego Pour, ’kion ni faros ĉi tie kun ĝi? Mi telefonu pro senfeligisto, por ke li likvidu la beston.’

”Sciu, Pour,’ mi diris al li, ’tia hidro estas sufiĉe rara besto; mi opinias, ke ni donu anoncetojn en ĵurnalojn, por ke anonciĝu ĝia posedanto.’

’Nu bone,’ diris Pour, ’sed dume per kio ni ĝin manĝigos? Mi provos tion per lakto kaj pecigita bulko; por ĉiu ido lakto estas plej saniga.’

Li dispecetigis do sep bulkojn en sep litrojn da lakto; vi devus vidi, kiel la drakido avide ĝin ekmanĝis; unu kapo forpuŝadis de la pelveto la alian kaj ĉiuj ĉi kapoj gruntis je si kaj ektrinkis la lakton, ĝis ili verŝmalsekigis la tutan oficejon; poste unu kapo post la alia sin ĉirkaŭlekis kaj metiĝis al dormo. Poste kolego Pour ŝlosis la hidron an sia oficejo, kie estis deponitaj ĉiuj perditaj kaj retrovitaj aĵoj el tuta Prago, kaj en ĉiujn ĵurnalojn li donis la jenan anonceton:

Drakido, ĵus eloviĝinta, estis trovita en Vojŝská-strato. Ĝi estas sepkapa, flave kaj nigre striita. Ĝia posedanto anonciĝu ĉe la polica direkcio, fako perdoj-trovoj.

Kiam matene kolego Pour eniris en sian oficejon, li diris nenion pli ol: ’Jenjenjen huhu ve ufuf damne mil-tondroj, ĉe ĉiuj diabloj, por ke mi ne sakru!’ Ĝi, la hidro, forvoris dum la nokto ĉiujn aĵojn, kiujn iu en Prago perdis aŭ trovis, do ringojn kaj horloĝojn, monujojn, man-

saketojn kaj notlibrojn, pilkojn kaj kraĵonojn kaj cirkelgarniturojn kaj gantojn kaj krome ĉiujn oficialajn dokumentojn, aktojn, protokolojn kaj listojn, mallonge ĉion, kio estis en la oficejo de Pour, eĉ la pipon de Pour, ŝovelilon por karbo kaj liniilon, per kiu Pour liniis siajn listojn: la hidro formanĝis tiom, ke ĝi estis duoble pli granda kaj kelkaj ĝiaj kapoj naŭzis.

'Tiel do ĝi ne eblos,' diris kolego Pour, 'ĉi tiun beston mi ne povas lasi ĉe mi.' Kaj li telefonis al la Bestprotektanta Societo, ke la suprenotita estimata societo disponigu al la drakido rifuĝejon, same, kiel ĝi faras tion por perdiĝintaj hundetoj kaj katetoj. 'Kial ne,' diris la Societo kaj prenis la drakidon en sian azilon. 'Sed ni ŝatus scii,' diris poste la Societo, 'per kio fakte tia hidro sin nutras. Naturscienco ne pritraktas tion.' Ili provis tion do kaj manĝigis la drakon per lakto, kolbasetoj, salamo, ovoĵ, karto, kaĉo, ĉokolado, ansersango, pizo, fojno, supo, greno, ekstrakcervelaso, tomatoj, rizo, bulkoj, sukero, terpomoj kaj sekigitaj fruktoj; la drakido ĉion englutis kaj ankaŭ forvoris iliajn librojn, gazetojn, bildojn, pordoklinkojn kaj entute ĉion, kion ili tie havis; kaj ĝi kreskis tiom, ke ĝi estis pli granda ol sanbernarda hundo.

Sed dume venis al la Societo telegramo eĉ el Bukureŝto, en kiu estis skribite per magiista skribo:

*La drakido estas ensorĉita homo. Detalojn parole.
Mi alveturos en tricent jaroj al la Wilson-stacidomo.*

Magiisto Bosko

Tiam la Bestprotekta Societo gratis sin postorele kaj diris: 'Uf, se la hidro estas ensorĉita homo, ĝi estas do homa persono, kaj ni ne povas lin teni sub bestoprotektado. Ni devas lin sendi en trovitejon aŭ orfejon.' Sed la trovitejoj kaj orfejoj diris: 'Nu, se tiu estas homo ensorĉita je besto, li ne estas do homo, sed besto, ĉar li estas ensorĉita je besto. Sekve la ensorĉita homo ne apartenas en nian sektion, sed al la bestprotekto.' Kaj ĉar ili ne povis akordiĝi pro tio, ĉu homo ensorĉita je besto estas pli homo aŭ pli besto, volis pri la hidro zorgi nek unuj nek la aliaj kaj la povrulo hidro ne sciis, kies ĝi fakte estas; tio ĝin tiel ĉagrenis, ke ĝi ĉesis manĝi, ĉefe ĝiaj tria, kvina kaj sesa kapoj. En la Societo estis iu malgranda kaj magra hometo, sensignifa kaj modesta kiel malplena guŝo, lia nomo komenciĝis je N: Nováček aŭ Nerad aŭ Nohejl — aŭ ne, li nomiĝis sinjoro Trutina; kaj kiam tiu sinjoro Trutina vidis, kiel pro aflikto velkas unu hidra kapo post la alia, li diris al tiu Societo: 'Sinjoroj, estu aŭ homo aŭ besto, mi prenos la hidron en la hejmon kaj dece zorgos pri ĝi.'

Tiam ĉiuj diris: 'Hura, hura,' kaj sinjoro Trutina kondukis la hidron en sian hejmon.

Vere oni devas diri, ke li zorgis pri ĝi, kiel decas: man-

ĝigadis ĝin kaj kombis kaj karesis — tiu sinjoro Trutina ege ŝatis bestojn; kaj ĉiuvespere, veninte hejmen el la laboro, li kondukis ĝin promene, por ke ĝi iom kuradu; kaj ĝi saltetis post li kiel hundeto kaj vostumis kaj aŭdis ja la nomo Amina. Foje vespere renkontis ilin sinjoro senfeligisto kaj diris: 'Stop, sinjoro Trutina, kian beston vi havas? Se ĝi estas rabobesto aŭ bestio aŭ besto sovaĝa, vi ne rajtas ĝin konduki tra stratoj; sed se ĝi estas hundeto, vi devas aĉeti al ĝi hundomarkon kaj pendigi sur ĝian kolon.' 'Ĝi estas ia rara hundospecio,' diris sinjoro Trutina, 'tiel nomata vertago draka aŭ levrelo hidra aŭ hundo sepkapa, ĉu, Amina? Estu senzorga, sinjoro senhaŭtigisto, la hundomarkon mi aĉetos al ĝi.' Kaj li aĉetis hundomarkon al ĝi, kvankam, povrulo, li devis doni pro ĝi la lastan kronon, kiun li havis. Kaj denove renkontis ilin sinjoro senfeligisto kaj diris: 'Sinjoro Trutina, tiel ne eblas; se tiu via hundeto havas sep kapojn, ĝi devas havi hundomarkon sur ĉiu kolo, ĉar ekzistas ordono, ke ĉiu hundo devas havi sur la kolo hundomarkon.' 'Sed, sinjoro senfeligisto,' defendis sin sinjoro Trutina, 'Amina ja havas la hundomarkon sur la meza kolo!' 'Egale,' diris sinjoro senfeligisto, 'sed la ceteraj ses kapoj kuras sen marko sur la kolo kaj tion toleri mi ne povas. Tiun vian hundaĉon mi devas konfiski.' 'Mi petas vin,' diris sinjoro Trutina, 'atendu kun tio ankoraŭ tri tagojn,

mi aĉetos al Amina la markojn,' Kaj li iris hejmen tute malfeliĉa, ĉar kontraŭe li havis eĉ ne dekheleeron.

Hejme li eksidis kaj mire, ke li ne ploris, kiel lin tio afliktis; li diris al si, ke sinjoro senfeligisto forprenos de li lian Amina kaj vendos ĝin al cirko aŭ ĝin mortigos. Kaj dum tiel li suferis kaj ĝemis, proksimiĝis la al tiu hidro kaj metis al li ĉiujn sep kapojn en la sinon kaj rigardis en liajn okulojn per tiaj bele tristaj okuloj; tiajn belajn kaj ĝuste homajn okulojn havas ĉiu besto rigardanta la homon kun amo kaj konfido. 'Mi ne donos cin, Amina,' diris sinjoro Trutina kaj frapetis la hidron sur ĉiuj sep kapoj; kaj poste li prenis sian horloĝon post la paĉjo kaj sian festveston kaj siajn plej belajn ŝuojn kaj ĉion ĉi li vendis kaj ankoraŭ iom da mono prunteprenis kaj por ĉiu ĉi mono li aĉetis ses hundomarkojn kaj pendigis ilin sur kolzonojn de sia hidro. Kaj kiam li eliris kun ĝi en la straton, ĉiuj markoj do tintis kaj sonoris, kvazaŭ veturus sledo kun tintiloj.

Sed ankoraŭ tiuvespere venis al sinjoro Trutina lia sinjoro domposedanto kaj diris: 'Sinjoro Trutina, tiu via hundo iel ne plaĉas al mi. Mi ne tro komprenas la hundojn, sed onidire ĝi estas drako; kaj tion toleri en mia domo mi ne povas.'

'Sinjoro domposedanto,' diris sinjoro Trutina, 'Amina tamen neniun nocis!' 'Tutegale,' diris sinjoro domposedanto, 'sed en solida domo ne estas loko por drako, kaj

fino. Se vi ne volas forigi la hundon, mi malluigas vin ekde la unua. Mian respekton, sinjoro Trutina.’ Kaj li brufermis post si la pordon.

’Vidu do, Amina,’ ekploris sinjoro Trutina, ’nun al ĉio ĉi ni devas de ĉi tie transloĝiĝi; sed mi ne donos cin.’ Tiam silente la hidro alŝovis sin al li kaj ĝiaj okuloj tiel belege brilis, ke tion sinjoro Trutina ne povis elteni. ’Nu, nu,’ li diris, ’sciu mia maljuna, ke mi amas cin.’

La tagon poste li iris zorgoplene en sian laboron — nome li estis skribisto en ia banko; kaj tie venigis lin al si lia ĉefo. ’Sinjoro Trutina,’ diris tiu sinjoro ĉefo, ’viaj privataj aferoj neniel interesas min, sed ekzistas iaj strangaj onidiroj, ke hejme vi bredas drakon. Drakon povas permesi al si nur iu reĝo aŭ sultano, sed por ordinaraj homoj tio ne estas. Sinjoro Trutina, vi vivas tro super viaj rimedoj. Aŭ la drakon vi forigos, aŭ ekde la unua mi maldungas vin.’ ’Sinjoro ĉefo,’ diris Trutina mallaŭte, sed firme, ’mian Amina mi ne fordonos.’ Kaj li iris hejmen tiel afliktite, ke ne estas eldireble.

Hejme li sidiĝis kiel korpo sen animo kaj el la okuloj komencis flui larmoj. ’Nun estas mia fino,’ li diris kaj ploris. Kaj tiam li sentis, kiel la hidro metis unu kapon sur liajn genuojn; pro larmoj li ne vidis ĝin, sed karesis ĝin kaj flustris: ’Ne timu, Amina, mi ne fordonos cin.’ Kaj dum li ĝin karesis, komencis ŝajni al li, ke la kapo estas iel mola kaj krispa; kaj li elfrotis siajn okulojn kaj

ekrigardis — kaj anstataŭ la hidro genuis antaŭ li bele-
ga virgulino, apogis sian mentonon je liaj genuoj kaj dol-
ĉe rigardis en liajn okulojn. 'Disinjoro,' ekkriis sinjoro
Trutina, 'kie estas Amina?' 'Mi estas principino Amina,'
diris la junulino, 'ĝis la nuna momento ensorĉita en hid-
ron, ĉar mi estis orgojla kaj kolerema. Sed ne plu, sinjoro
Trutina, mi estos brava kiel ŝafido.'

'Amen,' aŭdiĝis en la pordo, kaj tie staris la magiisto
Bosko. 'Vi liberigis ŝin, sinjoro Trutina. Ĉiu amo liberi-
gas la homojn kaj bestojn el ilia ensorĉo. Aj, aj, infanoj,
kiel bone ĝi finiĝis! Sinjoro Trutina, la paĉjo de ĉi tiu
fraŭlino sendas al vi sciigon, ke vi veturu en lian reĝo-
landon por surtroniĝi. Do ek, por ke ni ne maltrafu la
trajnon.'

Kaj jen la fino de la kazo kun la hidro el Vojtěšská
strato," findiris policisto Ĥoděra. "Se vi ne volas kredi,
demandu kolegon Pour."

Fabelo poŝtista

Vere mi ŝatus scii: se povas esti fabeloj pri diversaj aliaj homaj metioj kaj profesioj, kiel pri reĝoj kaj reĝidoj kaj rabistoj, paŝtistoj kaj kavaliroj kaj magiistoj kaj ogroj kaj arbohakistoj kaj niksoj, kial ankaŭ foje ne povus esti fabelo pri poŝtisto? Tia poŝtofiĉejo estas ja preskau kiel ensorĉita loko; vi havas tie nurajn surskribojn, kiel "estas malpermesite fumi", kaj "kunpreni hundojn estas malpermesite" kaj multajn aliajn avertajn tabuletojn — mi diras al vi, tiom da publikigoj kaj malpermesoj havas en siaj oficejoj nek sorĉistoj, nek drakoj. Jam el tio videblas, ke poŝto estas loko mistera kaj potenca. Kaj poste, infanoj, kiu iam vidis, kio okazas en poŝtejo nokte, kiam ĝi estas fermita? Mi diras, tion ni volus rigardi! Iu sinjoro ja — sciu, li estis sinjoro Kolbabo, laŭprofesie poŝtisto kaj leterportisto — vere li mem pririgardis tion kaj diris tion al la ceteraj leterportistoj kaj poŝtistoj kaj tiuj denove tion plue diris, ĝis ĝi alportiĝis al mi; kaj mi ne estas tiel enviema, por lasi tion por mi mem. Nur eksteren kun ĉi tio, jam oni komencas.

Tiun sinjoron Kolbabo, laŭ profesio leterportiston kaj poŝtiston, iel enuigis lia poŝtista metio: kiom nur tia le-

terportisto irlaciĝas, kurlaciĝas, plandegas, hastas, postkuras kaj marŝas, ke ĉiutage li devas iri dudek naŭmil sepcent tridek paŝojn, inkluzive okmil ducent kvardek naŭ ŝtupojn supren kaj malsupren, ke leteroj, kiujn li disportas, cetere estas nuraj presaĵoj kaj fakturoj kaj aliaj nenecesaĵoj, kiuj faras al neniu eĉ ne iom da ĝojo, ke ankaŭ poŝtoŝtupo estas negaja kaj nekontentiga ejo, kie ankaŭ neniuj fabeloj okazas. Tiel kaj ĉiel lamentis sinjoro Kolbabo super sia poŝtista profesio. Kaj foje pro nura tristo li eksidis en la poŝtoŝtupo apud forno kaj ekdormis kaj tute ne rimarkis, ke estas jam la sesa; kaj kiam batis la sesa, foriris la ceteraj poŝtistoj kaj leterportistoj kaj fermis la poŝtoŝtupojn kaj sinjoro Kolbabo restis tie ŝlosita kaj dormis.

Povis esti proksimume noktomezo, kiam lin vekis brueto, simila al paŝetado de musoj surplanke. Ni vidu, diris al si sinjoro Kolbabo, ni havas ĉi tie musojn; necesus insidprepari por ili kaptilon. Kaj dum li rigardas por vidi la musojn, li vidas, ke tio estas neniuj musoj, sed poŝtistaj koboldoj. Ili estas tiaj etaj kaj barbhavaj nanetoj, proksimume tiel grandaj kiel negranda kokino wyandotta aŭ kiel sciuro aŭ kiel arbara kuniklo, tiel proksimume; sur la kapoj ili havas poŝtistajn ĉapojn kiel efektivaj poŝtistoj kaj portas pelerinetojn kiel veraj leterportistoj. Ajaj, diris al si sinjoro Kolbabo, sed cetere eĉ ne vorteton li diris, nek sonon aŭdigis, nek flustris, por

ilin ne forpeli. Kaj jen, iu poŝtista koboldo estis reordiganta la leterojn, kiujn sinjoro Kolbabo estis kolportonta matene; alia klasis poŝtaĵojn, tria pesis paketojn kaj gluis sur ilin etikedojn; kvara grumblis, ke tiu skatolo ne estas ligita laŭ normo, kvina sidis ĉe giĉeto kaj estis rekalkulanta la monon kiel tion faras poŝtoficistoj. "Mi pensis ja tion," murmuretis tiu koboldo, "jen tiu poŝtista homo denove miskalkulis je unu helero; mi devas tion korekti al li." La sesa diableto sidis ĉe telegrafa aparato kaj tajpis per ĝi depeŝon, iel simile: taktak tak tak taktaktak tak. Sed sinjoro Kolbabo komprenis, kion li telegrafas; en la ordinara lingvo tio estis: "Allo, ĉu poŝtministrejo? Ĉi tie poŝtkoboldo numero tridek unu. Mi raportas, ĉio en ordo stop. Kolego elfo Fuŝbarbulo tusas, li anonciĝas kiel malsanulo kaj ne ekdeĵoris stop. Ahoj stop."

"Jen estas letero al urbo Bambolimbonando en la kanibala reĝolando," aŭdiĝis la sepa koboldo. "Kie ĝi estas?"

"Tio estas trans Benešov," diris la oka pigmeo. "Alskribu tien, kolego, kanibala reĝolando, fervojstacio Malsupra Trebizon, la lasta poŝto Katkastelo. Per aerpoŝto. Nu kaj ni estas pretaj. Kio estus, sinjoroj, se nun ni iom kartludus?"

"Kial ne," diris la unua koboldo kaj kalkuldemetis tridek du leterojn. "Jen la kartetoj kaj ni povas komenci."

La dua gnomo prenis la leterojn kaj miksis ilin.

”Mi deigas,” diris la unua diableto.

”Disdonu, do,” diris la dua.

”Aj, aj,” murmuris la tria, ”kian misŝancan karton mi ricevis!”

”Mi ĵetas,” diris la kvara kaj klakis per la letero tablen.

”Tion mi superatutos,” diris la kvina kaj metis sian karton sur la antaŭan.

”Mia kara, nenio kontraŭ mi,” diris la sesa kaj alĵetis sian leteron.

”Ha,” diris la sepa, ”mi havas ankoraŭ pli superan karton.”

”Kaj mi havas atutan ason,” vokis la oka kaj ĵetis sian leteron sur la ceterajn.”

Tion, infanoj, sinjoro Kolbabo ne plu povis elteni kaj ekvortigis: ”Bonvolu, sinjoroj flaruloj, ne ĝeni vin, sed kiajn kartojn vi havas?”

”Ha, sinjoro Kolbabo,” diris la unua koboldo, ”Ni ne volis vin vekti, sinjoro Kolbabo, sed se jam vi vekigis, venu ludi kun ni. Ni ludas nome nur la ordinaran sesdeksekon.”

Al sinjoro Kolbabo ne necesis dufoje diri, li sidiĝis inter la koboldojn.

”Jen la karto,” diris la dua gnomo kaj donis al li kelkajn leterojn, ”kaj vi povas komenci.”

Sinjoro Kolbabo rigardis la leterojn, kiujn ili enmanigis al li, kaj diris: ”Bonvolu ne koleri je mi, sinjoro kobol-

doj, sed en la mano mi tute ne havas kartojn, mi havas nur ne enmanigitajn leterojn.”

”Ĝuste,” respondis la kvara pigmeo, ”tio estas niaj ludkartoj.”

”Hm,” diris sinjoro Kolbabo, ”bonvolu ne koleri, sinjoroj, sed la ludkartoj devas havi kiel plej malaltan sepon, poste okon, poste naŭon kaj dekon, fanton kaj bubon, reĝon kaj la plej superan ason. Sed en la leteroj nenio tia estas.”

”Ege vi eraras, sinjoro Kolbabo,” diris la kvara vireto. ”Sciu, ĉiu tia letero valoras pli aŭ malpli, laŭ tio, kio en ĝi interne estas skribite.”

”La plej malsupera karto,” rakontis la unua diableto, ”tiel nomata sepo aŭ hepto, tio estas tiaj leteroj, en kiuj oni mensogas ion aŭ pretekstas.”

”La dua plej malsupera karto estas la oko,” daŭrigis la dua pajaco, ”tio estas tiaj leteroj, kiujn oni skribas pro devigo kaj devo.”

”La tria malalta karto estas la naŭo,” diris poste la tria etkreskulo, ”kaj tio estas leteroj, kiujn oni skribas nur pro ĝentileco.”

”La unua alta karto estas la deko,” diris la kvara. ”Tio estas leteroj, en kiuj oni skribas ion interesan kaj novan.”

”La dua alta karto esta fanto,” diris la kvina. ”Tio estas leteretoj, kiujn oni sendas, por fari al alia plezuron.”

’ ”La tria alta karto estas bubo,” diris la sesa. ”Tio estas leteroj inter bonaj amikoj.”

”La kvara alta karto nomiĝas reĝo aŭ ankaŭ damo,” aldiris la sepa. ”Kaj tio estas tia letero, kiu estas skribita pro amo.”

”Kaj la plej supera karto aŭ aso,” findiris la oka maljunuleto, ”tio estas tia letereto, per kiu oni donas la la alia sian tutan koron. Tio estas karto, kiu atutas aŭ superatutas ĉiujn ceterajn. Sciu, sinjoro Kolbabo, tia letero troviĝas, kiam panjo skribas al sia infano aŭ homo al homo, kiun li amas pli ol sin mem.”

”Ha,” diris sinjoro Kolbabo. ”Sed nun mi ŝatus scii, kiel tuj vi ekkonas, kio estas skribite en la leteroj. Sinjoroj, tion ege neŝate mi aŭdus, ke eble vi malfermas ilin kaj legas. Tion oni de rajtas, hometoj, vi atencus letersekretion, kaj vi devus vin, kanajloj, denunci al polico. Pro disinjoro, tio estus ega peko, se iu malfermus leteron, kiu ne apartenas al li!”

”Tion, sinjoro Kolbabo, ankaŭ ni scias,” diris la unua diableto. ”Sed ni, mia kara, ni sentas per palpsento tra fermita koverto, kio en la letero enestas. La indiferentaj leteroj estas ĉe pripalpo malvarmaj, sed ju pli da amo estas en la letero, des pli varma estas tiu letero.”

”Kaj kiam ni koboldoj metas la fermitan leteron sur la frunton,” aldonis la alia, ”ni povas diri al vi vorton post vorto, kio tie estas skribite.”

”Tio estas io alia,” diris sinjoro Kolbabo. ”Sed se jam ni estas ĉi tie kune, ŝate mi demandus pri io. Eble tio vin, sinjoroj, ne ofendos.”

”Ĉar temas pri vi, sinjoro Kolbabo,” respondis la tria gnomo, ”vi povas demandi pri kio ajn.”

”Mi ŝatus scii,” diris sinjoro Kolbabo, ”kion la koboldoj fakte manĝas.”

”Tio estas diversa,” diris la kvara etkreskulo. ”Ni koboldoj, vivantaj en diversaj oficejoj, ni nutras nin kiel blatoj, per tio kion homoj ŝutperdas; panereton aŭ peceton da bulko —Sciu, sinjoro Kolbabo, ne estas multo, kio al vi homoj falas de la buŝo.”

”Sed ni koboldoj poŝtistaj,” diris la kvina pigmeo, ”ni ne statas tiel malbone. Iam ni kuiras telegrafajn bendojn kiel nudelojn kaj grasas ilin per poŝtgluo; sed la gluo devas esti el dekstrino.”

”Aŭ ni povas prileki poŝtmarkojn,” rimarkigis la sesa. ”Tio estas bona, sed ĝi ege kungluas la barbojn.”

”Sed pleje ni manĝetas panerojn,” rakontis la sepa gantpupo. ”Sciu, sinjoro Kolbabo, tial en la ofic-spacoj oni tiel malofte balaas, por ke restu iaj paneroj por ni.”

”Pardonu mian aŭdacon,” demandis plu sinjoro Kolbabo, ”kie fakte vi tranoktas?”

”Tion, sinjoro Kolbabo, ni ne diros al vi,” diris la oka maljunulo. ”Se la homoj scius, kie ni koboldoj loĝas, ili forbalaus nin de tie. Ne, ne, tion vi ne rajtas scii.”

Nu, se vi ne diros tion al mi, lasu tion por vi, pensis sinjoro Kolbabo. Mi atentos ja, kien vi iros dormi. — Kaj denove li sidiĝis apud forno, por atenti. Sed apenaŭ li ekkomfortis, jam liaj palpebroj komencis peziĝi, kaj anataŭ ol oni dirus kvin, sinjoro Kolbabo ekdormis kaj dormis kiel upupo ĝis dimateno.

* * *

Ĉi tion do, la viditan sinjoro poŝtiso Kolbabo al neniu diris, ĉar, vi scias, en poŝtejo fakte oni ne rajtas tranokti. Sed ekde tiu tempo lin ne plu ĉagrenis, ke li devas disportadi leterojn al la homoj. Ĉi tiu letero, li diris al si, estas tepideta, sed jen ĉi tiu vere ardas, kiel varma ĝi estas; verŝajne ĝi estas letero de iu panjo.

Kaj foje li klasis en la poŝtejo leterojn, kiujn li eligis el poŝtkesto, por disporti ilin al homoj, "Jen, jen," li diris subite, "ĉi tie estas letero en glufermita koverto, sed sur la koverto estas nek adreso nek poŝtmarko."

"Aha," diris sinjoro poŝtestro, "denove iu enĵetis leteron en keston sen adreso."

Estis ĝuste en la poŝtejo iu sinjoro por forsendi al sia panjo registritan leteron; tiu sinjoro tion aŭdis kaj diris: "Nu certe tiu estas stultulo, imbecilo, ekscesulo, maller-tulo, dromedaro, sentaŭgulo kaj ŝtipo, kiu sendas leteron kaj eĉ ne surskribas adreson."

"Tute ne," diris sinjoro poŝtestro, "da tiaj leteroj, sin-

jero, ni ricevas amason dum la jaro. Vi ne kredus, sinjoro, kiel la homoj estas distraj. Ili skribas leteron, sinjoro, kaj poste kuregas kun ĝi al poŝto kaj forgesas, sinjoro, rigardi, ke ili ankoraŭ ne surskribis adreson. Ajaj, sinjoro, tio okazas pli ofte, ol vi opinias.”

”Jen jen,” miris tiu sinjoro,” kaj kion vi faras kun la leteroj sen adreso?”

”Ni lasas ilin kuŝi en la poŝto, sinjoro,” diris la poŝtestro, ”ĉar ni ne povas ilin, sinjoro, enmanigi.”

Sinjoro Kolbabo dume turnis en la mano la leteron sen adreso kaj murmuretis: ”Sinjoro poŝtestro, ĉi tiu letero estas iel varma, certe en ĝi estas io sincera. Mi opinias, ke la letero tamen estu iel enmanigota al tiu, al kiu ĝi apartenas.”

”Se tie ne estas skribita adreso, tio ne eblas kaj fino,” oponis sinjoro poŝtestro.

”Eble vi povus malfermi la leteron,” konsilis la fremda sinjoro, ”kaj rigardi, kiu ĝin sendas.”

”Ne eblas, sinjoro,” diris sinjoro poŝtestro severe, ”ĉar tio estus, sinjoro atenco kontraŭ la letersekreto kaj tio ne rajtas esti.” Kaj per tio la afero por li estis finita.

Sed kiam tiu fremda sinjoro foriris, sinjoro Kolbabo turniĝis al sinjoro poŝtestro: ”Pardonu al mi mian aŭdaccon, sinjoro poŝtestro, sed koncerne la leteron povus eble konsili al ni iu sinjoro poŝta koboldo.” Kaj poste li rakontis, kiel foje nokte li vidis ofici poŝtajn diabletojn

kaj kiel la koboldoj scias legi leterojn, ne malferminte ilin.

Sinjoro poŝtestro enpenŝiĝis kaj poste diris: "Mil katoj, tio eblus. Provu tion do, sinjoro Kolbabo; se tiu sinjoro koboldo diros al ni, kio en la fermita letero estas skribite, eble ni sciiĝos, al kiu la letero apartenas."

Tiunokte sinjoro Kolbabo igis sin fermi en la poŝtejo kaj atendis. Estis eble jam noktomezo, kiam li aŭdis paŝetadon sur la planko, kvazaŭ musoj kurus; kaj poste li vidis denove la koboldojn klasantaj la leterojn kaj pesantaj sendaĵojn, kalkulantaj monon kaj morsantaj depeŝojn. Kaj kiam ili estis kun ĉio pretaj, ili kunsidiĝis sur la planko kaj ludis per la leteroj sesdeksekon.

Kaj en tiu momento aŭdiĝis sinjoro Kolbabo: "Bonvesperon, sinjoroj Etuletoj."

"Ha, jen sinjoro Kolbabo, diris la plej aĝa etuleto. "Venu do kartludi kun ni."

Al sinjoro Kolbabo ne necesis dufoje diri kaj li eksidis kun ili sur la planko.

"Mi ĵetas," diris la unua koboldo kaj metis sian karton teren.

"Mi atutas," diris la dua.

"Mi superatutas," diris la tria.

Nun estis vico de sinjoro Kolbabo, kaj li metis la fermitan senadresan leteron sur la ceterajn tri.

”Vi gajnis, sinjoro Kolbabo,” diris la unua diableto, ”ĉar vi ĵetis la plej superan karton aŭ keran ason.”

”Pardonu mian aŭdacon,” diris sinjoro Kolbabo, ”ĉu certe vi scias, ke ĝi estas tiel supera karto?”

”Kiel mi ne ekkonu tion,” diris la diableto. ”Ĝi estas letero, kiun skribas junulo al knabino, kiun li amas pli ol sin mem.”

”Tion mi ne supozas,” intence diris sinjoro Kolbabo.

”Kaj ĝuste tiel ĝi estas,” respondis la pigmeo. ”Se vi ne volas tion kredi, mi tralegos al vi la letereton.” Kaj li prenis la leteron, metis ĝin frunten, fermis la okulojn kaj legis jene:

*”Mia plej kara Marinja,
mi skrabas al ci (jen ortografia eraro, diris tiu pigmeo, ĝuste devas esti i), ke mi ricevis ŝoforan postenon kaj se ci volus ni povus havi edziĝfeston skrabu almi seci ankoraŭ min amas skrabu baldaŭ almi cia fidela*

Franĉjo.”

”Mi dankas do al vi, sinjoro koboldo,” diris sinjoro Kolbabo, ”tion mi bezonis scii. Multfoje mi dankas vin.”

”Ne dankinde,” diris la vireto, ”Sed sciu, tie estas dek ortografiaj eraroj. Multon tiu Franĉjo ne lernis en lernejo.”

”Nur mi ŝatus sciiĝi, kiu Marinja ŝi estas, aŭ kiu Franĉjo,” murmuretis sinjoro Kolbabo.

”Mi ne povas helpi, sinjoro Kolbabo,” diris la etula sinjoreto. ”Tio ne plu estas skribite.”

La sekvintan matenon raportis sinjoro Kolbabo al sinjoro poŝtestro, ke tiun senadresan leteron skribis iu ŝoforo Franĉjo al iu fraŭlino Marinja, kaj ke tiu sinjoro Franĉjo volas edziĝi al tiu fraŭlino.

”Jesuosingoreto,” ekvokis sinjoro poŝtestro, ”tio estas ege grava letero, tiu fraŭlino nepre ricevu ĝin!”

”Mi alportus la leteron tujtute al ŝi,” diris sinjoro Kolbabo, ”se nur mi scius, kiel tiu fraŭlino Marinjo nomiĝas laŭ familia nomo kaj en kiu urbo, strato kaj numero ŝi loĝas.”

”Tion scius, sinjoro Kolbabo, ĉiu,” diris sinjoro poŝtestro. ”Por tio oni eĉ ne bezonus esti poŝtisto. Sed mi tre ŝatus vidi, ke tiu fraŭlino ricevu la leteron.”

”Bone, sinjoro poŝtestro,” ekvokis sinjoro Kolbabo, ”mi serĉos do la fraŭlinon adresatinon, eĉ se mi devus la tutan jaron kuri kaj trairi la tutan mondon.”

Tion li diris, metis sur la ŝultron la poŝtistan pensakon kun la letero kaj pantranĉaĵo kaj ekiris en la mondon.

Sinjoro Kolbabo iris kaj iradis kaj ĉie demandis, ĉu en tiu regiono eble vivas ia fraŭlino Marinja, atendanta letereton de iu sinjoro ŝoforo Franĉjo. Kaj li trairis la tutajn regionojn de Litoměřice kaj Louny kaj distrikton Rakovník kaj regionojn Plzeň kaj Domažlice kaj Písek-

regionon kaj regionojn Budějovice, Pfielouč, Tábor kaj Čáslav kaj administran distrikton Gradecian kaj distriktojn Jičín kaj Boleslav; li estis en Kutná Hora, Litomyšl, Třebo , Vod any, Sušice, Pfiíbram, Kladno kaj Mladá Boleslav kaj en Votice kaj en Trutnov kaj Sobotka kaj Turnov kaj en Slaný kaj en Pelhřimov, eĉ en Dobruška kaj Úpice kaj en Hronov kaj Ĉe Sep Kabanoj, ankaŭ en Krávkorka, li estis ankaŭ en Zálesí, nu mallonge ĉie kaj ĉie li demandis pri tiu fraŭlino Marinja. Da fraŭlinoj Marinja, kiujn li trovis en Bohemio, estis multaj, sume kvardek naŭmil naŭcent okdek, sed neniu el ili tamen atendis letereton de iu sinjoro ŝoforo Francjo; kelkaj el ili tamen atendis letereton de iu sinjoro ŝoforo, sed tiu ne nomiĝis Francjo, se Antoĉjo aŭ Ladislao aŭ Venceslao, Jozefo aŭ Jarolím aŭ Aloĉjo aŭ Floriano, ankaŭ Georgo aŭ Johano aŭ Laŭrenco, ankaŭ Dominiko kaj Vendelín kaj Erazim, nur ne Francjo; kaj aliaj fraŭlinoj Marinjaj same atendis letereton de iu Francjo, sed tiu ne estis ŝoforo, sed seruristo aŭ serĝento, lignaĵisto aŭ konduktoro, eventuale ankaŭ drogisto, tapetisto, razisto aŭ tajloro, sed nepre ne ŝoforo.

Kaj sinjoro Kolbabo jam irpasigis unu jaron kaj unu tagon, sed ne povis enmanigi la leteron al la ĝusta fraŭlino Marinja. Li ekkonis multajn aferojn: li vidis vilaĝojn kaj urbojn, kampojn kaj arbarojn, sunleviĝon kaj sunsubiron, revenon de alaŭdoj kaj venon de printempo, la

semadon kaj rikolton, boletojn en arbaro kaj maturiĝantajn prunojn, li vidis lupolon en Žatec kaj apud Mělník vitejojn kaj karpajn en Třebo kaj en Pardubice mielkukon, sed kiam la vana serĉado daŭris jam unu jaron kaj tagon, li eksidis deprimate apud vojo kaj diris al si: "Ĉio vana, eble jam mi ne trovos fraŭlinon Marinja."

Preskaŭ li estis esploranta pro bedaŭro. Li bedaŭris fraŭlinon Marinja, ke ŝi ne ricevis la leteron de la junulo, kiu amis ŝin pli multe ol sin mem; li bedaŭris la ŝoforon Francjon, ke li ne povas enmanigi tiun leteron; kaj li bedaŭris sin mem, ĉar tiom li klopodis kaj tiom iradis dum pluvo kaj varmo kaj veteraĉo kaj misvetero kaj ke ĉio ĉi estis vana.

Kaj dum li tiel sidis apud la vojo kaj bedaŭris, li vidis, ke sur la ŝoseo veturas ia aŭto. Ĝi veturis malrapidete, proksimume nur po ses kilometroj hore, kaj sinjoro Kolbabo diris al si: "Nu certe ĝi estas ia praantikva ĉaro, ke ĝi ŝoviĝas tiel lante." Sed kiam la aŭto alveturis pli proksimen, li vidis, ke ĝi estas, ho dioj, bela okcilindra Bugatti kaj ke ĉe la stirrado sidas malĝoja, nigre vestita ŝoforo kaj en la veturilo malĝoja, nigre vestita sinjoro.

Kaj kiam la malĝoja sinjoro ekvidis apud la vojo afliktitan sinjoron Kobabo, li ordonis halti kaj diris: "Venu, poŝtisto, mi veturigos vin iom."

Sinjoro Kolbabo ĝojis, ĉar post tiel longa migrado jam

doloris lin la kruroj; li eksidis ĉe la nigra malĝoja sinjoro kaj la veturilo lante kaj malgaje ekmoviĝis.

Kiam ili traveturis proksimume tri kilometrojn, aŭdiĝis sinjoro Kolbabo: "Pardonu al mi la aŭdacon, sinjoro, verŝajne vi veturas al sepulto, ĉu?"

"Ni ne veturas," diris kavsono la malgaja sinjoro. "Kial vi opinias, ke ni veturas al sepulto?"

"Nu," diris sinjoro Kolbabo, "ĉar, sinjoro, vi bonvolas esti tiel malgaja."

"Mi estas tiel malgaja," diris tombvoĉe la sinjoro, "ĉar mia aŭto tiel malrapide kaj tiel malgaje veturas."

"Nu jes," diris sinjoro Kolbabo, "sed kial tia bela Bugatti tiel marapide kaj malgaje veturas?"

"Ĉar ĝin stiras malgaja ŝoforo," diris funebre la nigra sinjoro.

"Ha," diris sinjoro Kolbabo, "Bonvolu permesi, via moŝto, kial fakte tiu sinjoro ŝoforo tiel tristas?"

"Ĉar li ne ricevis respondon je la letero, kiun li enpoŝtigis antaŭ unu jaro kaj unu tago," diris la nigra sinjoro. "Sciu, li skribis al sia plej kara, sed ŝi ne respondis al li; li opinias do, ke ŝi ne plu amas lin."

Kiam sinjoro Kolbabo tion aŭdis, li ekvortigis: "Pardonu al mi la aŭdacon, ĉu via sinjoro ŝoforo nomiĝas Francjo?"

"Lia nomo etas Francisko Svoboda," respondis la malgaja sinjoro.

”Kaj la fraŭlino nomiĝas Marinja, ĉu?” demandis plu sinjoro Kolbabo.

Tiam aŭdiĝis la malgaja ŝoforo kaj diris kun lamenta ĝemo: ”Fraŭlino Maria Nováková estas la nomo de tiu malfidelulino, kiu forgesis mian amon.”

”Ha,” ekkriis sinjoro Kolbabo ĝoje, ”kara homo, vi estas do tiu trombono, tiu naivulo, tiu stultulo, tiu konfuzulo, tiu trumpeto, tiu fuŝulo, tiu perpleksulo, tiu kapaĉo, tiu mallertulo, tiu imbecilo, tiu balailo, iu tulipo, tiu inertulo, tiu salato kaj tiu panikulo, tiu pafito, tiu frenezuleto, tiu frapito kaj tiu per sako frapita, tiu pufulo, tiu bulbo, tiu spritmankulo, tiu anemiulo, tiu figuraĉo, tiu sentaŭgulo, tiu fuŝisto, tiu pulpaĉo, tiu dupo, tiu histriano, tiu lantulo, tiu pajaĉo, kiu ĵetis en nian poŝtkeston la letereton sen poŝtmarko kaj sen adreso? Ajaj, mi ĝojas, ke mi havas la honoron ekkoni vin! Kiel fraŭlino Marieta povus reskribi al vi, se ĝis nun ŝi ne ricevis vian leteron?”

”Kie, kie estas mia letero?” ekvokis sinjoro ŝoforo Franĉjo.

”Nu, diris sinjoro Kolbabo, ”kiam vi diros al mi, kie fraŭlino Marieta loĝas, tiam la letero, sciu, estos rekte survoje al ŝi. Mia anĝelo, jam unu jaron kaj unu tagon mi portas la leteron en teko kaj serĉas en la tuta mondo la veran fraŭlinon Marinja! Ora junulo, nun rapide kaj prete senprokraste kaj galope donu al mi la adreson

de Fraŭlino Marinja kaj mi iros kaj enmanigos al ŝi la leteron.”

”Neniam, sinjoro poŝtiso, vi iros,” diris la sinjoro,” sed mi veturigis vin tien. Francjo, nun aldonu gason kaj oni veturas al fraŭlino Marinja.”

Apenaŭ li findiris tion, sinjoro ŝoforo Francisko aldonis gason, la veturilo ekskuis kaj nun, karaj homoj, ĝi veturigis po sesdek, sepdek, okdek kilometroj, po cent, cent dek, cent dudek, cent kvindek, senĉese pli rapide, ke la motoro kantis, jubilis kaj tondregis pro nura ĝojo kaj la nigra sinjoro devis ambaŭmane teni la ĉapelon, por ke ĝi ne forflugu de li kaj sinjoro Kolbabo per ambaŭ manoj tenis sin je la sidilo kaj sinjoro Francjo kriis: ”Sinjoro ĉefo, tiu ja veturas, ĉu? Cent okdek kilometroj! Ajaj, ja ni eĉ ne veturas, ni flugas direkte en la aero, jen vidu sinjorĉefo, kie ni postlasis la ŝoseon! Sinjorĉefo, ni ricevis ja flugilojn!”

Kaj dum ili iom da tempo flugis per rapido de cent okdek sep kilometroj, montriĝis bele blanka vilaĝo — ververe, ĝi estis jam Libžatov — kaj sinjoro ŝoforo Francjo diris: ”Sinjoro ĉefo, ni estas surloke.”

”Haltu,” diris la nigra sinjoro, kaj la aŭto alteriĝis ĉe rando de la vilaĝo. ”Kiel tiu Bugatti-aŭto bone veturas, ĉu?” kontentis la sinjoro, ”Kaj nun, sinjoro Kolbabo, vi povus enmanigi al fraŭlino Marinja la leteron.”

”Eble,” opiniis sinjoro Kolbabo, ”eble sinjoro Francjo

prefere diru al ŝi parole, kio estas skribite en la letereto. Tie nome estas ok ortografiaj eraroj.”

”Kia ideo,” defendis sin sinjoro Franĉjo, ”mi hontas aperi antaŭ ŝiaj okuloj, ĉar dum tiom da tempo ŝi ricevis de mi neniun letereton. Kaj poste,” li aldiris afliktite, ”eble jam ŝi forgesis min kaj eĉ ne iomete min plu amas. Vidu, sinjoro Kolbabo, ŝi loĝas tie en tiu dometo, kiu havas la fenestretojn purakve purajn.”

”Mi iras do,” diris sinjoro Kolbabo kaj ektrumpetis bele buŝe ”Iras, iras, poŝtista sinjoret’, iras, iras poŝta sinjoro”, kaj ekpaŝis per la dekstra kruro al la dometo. Kaj tie post la pura fenestro sidis pala knabinjo kaj kudris al si vestaĵon.

”Dio sanon donu, fraŭlino Marinja,” ekvokis sinjoro Kolbabo. ”Ĉu vi kudras edziĝveston al vi?”

”Tute ne,” diris malĝoje fraŭlino Marinja, ”mi kudras al mi mortkitelon por ĉerketo.”

”Oh, oh,” diris komplete sinjoro Kolbabo, ”aj, ajja, ha, ha, projesueto, ĉu eble estas tiel malbone? Ĉu vi, fraŭlino, malsanas?”

”Mi ne malsanas,” ekĝemis fraŭlino Marinja, ”sed mia koro krevas pro aflikto.” Kaj ŝi metis la manon sur la koron.

”Pro diamo,” ekkriis sinjoro Kolbabo, ”fraŭlino Marinja, prokrastu ankoraŭ la krevon. Pardonu al mi la aŭdaccon, kial ja doloras vin la koro?”

”Ĉar jam unu jaron kaj unu tagon,” diris mallaŭte fraŭlino Maria, ”jam unu jaron kaj unu tagon mi atendas leteron, kiu ne venas.”

”Tio ne gravu por vi,” konsolis ŝin sinjoro Kolbabo. ”Kaj mi portas jam unu jaron kaj unu tagon ĉi tie en la teko iun letereton, kaj estas neniuj, al kiu mi ĝin transdonas. Sciu, fraŭlino Marinja, la letereton mi donos al vi.” Samtempe li donis al ŝi la leteron.

Fraŭlino Marinja paliĝis ankoraŭ pli. ”Sinjoro leterportisto,” ŝi diris mallaŭtvoĉe, ”tiu letero ne estas por mi, sur ĝi ja ne estas adreso!”

”Nur rigardu internen,” ordonis sinjoro Kolbabo, ”kaj se ĝi ne estos por vi, redonu ĝin al mi kaj prete.”

Fraŭlino Marinja malfermis per tremantaj fingroj la leteron kaj kiam ŝi komencis legi, ŝiaj vangoj ruĝiĝis.

”Nu,” demandis sinjoro Kolbabo, ”ĉu vi redonos al mi la leteron aŭ ne?”

”Mi ne redonos,” elspiris fraŭlino Maria kaj ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj pro ĝojo. ”Sinjoro poŝtisto, ĝi estas ja tiu letereto, kiun mi atendis unu jaron kaj unu tagon! Sinjoro leterportisto, tute mi eĉ ne scias, kion mi donu al vi por ĝi!”

”Mi diros tion al vi,” diris sinjoro Kolbabo. ”Vi donos al mi du kronojn pune tial, ĉar la letero ne estis konvene afrankita, ĉu vi komprenas? Prodisinjoro, nur tial ja mi kuras kun letereto unu jaron kaj unu tagon, por ke la

poŝto ricevu la du kronojn por afranko! Mi dankas bele,” li diris, ricevinte la du kronojn, ”kaj vian respondon, fraŭlino, ĉi tie iu atendas.” Kaj dume li mansignis al sinjoro ŝoforo Francjo, kiu jam staris post la angulo.

Kaj dum sinjoro Francjo estis ricevanta la respondon, eksidis sinjoro Kolbabo kun la nigra sinjoro kaj diris al li: ”Unu jaron kaj unu tagon, moŝto, mi kuris kun la letereto, sed ĝi valoris la penon: jam tial, kion ĉion mi vidis. Ĝi estas tiel bela kaj belega lando, ĉu apud Plzeň ĉu apud Hořice aŭ apud Tábor. — Jen, vidu, sinjoro Francjo jam revenas. Nu jes, tia afero estas aranĝebla pli rapide parole ol per senadresa letero.”

Sinjoro Francjo diris nenion, nur liaj okuloj brilis. ”Ĉu ni veturu, sinjoro ĉefo?” li demandis.

”Ni veturu,” diris la sinjoro. ”Unue ni alveturigis sinjoron Kolbabon al la poŝto.”

Sinjoro ŝoforo saltis en la veturilon, premis la startilon kaj pedalis kluĉon kaj gason kaj la aŭto ekveturis tiel glate kaj leĝere kiel en songo. Tuj montrilo sur rapidometro indikis cent dudek kilometrojn.

”Kiel bele la aŭto veturas,” ĝuis la nigra sinjoro, ”tial ĝi tiel veturegas, ĉar ĝin stiras feliĉa ŝoforo,”

Kaj ĉiuj feliĉe alveturis, kaj ankaŭ ni.

Granda doktora fabelo

Pasis jam ege multe da tempo, kiam sur la monto Hejšovina praktikis la sorĉistan metion la magiisto Magiaŝo. Kiel vi scias, estas magiistoj bonaj, kiujn oni nomas sorĉistoj aŭ miraklofarantoj, kaj magiistoj mavaj, kiujn oni nomas nigrosorĉistoj. Magiaŝo staris meze; iam li estis tiel bona, ke tute li ne sorĉis, kaj alifoje li sorĉis tiel potence, ke tondris kaj fulmis; iam li venis al la ideo, ke pluvu ŝtonoj, kaj foje eĉ li faris, ke torentpluvis malgrandaj ranetoj. Koncize, diru kion ajn, tia magiisto estas neniel agrabla najbareco, kaj eĉ se la homoj ĵuris per sia animo, ke ili ne kredas je magiistoj, tamen la monton Hejšovina prefere ili evitadis; ili nur elturniĝadis dirante, ke ĝi estas tro kruta — kompreneble ili ne konfesus timon pro Magiaŝo!

Tiu Magiaŝo foje sidis antaŭ sia kaverno kaj manĝis prunojn, tiajn grandajn blunigrajn kaj bele prujnkovritajn prunojn, dum en la kaverno lia helpanto, lentuga Vincek, vernome Vincenzo Nyklíček el Zlíčko, kirlis super fajro magiajn dokoktojn el peĉo, sulfuro, valeriano, mandragoro, bistorto, centaŭreo, ononiso kaj asafetido, el aksoŝmiraĵo kaj lapiso kaj akvoforto kaj kaproglobe-

toj, el vespopikiloj, ratobarboj, falenkruretoj kaj zanzi-bara semo, nu el tiaj sorĉaj spicoj, ingrediencoj, teriakoj kaj misdrogoj. Kaj Magiaŝo nur rigardis, kiel tion la lentuga Vincek kirlas kaj manĝis prunojn. Sed la povra Vincek forgesis kirli, kiu scias kial, kurte: dekoktaĵoj en la kaldrono misbruniĝis, bruldifektiĝis, misbakiĝis, misfandiĝis aŭ iel fumiĝis kaj el ili elpuŝiĝis terura fetoro.

”Ci misa mallertulo,” volis lin alkrii Magiaŝo, sed en la hasto eble li eraris la ĝustan tubeton en la gorĝo, aŭ eraris la pruno, kiun li havis en la buŝo, mallonge, li englutis la prunon ankaŭ kun la kerno kaj la kerno mise engorĝiĝis kaj rektiĝis en la gorĝo kaj povis nek internen nek eksteren; kaj tial Magiaŝo povis nur ekkriegi ”Ci mi-” kaj plu ne eblis, li povis eligi el si eĉ ne voĉeton. Nur li stertoris kaj siblis, same kiam vaporo ŝuŝas en poto, kaj ruĝiĝis en la vizaĝo kaj svingis la manojn kaj sufoktusis, sed la kerno ne kaj ne ekmovi sin; tiel firme kaj funde ĝi transversiiĝis en la faringo.

Kiam Vincek tion ekvidis, ege li ektimis, ke eble la mastro Magiaŝo sufokiĝos, kaj diris kunsenteme: ”Sinjorĉefo, atendu ĉi tie, mi kuregas al Hronov por doktoro.” Kaj jam li hastis de Hejšovina malsupren — domaĝe, ke tie neniu estis, por mezuri lian rapidecon; certe ĝi estus mondrekordo en longdistanca kuro.

Kiam li alkuris al Hronov al la doktoro, apenaŭ li povis spirkapti; sed fine tamen nur ĝuste li ekkaptis ĝin kaj

rapide elŝutis el si: "Sinjoro doktoro, venu tuj kaj rapide al sinjoro sorĉisto Magiaŝo, aŭ li sufokiĝos. Uf, uf, tiel mi kurlaciĝis!"

"Al Magiaŝo sur Hejšovina?" murmuretis la doktoro el Hronov. "Hu, maleme mi volas, sed kiam nepre li bezonas min, kion fari." Kaj li iris. Sciu, doktoro al neniu povas rifuzi sian helpon, eĉ se oni venigus lin al rabisto Lotrando aŭ (disinjoro ne punu nin) al Lucifero mem. Ja tia profesio ĝi estas, la doktorado.

Kaj la doktoro el Hronov kunpremis la doktoran valizon, en kiu estas doktoraj skalpeloj kaj tenajlo por dentoj kaj bandaĝoj kaj pulvoroj kaj unĝentoj kaj lignoplaketoj pro frakturoj kaj aliaj doktoraj instrumentoj, kaj iris post Vincek al Hejšovina. "Nur ni ne venu malfrue," zorgis senĉese la lentuga Vincek kaj tial ili iris unu du unu du trans montojn kaj arbarojn, unu du unu du trans marĉojn, unu du unu du trans monteton kaj plataĵon, ĝis la lentuga Vincek diris: "Nun, sinjoro doktoro, jam ni estas surloke."

"Via servutulo, sinjoro Magiaŝo," diris la doktoro el Hronov, "kio kaj kie vin doloras?"

La sorĉisto Magiaŝo anstataŭ respondo nur ekstetoris, eksiblis kaj eksnufis kaj montris al la kolo, ke tie ĝi estas.

"Ho, la koleto doloras," diris la doktoro el Hronov.

”Nu, ni rigardos la doloraĵon. Apertu bele la buŝon, sinjoro Magiaŝo, kaj diru aaa.”

La sorĉisto Magiaŝo disfaldis la nigran barbon kaj plenlarĝe malfermis la buŝon, sed aaa li ne povis diri, ĉar el li eliĝis neniu voĉo.

”Nu, aaa,” instigis lin la doktoro. ”Ĉu ĝi ne eblas?”

Magiaŝo kapneis, ke ĝi ne eblas.

”Ajajaj,” diris la doktoro, kiu estis fripono, vulpo malicplena, vulpo ruzega, sakristiano rutina, merlo sagaca kaj ulo malnaiva, ĉar li havis kaŝintencojn, ”ajaj, sinjoro Magiaŝo, vi statas ege malbone, se vi ne povas diri aaa. Mi ne scias, mi ne scias,” li diris kaj komencis Magiaŝon observi kaj perkuti, ekzameni la pulson, lian langon li rigardis, sub liajn palpebrojn li ekrigardis, en la orelojn kaj la nazon per speguleto li prilumis kaj dume murmuris latinajn vortojn. Kaj kiam li estis preta kun la tuta diagnozo, li komencis mieni ege serioze kaj diris: ”Sinjoro Magiaŝo, estas grava afero, ĉi tie helpos nenio krom senprokrasta kaj plej rapida operacio. Sed tiun mi ne povas kaj rajtas mem fari, por tio devus havi asistadon. Se vi volas subiĝi al operacio, nenio helpos, vi devos venigi miajn kolegojn doktorojn el Úpice, Kostelec kaj Hoříčky, kaj kiam ili estos ĉi tie, mi aranĝos kun ili kuracistan konsulton aŭ konsilon kaj nur post la plej funda konsidero ni entreprenus la deziratan kuracistan intervenon aŭ operacion operacian. Pripensu tion, sinjoro Magiaŝo,

kaj se vi akceptos mian proponon, sendu rapidan kurieron por miaj altŝatataj kaj doktaj sinjoroj kolegoj.”

Kion Magiaŝo povis fari? Li kapsignis al la lentuga Vincek kaj Vincek trifoje ektrampis, por bone kuri, kaj jam li galopis de Hejšovina malsupren. Nome al Hoříčky. Kaj al Úpice. Kaj al Kostelec. Ni lasu lin intertempe kuri.

PRI LA SOLIMANA PRINCIDINO

Dum la lentuga Vincek trotegis al Hoříčky kaj al Úpice kaj al Kostelec por doktoroj, la doktoro el Hronov sidis ĉe sorĉisto Magiaŝo kaj atentis, ke tiu ne sufokiĝu. Kaj por ke la atendado pasu al ili pli bone, li ekbruligis virginian cigareton kaj senvorte fumetis.

Kaj kiam estis enuege al li, li tusetis kaj fumegis plu. Poste por mallongigi la enuon, trifoje li oscedis kaj ekpalpebrumis. Post tempeto li ekvortis: "Jes ja." Proksimume post duonhoro li streĉiĝis kaj diris: "Nu, nu." Post horeto li aldiris: "Eble dume ni povus kartludi. Sinjoro Magiaŝo, ĉu vi havas iajn kartojn?"

La sorĉisto Magiaŝo ne povis paroli, kaj tial nur li kapjesis, ke ne.

"Ĉu vi ne havas?" grumblis la doktoro el Hronov. "Domaĝe. Nu vi estas sorĉisto, se eĉ la kartojn vi ne havas! Ĉe ni en la gastejo iu sorĉisto okazigis prezentadon, atendu, kiel li nur nomiĝis, simile kiel Navrátil aŭ Don Bosko aŭ Margolello, preskaŭ tiel, kaj tiu sciis fari tiajn

sorĉaĵojn per la kartoj, ke vi okulegus. Nu, oni devas scii sorĉi.”

Poste li ekbruligis al si novan virginian kaj diris: ”Se vi ne havas ĉi tie kartojn, mi rakontos al vi fabelon pri la solimana principino, por ke la tempo pli bone pasu al ni. Se la fabelon hazarde vi konas, nur diru kaj tuj mi ĉesos. Tin tin tin, oni komencas.

Kiel estas konate, post la Monedaj Montoj kaj la Sargasmaro estas la Dalamanaj Insuloj kaj post ili estas la dezerto Ŝarivari, kovrita de densa arbaro, kun cigana ĉefurbo Eldorado; poste larĝe-vaste etendiĝas unu meridiano kaj unu paralelo kaj tie trans rivero, kiun oni transiras tra ponteto kaj poste tra la pado maldekstren, post salik-arbusto kaj lapol-fosaĵo etendiĝas la granda kaj potenca Solimana Sultanlando. Do, bone komprenite, ĉu?

En la Solimana Sultanlando kiel jam la nomo montras, regis sultano Solimano. Tiu sultano havis unusolan filinon, Zubejda estis ŝia nomo; kaj la principino nenial komencis malsani kaj malsaneti kaj tusetadis, ŝi konsumiĝis kaj estis pereanta kaj magriĝanta kaj paliĝanta, ŝi afliktiĝis kaj ĝemis, ke estis dolore tion rigardi. Memkomprene, la sultano tuj venigis al ŝi siajn kortegajn sorĉistojn, desorĉistojn, magiistojn, herbodrogistinojn, aŭguristinojn, magojn kaj astrologojn, ĉarlatanojn kaj teriakistojn, banistojn kaj vundflegistojn kaj kuracadis-

tojn, sed neniuj el ili povis resanigi la principidinon. Se tio estus ĉe ni, mi dirus, ke la bubino suferis pro anemio, pleŭrito kaj bronkito; sed en la Solimana lando ne estas tia klereco kaj la medicino ne progresis tiom, por ke tie povu aperadi malsanoj kun la latinaj terminoj. Vi povas imagi, kiel la maljuna sultano estis malespera. Mia Monte Kristo, li diradis, tiel mi ĝojis, ke la bubino transprenos post mi florantan sultanon metion, kaj dume, la povrulo, estingiĝas kaj pereas antaŭ miaj okuloj kaj mi ne povas helpi ŝin! — Kaj tial ekregis ĉe la kortego kaj en la tuta Solimana lando granda tristo.

Tiutempe venis tien iu komerca agento el Jablonec, iu sinjoro Lustig, kaj aŭdinte pri la malsana principidino, li diris: 'Sinjoro sultano devus venigi doktoron de ni, nome el Eŭropo, ĉar la medicino ĉe ni estas pli progresinta; ĉi tie vi havas nur desorĉistojn, herbodrogistojn kaj magiistojn, sed, karulo, ĉe ni estas veraj kaj studentaj doktoroj.'

Eksciinte tion, sultano Solimano venigis al si tiun sinjoron Lustig, aĉetis de li ŝnuron kun vitraj perloj por la principidino Zubejda kaj poste demandis lin: 'Sinjoro Lustig, laŭ kio oni ekkonas ĉe vi efektivan kaj studentan doktoron?'

'Tre facile,' diris sinjoro Lustig. 'Oni ekkonas lin laŭ tio, ke li havas antaŭ sia nomo Dr. Ekzemple Dr. Mann,

Dr. Pelnáfi kaj simile. Kaj se li havas neniun Dr., li ne estas do studinta doktoro, komprenite?’

’Ha,’ diris la sultano kaj riĉe pridonacis sinjoron Lustig per rosinoj; sciu, tio estas bonaj sekvinberoj. Kaj poste li sendis al Eŭropo senditaron por venigi doktoron. ’Sed tion memoru,’ li predikis al ili, adiaŭante ilin, ’ke vera kaj instruita doktoro estas nur tiu, kies nomo komenciĝas per silabo Dr. Alian ne konduku al mi, alie mi fortranĉos viajn orelojn eĉ kun la kapo. Do ek!’

Se mi devus rakonti, kion ĉion la senditoj devis trasuferi kaj travivi dum la longega vojo al Eŭropo, tio estus, sinjoro Magiaŝo, ege longa fabelo. Sed post multaj kaj multaj suferoj tamen nur la senditoj atingis Eŭropon kaj komencis serĉi doktoron por principino Zubejda.

Do la procesio de la solimanaj senditoj, tiaj egstaturaj mamlukoj kun turbanoj surkape kaj subnaze kun lipharegoj dikaj kaj longaj kiel ĉevalvostoj, ekiris tra la nigra arbaro. Ili iris kaj iris, ĝis ili renkontis ulon kun hakilo kaj segilo surŝultre.

’Dio sanon,’ salutis ilin tiu ulo.

’Dio donu’ diris la senditoj. ’Kio, oĉjo, vi estas?’

’Nu,’ diris tiu homo. ’Dankon por la demando. Mi estas nur dracenhakisto.’

La paganoj pintigis la orelojn kaj diris: ’Moŝto, jen io alia. Se vi bonvolas esti Dr Acenhakisto, ni devas do peti vin, ke vi tujtuje, kure kaj preste iru kun ni en la Solima-

nan landon. Sinjoro sultano Solimano sendas al vi belan saluton kaj respekte vin invitas al sia kortego; sed se vi malemus aŭ eventuale kontraŭus, tiam ni transportos vin tien perforte, kaj tial ni diras al vi, via moŝto, ne incitu nin.'

'Aj, aj,' miris la dracenhakisto, 'kaj kion sinjoro sultano volas kun mi?'

'Li havos por vi laboron,' diris la senditoj.

'Mi irus do,' konsentis la dracenhakisto. 'Nome, sinjoroj, ĝuste mi ĉesas laboron. Sciu, mi emas labori kiel drako.'

La senditoj okulsignis inter si kaj diris: 'Tio, moŝtulo, ĝuste konvenas al ni.'

'Atendu,' diris la dracenhakisto. 'Unue mi volus scii, kiom pagos al mi sinjoro sultano por mia laboro. Mi ne estas ja drinkulo, sed eble sinjoro sultano ne estas draŝtulo.'

La senditoj de la solimana sultano ĝentile rediris: 'Ne gravas, moŝto, ke vi ne bonvolas esti Dr Inkulo — al ni Dr Acenhakisto estas same bonvena; sed kio koncernas nian sinjoron sultanon Solimanon, vi povas kredi al ni, ke li ne estas Dr Astulo, sed nur ordinara reganto kaj tirano.'

'Do, bone,' diris la dracenhakisto. 'Kaj kio koncernas la manĝadon, do dum la laboro mi manĝas kiel draŝisto kaj trinkas kiel dromedaro, ĉu vi scias?'

'Ĉion ni faros, nobla sinjoro,' certigis la solimanoj, 'por ke ankaŭ tiurilate vi estu ĉe ni tute kontenta.'

Poste ili alkondukis kun granda pompo kaj estimo la dracenhakiston sur ŝipon kaj navigis kun li en la Solimanan landon. Post la alnavigo sultano Solimano rapide eksidis sur la trono kaj ordonis alkonduki ilin. La senditoj ekgenuis antaŭ li kaj la plej aĝa kaj la plej liphara el ili komencis:

'Nia plej favora sinjoro kaj reganto, princo de ĉiuj kredantoj, sinjoro sultano Solimano! Laŭ via nobla ordono ni foriris ĝis insulo nomata Eŭropo, por elserĉi la plej doktan, la plej reputacian kaj la plej faman doktoron por principino Zubejda. Ni havas lin do ĉi tie, sinjoro sultano. Li estas renoma kaj tutmonde konata kuracisto Dr Acenhakisto; por ke vi sciu, kia doktoro li estas, li emas labori kiel Dr Ako, estas pagata kiel Dr Inkulo, manĝas kiel Dr Aŝisto kaj drinkas kiel Dr Omedaro. Nome sinjoro sultano, ili estas nurnure gloraj kaj doktaj doktoroj, el kio evidentas, ke ni trafis tiun efektivan. Hm, hm. Jen entute ĉio.'

'Mi bonvenigas vin sinjoro Dr Akcenhakisto,' diris la sultano Solimano. 'Mi petas vin, ke vi iru rigardi mian filinon, principinon Zubejda.'

'Nu, kial mi ne iru,' diris al si la dracenhakisto; la sultano mem kondukis lin en malhelan, ombroplenan salonon, garnitan per la plej belaj tapiŝoj kaj kusenoj kaj ku-

senetoj, kaj sur ili ripozis principino Zubejda, pala kiel el vakso kaj dormetis.

'Aj, aj,' diris la dracenhakisto komplate, 'sinjoro sultano, tiu via bubino estas ia verdetulino.'

'Jes, jes,' ekĝemis la sultano.

'Ia duonviva,' diris la dracenhakisto, 'iomete kvazaŭ molaĉa, ĉu?'

'Ĝuste tiel,' jesis la sultano malĝoje. 'Nenion ŝi volas manĝi.'

'Magra kiel ŝindo,' diris la dracenhakisto, 'Kiel pajlo-fasketo. Kaj nenian koloron ŝi havas, sinjoro sultano. Mi dirus, ke la knabino malsanas.'

'Vere, ŝi malsanas,' diris la sultano deprimate, 'Tial mi venigis vin, por ke vi resanigu ŝin, se vi estas Dr Acenhakisto.'

'Mi?' ekmiris la dracenhakisto. 'Dio mia, kiel mi resanigu ŝin?'

'Via afero,' diris sultano Solimano obtuzvoĉe. 'Tial vi estas ĉi tie kaj finite. Kaj mi diras al vi, se vi ne resanigos ŝin, mi igos vin senkapigi kaj tio estos via amen.'

'Sed tio ne eblas,' volis sin defendi la timigita dracenhakisto, sed sinjoro Solimano ne lasis lin finparoli.

'Neniel elturniĝu,' li diris severe, 'por tio mi ne havas tempon, mi devas iri regi. Nur eklaboru kaj montru, kion vi scias.' Kaj li iris sidiĝi sur la tronon kaj regis.

Damna afero, diris al si la dracenhakisto, kiam li soli-

ĝis, mi troviĝas en bela kaĉo! Kiel mi venas al tio, ke mi resanigu iun princidinon? Ĉu mi scias, kiel oni tion faras? Kia pridonaco! Kvin batoj al arbostumpo, kion mi faru? Se la bubinon mi ne resanigos, oni min senkapigos. Se tio ne estus en fabelo, mi dirus, ke ne eblas pro nenio forhaki ies kapaĉon! Diablo ŝuldis al mi, ke mi troviĝas en la fabelo! En la ordinara vivo io simila ne povus okazi al mi! Per mia animo, mi mem scivolos, kiel mi eskapos el tio!

En tiaj kaj ankoraŭ pli turmentaj pensoj la povrulo dracenhakisto eksidis sur la perono de la sultana kastelo kaj ĝemis. Hu, li diris al si mem, kiel ili venis al la ideo, ke mi faru ĉi tie doktoron? Se oni ordonus al mi, faligi ĉi tiun aŭ alian arbon, mi montrus al ili, kion mi scias! Mi ekus tion, ligneroj nur ŝutiĝus! Sed kiel mi rigardas, ĉio ĉirkaŭ la konstruaĵo estas arboplena kiel en arbarego, eĉ ne la suno povas brili en ilian ĉambron; en la domo ja devas konserviĝi humido kaj fungusaĵo kaj ŝimo kaj forfikuloj! Momenton, mi montros al ili, kian laboron mi scias fari!

Dirinte tion, tuj li malvestis la jakon, kraĉis sur siajn polmojn, ekprenis siajn hakilon kaj segilon kaj komencis faligi arbojn, kreskantaj ĉirkaŭ la sultana kastelo. Pa, tio estis nek pirarboj nek pomarboj nek nuksarboj kiel ĉe ni, sed nuraj palmoj kaj oleandroj kaj kokosarboj, dracenoj, latanioj kaj figoarboj kaj mahagonoj kaj arboj

ĉielen kreskantaj, kaj alia ekzota verdaĵo. Vi rigardus, sinjoro Magiaŝo, kiel tiu nia dracenhakisto eklaboris! Kiam oni sonorigis tagmezon, jam estis ĉirkaŭ la kastelo konsiderinda senarbejo; tiam la dracenhakisto viŝis la ŝviton per maniko, elpoŝigis pecon da nigra pano kun kazeo, kiun alportis de la hejmo, kaj ekmanĝis.

Ĝis tiu tempo principidino Zubejda dormis en sia mankluma salono; dum la bruego, kiun faris la dracenhakisto sube antaŭ la kastelo per siaj hakilo kaj segilo, ŝi dormis, kiel neniam ĝis nun. Ŝi vekigis nur pro la silento, kiam la dracenhakisto ĉesis faligi la arbojn kaj ekkomfortis sur amaso da ligno kaj mordis la panon kun kazeo.

Tiam la principidino malfermis la okulojn ka ekmiris: kia neniam estinta lumo estas en la salono? Unuafoje en la vivo enfalis tien la suno kaj plentorente plenigis la malhelan salonon per ĉiela brilo. La lum-inundo preskaŭ brilblindigis la principidino; samtempe tra la fenestro ekbonodoris la freŝe hakita ligno tiel forte kaj bele, ke la principidino enspiris profunde kaj kun ĝojo. Kaj al tiu peĉ-aromo ekbonodoris tie ankoraŭ io kion la principidino ĝis nun ne konis — kio ĝi estas? Ŝi leviĝis kaj iris rigardi tra la fenestro: anstataŭ la humida ombro, senarbejo ardanta en la tagmeza sunbrilo kaj tie sidas granda oĉjo kaj kun ega apetito manĝas ion nigran kaj ion blankan; kaj tio estis ĝuste tio, kio al la principidino tiel

ekaromis. Vi scias, ĉiam plej alloge bonodoras al ni tio, kion tagmanĝas iu alia.

La principino ne povis tion plu elteni; la bonodoro tiris ŝin suben, antaŭ la kastelon, pli kaj pli proksimen al la tagmanĝanta oĉjo, por rigardi, kion bonan li havas por manĝo.

'Ej, la principino,' aŭdiĝis la dracenhakisto plenbuŝe. 'Ĉu vi volus pecon da pano kun kazeo?'

La principino ruĝiĝis kaj ekskuetis; ŝi hontis diri, ke ege ŝi volus gustumi.

'Jen, prenu,' ekmurmuris la dracenhakisto kaj detranĉis por ŝi per tranĉilego egan pecon da pantranĉaĵo. 'Jen vi havas.'

La principino ekrigardis ĉirkaŭen, ĉu iu rigardas, 'Dankon!' ŝi elvortis por danki, ekmordis la tranĉaĵon kaj diris: 'Hmm, kia bonaĵo!' Mi petas vin, panon kun kazeo, tion la principino dum la vivo neniam vidis.

Tiumomente ekrigardis tra la fenestro sultano Solimano mem. Li eĉ ne kredis la proprajn okulojn: anstataŭ la humida ombro, hela senarbejo ardanta en la tagmeza suno, kaj tie sur la lignoamaso sidas la principino plenbuŝe, havas de la kazeo "lipharojn" de orelo al orelo kaj nutras sin kun tia apetito, kiel ĝis nun neniam.

'Danke dion,' respiris sultano Solimano, 'do tamen oni alkondukis al la bubino tiun ĝustan kaj studentan doktoron!'

Kaj ekde tiu tempo, sinjoro Magiaŝo, la principino komencis vere fortiĝi, ankaŭ ŝiaj vangoj ruĝiĝis kaj ŝi manĝis kiel lupineto. Jen la efiko de lumo kaj de aero kaj de suno, sciu. Kaj mi rakontas tion al vi tial, ĉar ankaŭ vi vivas ĉi tie en kaverno, kien la suno ne brilas kaj vento ne blovas; kaj tio, sinjoro Magiaŝo, ne estas senutila. Tion do mi volis diri al vi.”

Kiam la doktoro el Hronov finrakontis la fabelon pri la solimana principino, alkuregis la lentuga Vincek kondukante kun si doktoron al Hoříčky, doktoron el Úpice kaj doktoron el Kostelec. ”Jen mi kondukas ilin,” li kriis jam de malproksime. ”Hometoj, kiel mi kurlaciĝis!”

”Mi bonvenigas vin, sinjoroj kolegoj,” diris la doktoro el Hronov. ”Jen nia paciento, sinjoro nigrosorĉisto Magiaŝo. Unuavide vi vidas, ke lia stato estas tre peza. La paciento duonmontras, ke li englutis prunon aŭ kernon. Laŭ mia modesta opinio lia malsano estas akuta prunito.”

”Hm, hm,” diris la doktoro el Hoříčky. ”Plivere mi juĝas, ke ĝi estas sufoka prunito.”

”Maleme mi oponus al la ŝatataj kolegoj,” diris la doktoro el Kostelec. ”Sed mi dirus, ke ĉi-kaze temas pri faringa prunito.”

”Sinjoroj,” aŭdiĝis la doktoro el Úpice, ”mi proponas, ke ni akordiĝu je diagnozo, ke ĉe sinjoro Magiaŝo aperis akuta prunfaringa kernito.”

”Mi gratulas al vi, sinjoro Magiaŝo,” diris la doktoro el Hoříčky. ”Ĝi estas ege rara kaj grava malsano.”

”Interesa kazo,” aldonis la doktoro el Úpice.

”Sinjoro kolego,” aŭdiĝis la doktro el Kostelec, ”mi havis jam pli belajn kaj intersajn medicinajn kazojn. Ĉu vi aŭdis jam, kiel mi sanigis Blekulon de la Grakmonto? Se ne, mi rakontos tion al vi.”

LA KAZO KUN BLEKULO

Pasis ankaŭ jam multegaj jaroj, kiam en la arbaro sur la Grakmonto restadis Belkulo. Vi scias, ĝi estas unu el la plej malgrandaj fantomoj, kiuj iam ajn restadis. Oni iras nokte tra arbaro kaj subite post oni io ekblekas, ekhenas, ekĝemas, ekhurlas aŭ tiel terure ekridaĉas. Memkomprene, oni morttimiĝas, angoro kaptas onin , kaj oni kuras, kuregas, mire, ke oni ne elŝutas la animon pro timo. Tion do faras Blekulo kaj tian ekscesadon li faraĉis sur la Grakmonto dum multaj kaj multaj jaroj, tial oni timis iri tien dum la mallumo.

Kaj foje venas al mi en konsultejon ia stranga home-to, nura buŝo, buŝegon li havas de orelo al orelo kaj la kolon bandaĝitan per ia ĉifono, kaj siblas, kraĉsputas, stertoras, kvakas, gruntas, raŭkas, ke eĉ ne vorton oni komprenas al li.

'Kio mankas al vi?' mi demandas.

'Sinjoro doktoro,' siblis tiu ulo, 'bele mi petas, iel mi raŭkiĝis.'

'Tion mi vidas,' mi diris, 'kaj kiu vi estas?'

La paciento hezitis kaj poste ekvortigis: 'Mi petas, mi estas tiu certa Blekulo de Grakmonto.'

'Ha,' mi diris, 'vi estas do tiu friponaĉo, tiu damna ulo, kiu timigas la homojn en al arbaro? Mia kara, tion vi meritas, ke vi perdis la voĉon! Jes, mi kuracos vian faringon kaj faringiton kaj karingokataron, mi volas diri faringokataron, por ke vi povu denove tra la arbaro bleki kaj ŝoke timigi homojn! Ne, ne, nur plu raŭku kaj siblu, almenaŭ oni havos trankvilon de vi!'

Sed tiam Blekulo komencis peti: 'Mi petas vin, sinjoro doktoro, sanigu min el la raŭkado, jam mi bonkondutos, mi ne timigos la homojn —'

'Tion ankaŭ mi konsilas al vi,' mi diris. 'Dum la fantomado vi krikonsumiĝis kaj tial vi perdis la voĉon, ĉu ne? Kara ulo, fantomi en la arbaro, jam nenio por vi; en la arbaro estas malvarme kaj humide kaj vi havas iom sentemajn spirorganojn. Mi ne scias, mi ne scias; eble kataro estus kuracebla, se nepre vi devus ĉesi fantomi kaj transloĝiĝi ien foren el la arbaroj; alie neniu vin sanigos.'

Tiu Blekulo morniĝis kaj gratis sin post la orelo. 'Malfacila afero, via moŝto, sed per kio mi vivtenos min, se mi ĉesos fantomi? Ja nenion alian mi scias ol bleki kaj kriaĉi, nome dum mi havas voĉon.'

'Hometo,' mi diris al li, 'kun tia rara voĉorgano, kian vi havas, mi irus al opero kiel kantisto, kiel bazarulo aŭ

anoncisto al cirko; kun tia belega kaj potenca voĉo estas domaĝe vivi en kamparo, ĉu vi ne samopinias? En urbo vi validiĝus eble pli bone.'

'Ankaŭ iam mi diris tion al mi,' konfesis Blekulo. 'Nu, mi provos ekposteni aliloke, nur kiam mi havos denove la voĉon.'

Sinjoroj, mi elfrotis lian faringaĉon per jodo, preskribis al li kloralon kaj permanganaton por gargarado kaj uzadon de anginolo kaj por la kolo almetadon de kopresoj. Ekde tiu tempo pri Blekulo sur la Grakmonto estis nenio aŭdebla; vere li ekloĝis aliloke kaj ĉesis fantomi. Nur post pluraj jaroj denove mi ekaŭdis pri li, kaj nome el la granda urbo Hurdyburdy. Onidire tie la nomita Blekulo alkroĉiĝis al politiko kaj oratoris en mitingoj tiel fortvoĉe kaj kun tia sukceso, ke li iĝis deputito kaj bone fartas ĝis nun.

Kaj mi rakontas tion al vi tial, por ke sinjoro Magiaŝo vidu, kiel ŝanĝo de aero iam faras miraklojn ĉe diversaj malsanoj."

LA KAZO KUN LA NIKSO EL HAVLOVICE

Ankaŭ mi havis interesan kuracistan kazon,” aŭdiĝis la doktoro el Úpice. Ĉe ni en Úpa post la ponteto de Havlovice en la salikradikaro kaj alnoj vivis maljuna nikso, nomata Joudal; li estis mornulo, malafablulo, ĉa-grenulo kaj grumblulo, iam li kaŭzis inundojn kaj de temp’al tempo dronigis infanojn, kiam ili baniĝis; mal-longe, homoj ne ŝatis lin vidi en tiu rivero.

Foje aŭtune venis al mi en konsultejon maljunulo, havis verdan fraketon kaj sur la kolo ruĝan tukon, kaj ĝemaĉis, tuisis, ternis, snufis, ĝemis, remungis kaj naz-parolis: ‘Sinjoro doĥtoro, mi kaptis ian malvarmumon aŭ kataron; ĉi tie min premas kaj tie pikas, la lumboj doloras, en la artikoj lancinas, mi tusas, mire, ke mi ne ŝiri-ĝas kaj nazkataron mi havas kiel trabon; mi petus do pri ia medicinaĵo.’

Mi diagnozis lin kaj diris: ‘Maljunulo, tio estas reŭmatismo; mi donos al vi ŝmiraĵon, ĝi estas linimento, por ke vi sciu, sed ankoraŭ ne ĉio. Vi devas multe restadi en varmo kaj seko, ĉu vi komprenas?’

'Mi komprenas, ' murmuris la oldulo. 'Sed kun seko kaj varmo verŝajne ne eblus.'

'Kial ne eblus,' mi demandas lin.

'Nu,' diris la oldulo, 'ĉar mi estas la nikso el Havlovice, sinjoro doktoro. Kiel mi povas fari al mi en akvo sekon kaj varmon? Ja, eĉ la nazon mi devas viŝi per la akvosurfaco, en akvo mi dormas kaj per akvo mi kovras min; kaj nur nun en mia aĝo mi metis en mian liton molan akvon anstataŭ la malmola, por ke mi pli mole kuŝu. Sed kun tiu seko kaj varmo estos malfacila afero, jes.'

'Kion fari, avo,' mi diris, 'sed en la malvarma akvo la reŭmatismo eĉ malboniĝos. Sciu, la maljunaj ostoj volas varmon. Kiun aĝon fakte vi havas, sinjoro nikso?'

'Eh,' murmuris la nikso, 'sinjoro doktoro, mi estas ĉi tie ankoraŭ el la paganaj tempoj — do eble mil jarojn kaj eble ankoraŭ multe pli. Jes, kiom da jaroj!'

'Vi vidas do,' mi diris al li, 'en tia aĝo, avo, vi devas restadi apud forno. Atendu, mi havas ideon! Ĉu vi aŭdis iam pri varmaj fontoj?'

'Mi aŭdis, jes, mi aŭdis,' gruntis la maljuna nikso. 'Sed ĉi tie neniuj estas.'

'Ĉi tie ne,' mi diris, 'sed ili estas en Teplice kaj Píšťany kaj ankaŭ aliloke, kaj ili estas profunde en la tero. Kaj la varmaj fontoj, sciu, estas kreitaj ĝuste por la maljunaj kaj reŭmatismaj niksoj. Simple en tia varma fonto vi lok-

sidiĝos kiel nikso varmakva kaj dume vi kuracos vian reŭmatismen.

'Hm, hm,' hezitis la oldulo, 'kaj kian laboron fakte havas tia varmakva nikso?'

'Ne multe,' mi rediris, 'li devas nur konstante tiri la varman akvon el la profundo de la tero, por ke ĝi ne malvarmiĝu. Kaj superabundon de la varma akvo li igas fonto al la supro de la tero. Jen ĉio.'

'Nu, eblus,' murmuris la nikso el Havlovice. 'Mi serĉos do ian tian varman fonton. Multfoje mi dankas, sinjoro doktoro,' kaj li lamis el la konsultejo — nur flaketo sur la planko restis post li.

Kaj vidu, sinjoro kolego, la nikso el Havlovice estis prudenta kaj obeis; li loksidiĝis en Slovakio en varma fonto kaj eligas el la profundoj de la tero tiom da varmega akvo, ke sur tiu loko nun estas eterna varma fonteto. Kaj en tiu varmega fonto baniĝas homoj kaj ankaŭ al ili ĝi bone efikas je la reŭmatismo; tien oni veturas el la tuta mondo por kuraci sin. Sekvu la ekzemplon, sinjoro Magiaŝo, kaj obeu ĉion, kion ni, doktoroj, konsilos al vi."

LA KAZO KUN NAJADOJ

Ankaŭ mi havis strangan kazon,” ekparolis la doktoro el Hořičky. Foje nokte mi dormas kiel urso, kiam iu frapas sur fenestron kaj vokas: 'Doktoro! Doktoro!'

Mi malfermis la fenestron kaj diris: 'Nu, kio estas? Ĉu iu bezonas min?'

'Jes,' parolis el la mallumo angora kaj dolĉa voĉo. 'Venu! Venu kaj helpu!'

'Kiu estas tie,' mi demendas. 'Kiu vokas min?'

'Mi, voĉo de la nokto. Venu!'

'Jam mi iras,' mi diris kvazaŭ ensonĝe kaj rapide min vestis. Kiam mi eliris antaŭ la domon, estis tie neniu.

Al mi, sinjoroj, estis preskaŭ angore, 'Allo,' mi vokis duonlaŭte, 'ĉu estas iu ĉi tie? Kien mi iru?'

'Post min, post min,' plorsingultis delikata kaj nevidebla voĉo; kaj mi iris tiuflanken, de kie vokis tiu voĉo, trans ŝtonojn kaj kavojn, trans rositajn herbejojn kaj nigran arbaron; la luno lumis kaj la tuta mondo tremis de la frosta beleco. Sinjoroj, mi konas tiun regionon kiel la

propran manplaton; sed en ĉi tiu luna nokto ĝi ŝajnis esti tiel nereala kiel songo. Iam okazas, ke ni trovas alian mondon en regiono al ni plej proksima.

Kiam jam longe mi iris post la voĉon, mi diris al mi, kreu-nekreu, ke tio povus esti la valo Ratibořice, 'Ĉi tien, doktoro, ĉi tien,' vokis min la voĉo — ĝi sonis kva-zaŭ sur rivero ekbrilus kaj ekplaŭdetus ondo, kaj mi starris apud la bordo de la rivero Úpa sur arĝenta senarbarejo en la lunbrilo. Meze de la herbokovrejo io helis; eble ĝi estas korpo, eble nur nebulo, eble mi aŭdas mallaŭtan ploron, eble nur akvosusuron.

'Nunu,' mi diris kvietige, 'kiu oni estas kaj kio onin doloras?'

'Ah, doktoro,' aŭdiĝis per tremanta voĉeto tio hela sur la tero, 'mi estas nur feino, nur najado sovaĝulino. Miaj fratinoj dancis, mi dancis kun ili, kaj poste, mi ne scias, eble mi stumblis je la lunradio, eble mi ekglitis sur la brilo, kiu vibras sur rosguteto, mi ne scias, kio okazis kun mi; subite mi kuŝas kaj ne povas leviĝi kaj la krureto doloras, doloras, doloras —'

'Nu, fraŭlino,' mi diris, 'verŝajne ĝi estos frakturo alie ostrompo. Tio estas reordigebla. Vi estas do unu el tiuj najadoj, kiuj dancas ĉi tie en la valo? Jen, jen! Kaj kiam venas inter vin junulo el Černov aŭ Slatina, vi mortdancigas lin, ĉu? Hm, hm. Ĉu vi scias, knabinjo, ke tio estas

misfaro? Ĉi-foje tiu via rondodanco kostis vin multon, ĉu? Jen, tion vi havas el tiuj viaj dancamuzoj!

'Aĥ, doktoro,' ekveis tio hela sur la herbokovrejo, 'se vi scius, kiel la krureto min doloras!'

'Memkomprene, ĝi doloras,' mi diris, 'frakturo devas dolori.' Kaj mi ekgenuis apud la najado por flegi ŝian frakturon.

Sinjoroj kolegoj, mi riparis jam centojn kaj centojn da ostrompoj, sed kun la najadoj estas peza laboro. Ŝi havas la korpon nur el radioj kaj la ostojn ŝi havas el tiel nomataj duraj radioj — en la manojn oni ne povas ŝin preni, maldensa ŝi estas kiel zefiro, kiel lumo, kiel nebulo, kaj nun rektigu ŝin iel, firmligu kaj bandaĝu! Mi diris al vi, tio estis ege misa filigranado. Mi provis bandaĝi ŝin per araneaĵo, sed la najado ĝemis: 'Ve, ĝi tranĉdoloras kiel ŝnuroj!' Mi volis firmigi la rompitan krureton per petalo de pomfloro, kaj ŝi ekploris, aĥ, ĝi premdoloras kiel ŝtono!

Jes, kion fari? Fine do mi deigis nur la brilon, nur la metalan brilon, kiu estas sur flugiloj de libelo, kaj faris el ĝi du tabuletojn; la lunradion mi dividis en rosgute-to je sep irizkoloroj kaj per la plej maldika blua radio mi alligis la tabuletojn al la rompita krureto de la najado. Ĝi estis tia laborego, ke mi eĉ ŝvitis — ŝajnis al mi, ke la plenlumo brulradias kiel aŭgusta suno; kaj kiam mi estis preta, mi eksidis apud la najado kaj diris:

'Nu, fraŭlino, nun trankvilon kaj la krureton vi ne rajtas movi, ĝis ĝi kunkreskos. Sed aŭdu, karulino, mi miras al vi kaj viaj fraŭlinoj fratinoj, ke vi estas ankoraŭ ĉi tie. Ĉiuj feinoj kaj najadoj ja, iom kie ili estas, jam delonge trovis al si pli bonan postenon —'

'Kie?' elspiris la najado.

'Nu en Ameriko. En Holivudo,' mi diris. 'Tie, kie oni faras la filmojn, ĉu vi scias? Ili ludas kaj dancas por filmo kaj ricevas por tio tiom da mono kiom da grenŝeloj kaj la tuta mondo ilin rigardas — nu, tio estas ega gloro, fraŭlino. Ĉiuj najadoj kaj feinoj jam delonge disponigis sin al filmo, kaj ĉiuj feoj kaj virnajadoj ankaŭ same. Se vi vidus la tualetojn kaj juvelojn de tiuj feinoj — pa, ili ne survestus tian simplan robon, kian vi havas!'

'Ho,' defendis sin la najado. 'Ĉi tiu vestaĵo estas tekstita el lumbrilo de lampiroj!'

'Nu, ĝuste,' mi diris. 'Tion oni ne plu portas kaj la fasono estas tute alia.'

'Ĉu kun trenaĵo?' demandis la najado sopire.

'Tion mi ne povas diri al vi,' mi diris, 'tion mi ne komprenas. Almenaŭ vi estu irontaj tien, en Holivudon. Oni veturas tien trans Hamburgon aŭ Havron. Sed mi iru jam, post tempeto tagiĝos; laŭ mia scio, vi najadoj, rajtas aperadi nur dum la mallumo, ĉu? Do, adiaŭ, fraŭlino, kaj pri la filmo ankoraŭ meditu.'

Neniam plu mi vidis la najadon; verŝajne ŝia rompi-

ta tibia osteto bone resaniĝis. Kaj kion vi dirus pri tio, ke ekde tiu tempo la najadoj kaj feinoj ĉesis aperadi en la valo de Ratibořice. Jes tiel estas, ke ili forveturis al Holivudo kaj disponigis sin al filmo. Bone rimarku tion en kinejo: aspektas, kvazaŭ sur ekrano moviĝus fraŭlinoj kaj sinjoroj, sed nenian korpon tio havas, palpi tion oni ne povas, ĝi estas farita nur el radioj; videblas, ke ili estas nenio alia ol najadoj. Kaj tial oni devas en kinejo estingi kaj fari mallumon, ĉar la feinoj kaj la cetera fantoma aĉularo timas la lumon kaj viviĝas nur en mallumo.

El tio videblas, ke nek fantomoj nek aliaj fabelaperaĵoj konvenas en la nunan mondon, nur se ili trovas al si alian kaj pli prudentan profesion. Por tio ili havas abundajn okazojn.”

* * *

Nu, infanoj, dum la babilado ja preskaŭ ni forgesis la sorĉiston Magiaŝon. Nu memkomprene, li povis nek paroli nek flustri, ĉar ĝis nun en lia gorĝo enestas la pruno; li povas nur ŝviti pro timo, rulokuli kaj pensi, ke la kvar doktoroj jam helpu al li!

”Sinjoro Magiaŝo,” fine diris la doktoro el Kostelec, ”nun ni alpaŝos do al la operacio. Sed unue ni devas lavi niajn manojn, ĉar en kirurgio la ĉefafero estas la pureco.”

Kaj la kvar doktroj komencis lavi la manojn; unue en

varma akvo, poste en absoluta alkoholo, poste en benzino, poste en karboksilo; poste ili vestis purajn blankajn mantelojn — kristsinjoro, infanoj, nun oni komencos operacii! Kiu ne eltenas rigardi tion, prefere fermu la okulojn.

”Vincek,” ordonis la doktoro el Hořičky, ”tenu la manojn de la paciento, por ke li ne ekmovu sin!”

”Ĉu vi estas preta, sinjoro Magiaŝo?” demandis serioze la doktoro el Úpice.

Magiaŝo nur kapjesis; sed ĉe tio li havis pro timo tiel malgrandan animeton, ke ĝi povus kaŝiĝi post lia ungo.

”Nun!” ekkriis la doktoro el Hronov.

Tiumomente la doktoro el Kostelec etendiĝis kaj donis al magiisto Magiaŝo sur la dorson tian frapegon aŭ brubaton —

— ke ekbruegis, kiel se tondrus, kaj homoj eĉ en Náchod, Strakoč, ankaŭ en Smiřice rigardis, ĉu eble proksimiĝas fulmotondro;

— ke la tero ekstremitis, ke eĉ en Svatožovice kaj Náchod ekstremitis la preĝejturo;

— ke en la tuta regiono ĝis Trutnov kaj Police kaj eble ankoraŭ pli malproksime timiĝis ĉiuj kolomboj, ĉiuj hundoj pro ektimo enrampis en budon kaj ĉiuj katoj desaltis de la fornoj;

— ke la pruno eliĝis el la kolo de Magiaŝo kun tiel grandega forto kaj rapideco, ke ĝi flugis ĝis post Par-

dubice kaj nur apud Přelouč ĝi falis teren, dum kio ĝi mortigis sur kampo paron da bovoj kaj profundigis en tri klaftojn, du ulnojn, unu kaj duonon de futoj, sep colojn, kvar spanojn kaj kvaronlineon en la teren;

— unue do elflugis el la kolo de Magiaŝo la pruno kaj tuj post tio elflugis la vortoj: ”-sa mallertulo!” Nome tio estis tiu duono, kiu restis en la kolo de Magiaŝo, kiam li volis diri al la lentuga Vincek: ”Ci misa mallertulo!” Sed la vortoj ne plu flugis tiel malproksimen, ili falis teren tuj post Josefov kaj batrompis dume malnovan pirarbon.

Poste Magiaŝo ordigis sian barbon kaj diris: ”Mi dankas respekte.”

”Ŝate farite,” respondis la kvar doktoroj. ”La operacio sukcesis.”

”Sed,” diris tuj poste la doktoro el Úpice, ”por ke vi resaniĝu plene el la malsano, vi devas ankoraŭ kecent jarojn konvaleski, sinjoro Magiaŝo. Urĝe mi rekomendas al vi ŝanĝon de aero kaj klimato, same kiel al la nikso el Havlovice.”

”Mi konsentas kun sinjoro kolego,” deklaris la doktoro el Hronov. ”Por via sano vi bezonas multe da suno kaj aero, same kiel la solimana principidino. Tiuokaze arde mi rekomendus al vi restadon sur la dezerto Saharo.”

”Kio min koncernas,” aldiris la doktoro el Kostelec, ”mi samopinias. La dezerto Saharo estos pro vi, sinjoro

Magiaŝo, eksterordinare saniga jam tial, ĉar tie ne kreskas prunoj, kiuj povus grave endanĝerigi vian sanon.”

”Mi aliĝas al miaj estimataj kolegoj,” aldonis la doktoro el Hoříčky. ”Kaj se vi estas sorĉisto, vi povas sur la dezerto esplori kaj pripensi, kiel alsorĉi tien akvon kaj rikolton, por ke la homoj povu vivi kaj labori. Tio do estus ege bela fabelo.”

Kion povis fari la sorĉisto Magiaŝo? Li dankis bele al la kvar doktoroj, enpakis siajn sorĉaĵojn kaj transloĝiĝis el Hejšovina sur la dezerton Saharo. Ekde tiu tempo estas ĉe ni nek sorĉisto nek nigrosorĉisto, kaj tio estas bona; sed la sorĉisto Magiaŝo ĝis nun vivas kaj meditas, kiel alsorĉi sur la dezerto kampojn kaj arbarojn kaj urbojn kaj vilaĝojn — eble tion, infanoj, vi ĝisatendos.

Klarigoj

<i>ahoj</i>	(ĉeĥe) saluton
<i>akcizo</i>	mono pagata pri varo ĉe pontoj kaj urbopordegoj
<i>aklami</i>	per favoraj krioj akcepti, saluti
<i>akuta</i>	rapide graviĝanta
<i>andujo</i>	dika pork-intesto farĉita per spicitaj tripoj
<i>anemio</i>	malbona stato de sango
<i>angoro</i>	sento de premateco pro timo
<i>anheli</i>	malfacile kaj brue spiri
<i>anticipe</i>	antaŭtempe
<i>antro</i>	kaverno aŭ kavo en korpo-organo
<i>aperti</i>	malfermi
<i>armaturi</i>	plifortikigi per stangoj, dratoj
<i>asafetido</i>	malbonodora rezino uzata kiel nerva kuracilo
<i>atuto</i>	emblemo en kartludo tempe elektita kiel la plej supera
<i>Babinský</i>	iama konata rabisto
<i>basto</i>	ligneca fibro uzata por ŝnurfarado
<i>baŝo</i>	tukego
<i>baŝibokuzo</i>	ano de neregula sovaĝa armeo, konsistanta el al- banoj, bosnianoj, kurdoj
<i>batuŝko</i>	(ruse: paĉjo) titolo de superaj mastroj
<i>bavi</i>	salivumi
<i>betulo</i>	blankŝela arbo
<i>bistorto</i>	specio de unumetra herbo
<i>blendo</i>	aro da ŝtalaj platoj ŝirmantaj ŝipon, veturilon
<i>boko</i>	virkapro
<i>bronko</i>	tubo kondukanta aeron en pulmon
<i>bulbo</i>	subtera globforma parto de kelkaj plantoj

<i>burso</i>	monsaketo, alligita al zono kaj libere pendanta
<i>centaŭreo</i>	specio de ĝardena planto
<i>cinamo</i>	bruna pulvorigita spico
<i>Coĥet, Ko eluh, Tilden</i>	mondfamaj tenisistoj
<i>colo</i>	malnova mezurunuo de longo (2,6 cm)
<i>ĉarpio</i>	disfadenigita tolaĵo uzita anstataŭ vato por vundoj
<i>dekokto</i>	likvaĵo el kuiritaj vegetaĵoj
<i>dekstrino</i>	hidroliza produkto de amelo, uzata kiel gluo
<i>delica</i>	intense plezura
<i>descendi</i>	malsupreniri
<i>devanci</i>	atingi kaj preterirante postlasi
<i>dirko</i>	hoko, per kiu ŝtelisto malŝlosas serurojn
<i>draceno</i>	tropika arbo
<i>dura</i>	malmola
<i>ekscesa</i>	nekonanta limon, mezuron
<i>ekskuzi</i>	senkulpiĝi, peti pardonon
<i>ekzekvi</i>	ekzekucii, juĝeforpreni havaĵon de ŝuldanto
<i>eskalo</i>	ŝtupetaro
<i>faleno</i>	nokta papilio
<i>falto</i>	haŭtsulketo sur vizaĝo
<i>faringo</i>	dua parto de nutra kanalo
<i>fasono</i>	ekstera formo de vesto
<i>fasto</i>	religia sindeteno de manĝaĵo
<i>fetoro</i>	malbonodoro
<i>fibro</i>	fadeno
<i>filigrano</i>	delikata teksaĵo el oraj aŭ arĝentaj fadenoj
<i>filigranado</i>	paciencon postulanta laboro
<i>flako</i>	akva makulo
<i>folo</i>	gaje frenezeta
<i>forfikulo</i>	pikema insekto
<i>frandi</i>	manĝi por plezuro
<i>funto</i>	mezurunuo de pezo (0,5 kg)
<i>futo</i>	mezurunuo de longo (30 cm)
<i>gargari</i>	kurace tralavi la buŝon

<i>gorsamadinr</i>	(germane: <i>gehorsamster Diener</i>) plej humila servisto
<i>grefo</i>	birda kruro
<i>gropo</i>	la posta parto de ĉevalo, bovo ĝis la vosto
<i>grunti</i>	bleki kiel porko
<i>ĝibo</i>	dorsa natura elstaraĵo kaŭzita de grasamaso
<i>hasta</i>	tro rapida; farita senprepare
<i>hidrat/ig/i</i>	enkonduki akvon en senakvan kombinaĵon
<i>dehidratigi</i>	senigi kombinaĵon de ĝia akvo
<i>dishidratigi</i>	senigi kombinaĵon de ĝia akvo
<i>humida</i>	malseketa
<i>incenso</i>	rezino brulanta arome, uzata en preĝejo
<i>infre</i>	malsupre
<i>ingredienco</i>	ĉiu aparta substanco, kiu konsistigas miksaĵon
<i>inĝenia</i>	spiritlerta, sagace kaj fekunde eltrovema
<i>inkandeska</i>	varmiĝinta ĝis blankarda stato
<i>insolenta</i>	ofende senhonta, malrespekta
<i>intendant</i>	persono komisiita mastrumi domon
<i>iriza</i>	ĉielarke kolora
<i>-ito</i>	ĉe korporganoj inflamo
<i>Juda Fornaro</i>	iama misfama praga antaŭurba kvartalo
<i>ĵevuzem</i>	(france: <i>j'ai vous aime</i>) mi amas vin
<i>kamarilo</i>	grupo de korteganoj de reĝo
<i>karapaco</i>	ŝelo kovranta korpon de besto (testudo, krabo)
<i>karboksilo</i>	solvaĵo de fenolo en akvo, uzata por seninfektigo
<i>Karlŝtejn</i>	(ankaŭ Karl v Týn) reĝa kastelo fondita en la 14 jc. de reĝo kaj imperiestro Karolo la IV-a, kiel deponejo de kronadjuveloj kaj ŝtataj dokumentoj, deponejo de relikvoj, ŝatata restadejo de la reĝo
<i>kloralo</i>	kvietiga drogo
<i>komplezo</i>	servemo
<i>kompreso</i>	tolpeco metita sur vundon
<i>konskripcio</i>	sistemo de militista rekrutado
<i>kontrabando</i>	sekreta importado de varoj sen pagi doganon
<i>konvalo</i>	majfloro, kruĉforma blanka floro

<i>konvaleski</i>	transiri de malsano al sana stato
<i>konvikti</i>	pruvi kulpon
<i>kornuso</i>	arbedo kun kvarnombraj folioj
<i>kovi</i>	sidi sur ovoj
<i>kratago</i>	dornhava arbedo kun blankaj aŭ ruĝaj floroj
<i>krejzero</i>	kupra monereto en la aŭstria monarkio
<i>krino</i>	harego de ĉevalo
<i>kufo</i>	simpla tola kapvesto de virino
<i>kuspe</i>	kontraŭ natura direkto
<i>kvintalo</i>	100 kg
<i>lampiro</i>	lumanta muŝeto
<i>lanceni</i>	dolori per sinsekvaj subitaj nedaŭraj atakoj
<i>lanta</i>	malrapida
<i>lapo</i>	planto kun grandegaj folioj kaj kun floraĵoj, kiuj ofte alkroĉiĝas al vestoj
<i>lapiso</i>	arĝenta nitrato en formo de stangeto, kiu bruligas vundojn (infera ŝtono)
<i>laro</i>	mevo (marbirdo)
<i>latrono</i>	ŝtelistego
<i>leĝera</i>	malpeza
<i>levrelo</i>	leporhundo
<i>libelo</i>	longa insekto kun grandegaj travideblaj flugiloj
<i>linimento</i>	likva kuracilo por ŝmiri
<i>lodo</i>	mezurunuo de pezo (15 kg)
<i>maato</i>	ŝipano
<i>magra</i>	malgrasa
<i>mato</i>	kovraĵo plektita el pajlo
<i>mava</i>	treege malbona
<i>medolo</i>	molaĵo en ostoj
<i>mentoro</i>	saĝa konsilanto kaj gvidanto de junulo
<i>mitingo</i>	granda publika politika kunveno
<i>morna</i>	preme malĝojiga
<i>Morney</i>	(angle) Mornulo
<i>morsi</i>	signali per morsa alfabeto
<i>mungi</i>	nazpurigi

<i>muzelo</i>	nazo kaj buŝo de besto
<i>najado</i>	akva feino
<i>naŭzi</i>	kaŭzi senton de abomeno
<i>nikso</i>	akvofeo
<i>noci</i>	malutili, dolorigi
<i>ovri</i>	malfermi
<i>pado</i>	vojeto
<i>parco</i>	diino ŝpinanta fadenon de homa vivo
<i>paruo</i>	malgranda, vigla birdeto
<i>pasero</i>	malgranda urba birdeto
<i>paŭti</i>	per grimaco montri malkontenton
<i>pelerino</i>	senmanika mantelo
<i>perkuti</i>	diagnoze frapeti la korpon de paciento
<i>permanganato</i>	seninfektiga solvaĵo
<i>perpleksa</i>	ŝanceliĝa pro senkonsileco
<i>petalo</i>	unu kolora folio de floro
<i>pitŝen</i>	(germane: <i>bitte schön</i>) mi petas
<i>pleŭro</i>	membrano teganta eksteron de pulmoj
<i>pluki</i>	ŝiri floron aŭ levi falintaĵon per fingroj
<i>polmo</i>	manplato
<i>povra</i>	kompatinda
<i>predo</i>	rabaĵo, kapitaĵo
<i>proskribi</i>	senjuĝe elpeli el lando
<i>provoso</i>	gardisto en malliberejo
<i>pufa</i>	plenblovita, plenŝtopita
<i>pulo</i>	saltanta insekto suĉanta sangon
<i>punca</i>	hele ruĝa kiel floro de papavo
<i>raĝo</i>	reĝo aŭ princo en Hindujo
<i>raslo</i>	nenormala bruo kaŭzata de aerpasso tra aervojo
<i>ratafio</i>	brando gustigita per migdaloj
<i>reglamento</i>	administra regularo
<i>regolo</i>	malgranda birdo kun flava makulo surkape
<i>riceli</i>	konscie kaŝi rabaĵon kaj tiel helpi ŝteliston
<i>Rinaldo Rinaldini</i>	iama konata rabisto
<i>rinito, korizo</i>	inflamo de la naza mukozo

<i>rui</i>	meti tekseblan planton en likvaĵon por disigi fibrojn
<i>rufa</i>	ruĝe flava, rustkolora, kuprokolora
<i>rumoro</i>	konfuze voĉbruado
<i>Sagazzi</i>	(itale) Sagaculo
<i>saliko</i>	arbo, kies flekseblaj vergoj estas uzataj por korbofarado
<i>sanbernarda hundo</i>	granda hundo de la trapasejo San-Bernardo en la Alpoj
<i>si</i>	(itale) jes
<i>silvuple</i>	(france: <i>s'il vous plaît</i>) kiel plaĉas al vi, bonvolu, mi petas vin
<i>snufi</i>	enspiri tra la nazo (ankaŭ tabakon)
<i>spano</i>	malnova mezurunuo de longo (15-20 cm)
<i>stiri</i>	direkti veturilon (aŭton, biciklon, ŝipon, avion)
<i>Stromovka</i>	parko en Prago
<i>stumbli</i>	irante preskaŭ fali pro obstaklo
<i>suro</i>	tibikarno, muskolo sub genuo
<i>ŝimo</i>	kovraĵo el mikroskopaj fungetoj
<i>ŝuŝi</i>	brui simile al gaso eliranta sub forta premo
<i>talero</i>	arĝenta monero
<i>tegumento</i>	kovraĵo de animala korpo (haŭto, felo, skvamoj)
<i>tenera</i>	kondutanta dolĉe kaj amike
<i>tepida</i>	duonvarma-duonmalvarma
<i>Teplice, Pieš Ďany</i>	(slange: <i>PišĎany</i>) mondfamaj banurboj en Ĉeĥoslovakio
<i>teriako</i>	malnova kuracilo el plantoj, mielo, opio k.a.
<i>tibio</i>	longa ostoj inter la genuo kaj la maleolo
<i>tonsilo</i>	formaĵo en gorgo
<i>trampli</i>	piedbati la teron
<i>treŝarme</i>	(france: <i>trî charmé</i>) mi estas ravita
<i>treĥi</i>	forte premi per piedo
<i>tufoj</i>	densa aro da maldikaj kunkreskantaj aĵoj
<i>valeriano</i>	ĝardeno planto, kies radikoj estas drogo
<i>veluro</i>	ŝtofo kun densaj mallongaj haroj

<i>verto</i>	la supra loko de la homa kapo
<i>vertrago</i>	leporhundo, levrelo
<i>viburno</i>	ĝardena ornamlanto

Karel Čapek (1890 — 1938)

naskiĝis kiel la plej juna el tri infanoj de kuracisto. Čapek studis filozofion, filologion, etiketon kaj historion de belartoj en la fakultato de la Karol-universitato en Prago, kaj aŭskultis prelegojn en la berlina universitato kaj la pariza Sorbono. En la jaro 1915 li doktoriĝis pri filozofio. Kiel unua li enkondukis per siaj tradukoj la modernan francan poezion en la ĉeĥan kulturon kaj influis junan generacion de ĉeĥaj poetoj. Fine li decidiĝis por la ĵurnalista kariero kaj laboris ĝis la fino de sia vivo en la redakcio de *Lidové noviny* (Popola ĵurnalo), liberala kaj kulture altnivela gazeto, treege ŝatata de la inteligentularo. Tie Čapek publicadis siajn felietonojn, rakontojn, kursivojn, sed ankaŭ romanojn. Persona amiko de prezidento T. G. Masaryk, kies humanisman kaj spiritan testamentojn li popularigis en la trivoluma verko *Dialogoj kun T. G. Masaryk*. Čapek estis partiano de poiomaj reformoj, rifuzadis revolucian solvodon kaj nepre estis kontraŭ faŝismo. El multaj liaj verkoj ni citu liajn vojaĝ-priskribojn, en kiuj kulminis lia rakont-arto: *Italaj Leteroj* (en Esperanta manuskripto), *Anglaj Leteroj*, *Ekskurso en Hispanion*, *Skizoj el Nederlando* (esperantigita), *Vojaĝo*

Norden. Ĉapek okupiĝis pri teatro kiel dramaturgo kaj reĝisoro. Kelkaj liaj teatraĵoj: *Rabisto*, *R.U.R. (Rossum's Universal Robots)*, *La Blanka Malsano* (ambaŭ esperantigitaj kaj disaŭdigataj el radio-stacio de Brno), *Patrino*, *Afero Makropulos*, *El la vivo de insektoj* (ambaŭ en E-manuskripto), *Adamo Kreinto* ktp. Liaj romanoj: *Fabriko je Absoluto*, *Kmpkrucoj* (pri viv-vojkruciĝoj), *Libro de Apokrifoj* (okazaĵoj kun nekutimaj solvoj, esperantigitaj), *Rakontoj el unu poŝo* kaj *Rakontoj el la dua poŝo* (esperantigitaj; krim-historietoj, deliktuloj vidataj kiel homoj kun sia vero), *Milito kontraŭ Salamandroj* (en E-manuskripto, kalejdoskopo pri la homa egoismo), *Naŭ Fabeloj* (malgraŭ la fabel-motivoj sur realisma bazo), trilogio: *Hordubal*, *Meteoro*, *Ordinara Vivo* (en E-manuskripto).

Karel Ĉapek estas mondkonata ĉeĥa verkisto, li kaj liaj verkoj estas amataj ne nur en la tuta Eŭropo, sed en la tuta mondo.

Josef Čapek (1887-1945)

la pli aĝa frato de Karel Čapek, estas precipe klasikulo de la moderna ĉeĥa pentroarto kaj ilustrado, sed li apartenas ankaŭ al gravaj verkistoj. Kun Karel li kunaŭtoris la dramon *El la vivo de insektoj*, liaj gravaj memstaraj verkoj estas *La ombro de filiko* (1930) kaj *Lamanta pilgrimanto* (1936). Por la infanoj li verkis ĉarman libreton *Rakontado pri hundeto kaj katineto* kaj la fabelon *Pri la dika praavo kaj ŝtelistoj*, kiun ni prezentas en ĉi tiu volumo. Li ankaŭ elpensis la nomon roboto por artefarita homo, kiun uzis Karel Čapek en la dramo *R.U.R.* kaj tiel mondfamigis. Josef Čapek ilustris multajn librojn de ĉeĥaj aŭtoroj. En 1939 li estis arestita de Gestapo, ses jarojn li travivis en kelkaj koncentrejoj kaj dum unu transporto li mortis pro tifo.

Miroslav Malovec

Enhavo

La granda katfabelo	3
KIEL LA REĜO AĈETIS KATON	3
ĈIO, KION KATO KAPABLAS	14
KIEL DETEKTIVOJ ĈASIS MAGIISTON	22
KIEL LA GLORA SIDNEY HALL KAPTIS LA MAGIISTON	34
KIEL LA MAGIISTO SIDIS EN KARCCERO	57
FINO DE LA FABELO	66
Fabelo hunda	73
Fabelo birda	86
La unua rabista fabelo	95
PRI LA DIKA PRAAVO KAJ LA RABISTOJ	95
Fabelo niksa	115
Dua rabista fabelo	123
Vagabonda fabelo	138
Granda polica fabelo	157
Fabelo poŝtista	178
Granda doktora fabelo	198
PRI LA SOLIMANA PRINCIDINO	203
LA KAZO KUN BLEKULO	215
LA KAZO KUN LA NIKSO EL HAVLOVICE	218
LA KAZO KUN NAJADOJ	221
Klarigoj	229
Karel Čapek (1890 — 1938)	236
Josef Čapek (1887-1945)	238

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-165-8